

Esperanto

V-18679/8  
(1920)



**UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO**

OFICIALA  
**JARLIBRO**  
**1920**

8<sup>a</sup> JARO

UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO  
14, MUSEUMSSTRASSE, BERN

## JE MATENMANĜO

Fortiganto por  
JUN-KAJ MALJUNULOJ

# OVOMALTINO

D<sup>ro</sup> A. Wander & S<sup>o</sup> Bern

Ovomaltino enhavas en si ĉiujn nutrajn substancojn, kiujn la homa korpo en nuna periodo de streĉa laboro des pli grandkvante bezonas, kaj liveras ilin en formo agrabla laŭ gusto, facile kaj plene asimilebla de la organismo. Per Ovomaltino estas eble enkonduki pli da energio en la korpon, ne troŝarĝante tamen la organojn de digestado. Pli ol ĉia alia nutro Ovomaltino estas kapabla egaligi ĉe nervmalsanuloj la troelspezon de energio, redoni al spirite kaj korpe elĉerpitaj personoj la fiziologian ekvilibron, faciligi al streĉe laboranta homo lian ĉiutagan taskon. Taso da Ovomaltino ĉe la matenmanĝo estas bona bazo por la tuta tago; taso da Ovomaltino antaŭ kuŝiĝo garantias kvietan sanan dormon. Prof. Dr. O. Tilmann, Köln, kaj Dr. med. O. Veraguth, Zürich, en la "Lernolibro de Terapio de internaj malsanoj" rekomendas Ovomaltinon kiel taŭgan nutraĵon por neŭrasteniuloj.

Skatoloj je 250 gramoj . . . . . Fr. 3.—

„ „ 500 „ . . . . . „ 5.50

riceveblaj en apotekoj, drogejoj kaj vendejoj de nutraĵoj.

## GRAVA!

Estimata Samideano.

I. — Dankante vin pro via kotizaĵo, ni havas la honoron sendi al vi la jarlibron por 1920.

II. — KOTIZAĴO POR 1921. — Por ke ne okazu interrompoj en viaj membrorajtoj kaj por ebligi regulan finan administradon de nia Asocio, vi bonvolu afable repagi vian kotizaĵon por 1921 ĝis la fino de marto 1921.

III. — VARBADO. — Por ke nia Asocio fariĝu pli kaj pli grava kaj potenca, estas necese, ke konstante ĝi pligrandigu la nombron de siaj membroj. Ni do insiste petas vin, ke vi konsideru kiel devon, varbi dum la venonta jaro almenaŭ unu membron, inter la personoj kiuj iel ajn bezonas la servojn de U. E. A. aŭ sin interesas pri Esperantismo. Vi uzu por tio la du aldonitajn varbilojn.

IV. — BONVOLA KUNLABORADO. — Se vi rimarkis eraron en la jarlibro; se vi konas iun kiu povus fariĝi Delegito en loko kie ne estas; se vi konas firmon, asocion, k. t. p., kiu povas nin helpi; se vi deziras fari al ni proponon, sendu la aldonitan respondilon.

Kun samideana saluto kaj antaŭa danko

Universala Esperanto Asocio  
Centra Oficejo.



# Universala Esperanto Asocio

Varbinto: ..... Membro N<sup>o</sup> .....  
 Strato: ..... Loko: .....

## VARBILO

Bonvolu enskribi ..... { S<sup>ron</sup> — Sinjorinon — Fraŭlinon —  
 Entreprenon — Organizaĵon —

Nomo .....

Antaŭnomo .....

Profesio .....

Strato ..... N<sup>o</sup> .....

Loko ..... Lando .....

Kiel:

Membro ordinara; Membro Abonanto; Membro Subtenanto; Esperantia Entrepreno; Dumviva Membro (300,00 Fr. Svis.).

La prezoj por ĉiuj landoj troviĝas sur tabelo paĝo 75.

LA VARBINTO:

Detranĉu tiun ĉi varbilon kaj sendu ĝin kun la mono al la Delegito de via loko aŭ al la Centra Oficejo U. E. A., 14 Museumsstrasse, Bern.



v-18673



# Universala Esperanto Asocio

Varbinto: ..... Membro No .....

Strato: ..... Loko: .....

## VARBILO

*Bonvolu enskribi* ..... { Sron — Sinjorinon — Fraŭlinon —  
Entreprenon — Organizaĵon —

*Nomo* .....

*Antaŭnomo* .....

*Profesio* .....

*Strato* ..... *No* .....

*Loko* ..... *Lando* .....

Kiel:

**Membro ordinara; Membro Abonanto; Membro Subtenanto; Esperantia Entrepreno; Dumviva Membro (300,00 Fr. Svis.).**

La prezoj por ĉiuj landoj troviĝas sur tabelo paĝo 75.

LA VARBINTO:

Detranĉu tiun ĉi varbilon kaj sendu ĝin kun la mono al la Delegito de via loko aŭ al la Centra Oficejo U. E. A., 14 Museumsstrasse, Bern.

---

Duliniaj anoncetoj: 2 frankoj.

---

# JARLIBRO DE U. E. A.

---

## TARIFO DE L'ANONCOJ

---

**1 paĝo: 50 frankoj.**

(Svisa valoro)

---

**1/2 paĝo: 25 frankoj.**

---

**1/4 paĝo: 12,50 frankoj.**

---

**1/10 paĝo: 5 frankoj.**

---

Rabato da 10<sup>0</sup>/<sub>10</sub> al Esperantiaj Entreprenoj. — La anoncoj por 1921 estas akceptataj ĝis la 31 januaro 1921.



UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO

OFICIALA  
JARLIBRO  
1920

8<sup>a</sup> JARO

UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO  
14 MUSEUMSSTRASSE, BERN



## Ĉiuj rajtoj rezervitaj

La enhavo de tiu Jarlibro ne povas esti represata,  
ĉu tute, ĉu parte, sen la permeso de U E A.

## ENHAVO.

Enkonduko . . . . .	7
Kalendaro . . . . .	10

### Unua Parto: **Enciklopedio.**

Kronologio . . . . .	13
Sezonoj . . . . .	13
Luno . . . . .	14
Eklipsoj . . . . .	14
Suna sistemo . . . . .	14
Horo . . . . .	15
Mezuroj kaj Pezoj . . . . .	17
Diversaj unuoj . . . . .	18
Temperaturo . . . . .	19
Montoj . . . . .	20
Marprofundoj . . . . .	21
Riveroj . . . . .	21
Lagoj . . . . .	22
Urboj . . . . .	23
Areo kaj loĝantaro de la diversaj landoj . . . . .	23
Rasoj kaj Religioj . . . . .	27
Lingvoj . . . . .	27
Monda komerco . . . . .	29
Monunuoj . . . . .	30
Monda ŝiparo . . . . .	32
Fervojaj komunikoj . . . . .	32
Poŝtaj komunikoj . . . . .	33
Internaciaj poŝtaj tarifoj . . . . .	34
Ĉefaj Internaciaj institucioj . . . . .	36
Ĉefaj datoj de la mondhistorio . . . . .	41
Anoncoj . . . . .	XI—XVIII

### Dua Parto: **Esperantismo.**

Historio de la Esperanto Movado . . . . .	43
La lingvo Esperanto . . . . .	47
Deklaro pri Esperantismo . . . . .	50

La Esperanta Literaturo . . . . .	52
Dek devoj de l'Esperantisto . . . . .	54
Organizo de la Esperanto Movado . . . . .	54
Universala Esperanto Asocio . . . . .	57
Esperantistaj Organizaĵoj . . . . .	59
Gazetoj Esperantistaj . . . . .	64
La Esperanto Movado dum 1919 . . . . .	69
U E A dum 1919 . . . . .	70
Praktikaj Informoj pri U E A . . . . .	71
<b>Anoncoj</b> . . . . .	XIX—XXVI

Tria Parto: **Centra Organizo de U E A.**

Komitato . . . . .	79
Centra Officejo . . . . .	79
Dumvivaj Membroj kaj Garantiantoj . . . . .	80
Adresaro de la Delegitoj kaj Esp. Grupoj . . . . .	83
Laŭlanda listo de la lokoj kie U E A estas reprezentata . . . . .	144
Esperantiaj Entreprenoj . . . . .	148
<b>Anoncoj</b> . . . . .	XXXVII—XXXIV

Kvara Parto: **Interrilata Adresaro.**

Korespondado per leteroj poŝtkartoj ktp. . . . .	157
Korespondado pri specialaj temoj . . . . .	168
Interŝanĝo de poŝtmarkoj kaj diversaj objektoj . . . . .	177
<b>Anoncoj</b> . . . . .	XXXV—XLVIII



Hector Hodler †  
1. Oktobro 1887 — 30. Marto 1920.

## ENKONDUKO.

Post kelkjara interrompo, kaŭzita de la eksterordinaraj cirkonstancoj, reaperas la Oficiala Jarlibro de UEA, kiu espereble trovos ĉe niaj membroj same favoran akcepton kiel la antaŭmilitaj eldonoj. Presante en ĝi ne nur regularon kaj adresaron de UEA, sed ankaŭ enciklopedian parton kaj informaron pri la Esperanto-movado, ni penis fari el ĝi libreton samtempe interesan kaj utilan. La Jarlibro de UEA estas embrio de praktika poŝformata informilo internacia, necesega al ĉiu moderna homo, sekve al ĉiu Esperantisto.

La enciklopedia parto, kiu estis komencita en pli fruaj eldonoj, estas pliriĉigita per multaj novaj statistik-informoj, laŭ diversnaciaj dokumentoj. Ni atentigas, ke pri multaj landoj, speciale la orientaj, oni povas nuntempe liveri nur proksimumajn ciferojn. En la venontaj eldonoj ni korektos ĉiujn informojn laŭ la novaj oficialaj dokumentoj, kaj aldonos novajn pri diversaj fakoj de la ekonomia kaj kultura vivo. Tiu ĉi enciklopedia parto estu do rigardata nur kiel komenco de io, kion ni deziras ĉiujare plibonigi kaj kompletigi.

En la parto traktanta pri Esperantismo, la leganto trovos tute novajn artikolojn pri la historio kaj organizo de la Esperanto-movado, pri la lingvo kaj ĝia literaturo, pri la funkciado de UEA, ktp; ĝi estas la minimumo de tio, kion devas scii ĉiu bona Esperantisto. Nia Jarlibro estos do taŭga instruilo por la kurslernantoj kaj novaj samideanoj, kiujn oni tial penu varbi al UEA. Ni ankaŭ laŭeble donis informojn, ĉiujare kontrolotajn, pri la ĉefaj

organizaĵoj de la Esperanto-movado, pri la aperantaj gazetoj kaj novaj libroj. La kolekto de la estontaj jarlibroj permesos do konstati jaron post jaro la disvolviĝon de nia movado.

La Adresaro de la Delegitoj estas farita laŭ la sama plano kiel la lastjara. Ni publikigis la grupojn, pri kiuj nin sciigis la Delegitoj. Fine, troviĝas listo de la Esperantiaj Entreprenoj, kiujn ni rekomendas al nia membraro, esprimante la deziron, ke ili estu pli multaj en la venonta eldono, kaj — plia novaĵo! — adresaro de membroj dezirantaj internacie korespondi aŭ interrilati por specialaj celoj.

La temoj traktitaj en la enciklopedia parto iafoje postulis la uzon de esprimoj, kiuj, kvankam ili troviĝas en la vortaroj, estas ĝis nun ne tre oftaj. La propraj nomoj estas Esperantigitaj nur kiam ili koncernas internacie konatajn lokojn, malsame nomatajn en la naciaj lingvoj. (Ekz. Alpoj, Danubo, Mediteraneo, ktp.) Por la landnomoj devenantaj de popoloj ni aplikis la finaĵon *-io* nun uzatan de multaj samideanoj. Tion ĉi ni faras ne pro persona kaprico, sed pro praktikaj kaŭzoj, laŭsperte konstatinte la maloportunaĵojn de la ĝisnuna nomigado per *-ujo* aŭ *-lando*. Oni certe allasos, ke se en la mondo ekzistas institucio, kiu ofte bezonas uzi landnomojn, tio certe estas la Centra Oficejo de UEA. Pri tiu demando ĝi do havas ne dubeblan kompetentecon, kaj se ĝi decidis prove enkonduki internacian sufikson, kiun nepre bezonas la geografia kaj historia lingvo, tio estas ne sen pripenso kaj sperto. Cetere, la Fundamento tute ne malhelpas la enkondukon de novaj sufiksoj kaj novaj vortoj, nek la diferencigon de malsamaj sencoj en ĝisnunaj sufiksoj (kiel *-uj*) kaj vortoj.

\* \* \*

Tiun ĉi unuan postmilitan eldonon oni bonvolu rigardi samtempe kun indulgemo kaj kun kritikemo: kun indulgemo, ĉar ĝi devis esti farita rapide, en nefavoraj circumstancoj kaj dum malsaniĝo de la Direktoro de UEA, kun kritikemo, ĉar ĝia plibonigo estas realigebla nur per ĉies kunlaborado. Unua eldono neniam estas senpeka. Kiu rimarkis eraron ian, estas petata tuj skribi al la Centra Oficejo de UEA.

Fine, ni remomorigas, ke la publikigo de tia riĉenhava Jarlibro trudas al UEA gravajn elspezojn. Ne multaj organizaĵoj posedantaj nur kelkajn milojn da membroj povas liveri al ĉiu el ili tiom ampleksan eldonaĵon. Por tion daŭrigi en la venontaj jaroj, ni nepre bezonas pli multajn membrojn, entreprenojn kaj anoncojn. Al tio helpu ĉiu leganto.

Nia Jarlibro ne apartenas al tiuj oficialaj dokumentoj, kiujn, respektive rigardinte, unu fojon por ĉiam, oni lokigas sur neatingeblan librobreton, kie ili kovriĝas per polvo. La Jarlibro de UEA devas troviĝi en la poŝo aŭ sur la labortablo de ĉiu Esperantisto, esti ne nur unu fojon legata, sed ofte uzata por praktika interrilatiĝo kun alilandaj samideanoj. Nur tiamaniere ĝi plenumos sian celon: helpi al la ĉiam pli intensa uzado de nia lingvo.

**La Redaktinto.**  
(H. Hodler †)

Pro la morto de nia kara prezidanto, kies lasta verko estas ĉi-tiu jarlibro, kiel pro gravaj malfacilaĵoj dum la presado, la eldonaĵo multe prokrastiĝis. Ĉiuj informoj estas kontrolitaj ĝis fino de junio, la tekston ni lasis en ĝia originala formo. Biografio de S<sup>ro</sup> HODLER aperos en la proksima jarlibro.

**Centra Oficejo de UEA.**

# KALENDARO POR LA JARO 1920

Monatoj	Lundo	Mardo	Merkredo	Ĵaŭdo	Vendredo	Sabato	Dimanco	Monatoj	Lundo	Mardo	Merkredo	Ĵaŭdo	Vendredo	Sabato	Dimanco
<b>Januaro</b>	—	—	—	1	2	3	4	<b>Julio</b>	—	—	—	1	2	3	4
	5	6	7	8	9	10	11		5	6	7	8	9	10	11
	12	13	14	15	16	17	18		12	13	14	15	16	17	18
	19	20	21	22	23	24	25		19	20	21	22	23	24	25
	26	27	28	29	30	31	—		26	27	28	29	30	31	—
<b>Februaro</b>	—	—	—	—	—	—	1	<b>Aŭgusto</b>	—	—	—	—	—	—	1
	2	3	4	5	6	7	8	<b>Maria</b>	2	3	4	5	6	7	8
	9	10	11	12	13	14	15	<b>Ĉieliro: 15</b>	9	10	11	12	13	14	15
	16	17	18	19	20	21	22		16	17	18	19	20	21	22
	23	24	25	26	27	28	29		23	24	25	26	27	28	29
	—	—	—	—	—	—	—		30	31	—	—	—	—	—
<b>Marto</b>	1	2	3	4	5	6	7	<b>Septembro</b>	—	—	1	2	3	4	5
	8	9	10	11	12	13	14		6	7	8	9	10	11	12
	15	16	17	18	19	20	21		13	14	15	16	17	18	19
	22	23	24	25	26	27	28		20	21	22	23	24	25	26
	29	30	31	—	—	—	—		27	28	29	30	—	—	—
<b>Aprilo</b>	—	—	—	1	2	3	4	<b>Oktobro</b>	—	—	—	1	2	3	
<b>Pasko: 4</b>	5	6	7	8	9	10	11		4	5	6	7	8	9	
	12	13	14	15	16	17	18		11	12	13	14	15	16	17
	19	20	21	22	23	24	25		18	19	20	21	22	23	24
	26	27	28	29	30	—	—		25	26	27	28	29	30	31
<b>Majo</b>	—	—	—	—	—	1	2	<b>Novembro</b>	1	2	3	4	5	6	7
<b>Ĉieliro: 13</b>	3	4	5	6	7	8	9	<b>Ĉiuj Sanktuloj: 1</b>	8	9	10	11	12	13	14
<b>Pentekosto: 23</b>	10	11	12	13	14	15	16		15	16	17	18	19	20	21
	17	18	19	20	21	22	23		22	23	24	25	26	27	28
	24	25	26	27	28	29	30		29	30	—	—	—	—	—
	31	—	—	—	—	—	—		—	—	—	—	—	—	—
<b>Junio</b>	—	1	2	3	4	5	6	<b>Decembro</b>	—	—	1	2	3	4	5
	7	8	9	10	11	12	13	<b>Kristnasko: 25</b>	6	7	8	9	10	11	12
	14	15	16	17	18	19	20		13	14	15	16	17	18	19
	21	22	23	24	25	26	27		20	21	22	23	24	25	26
	28	29	30	—	—	—	—		27	28	29	30	31	—	—

# KALENDARO POR LA JARO 1921

Monatoj	Lundo	Mardo	Merkredo	Ĵaŭdo	Vendredo	Sabato	Dimanco	Monatoj	Lundo	Mardo	Merkredo	Ĵaŭdo	Vendredo	Sabato	Dimanco		
<b>Januaro</b>	—	—	—	—	—	1	2	<b>Julio</b>	—	—	—	—	1	2	3		
	3	4	5	6	7	8	9		4	5	6	7	8	9	10		
	10	11	12	13	14	15	16		11	12	13	14	15	16	17		
	17	18	19	20	21	22	23		18	19	20	21	22	23	24		
	24	25	26	27	28	29	30		25	26	27	28	29	30	31		
	31	—	—	—	—	—	—		—	—	—	—	—	—	—		
<b>Februaro</b>	—	1	2	3	4	5	6	<b>Aŭgusto</b>	1	2	3	4	5	6	7		
	7	8	9	10	11	12	13	<b>Maria</b>	8	9	10	11	12	13	14		
	14	15	16	17	18	19	20	<b>Ĉieliro: 15</b>	15	16	17	18	19	20	21		
	21	22	23	24	25	26	27		22	23	24	25	26	27	28		
	28	—	—	—	—	—	—		29	30	31	—	—	—	—		
<b>Marto</b>	—	1	2	3	4	5	6	<b>Septembro</b>	—	—	—	1	2	3	4		
<b>Pasko: 27</b>	7	8	9	10	11	12	13		5	6	7	8	9	10	11		
	14	15	16	17	18	19	20		12	13	14	15	16	17	18		
	21	22	23	24	25	26	27		19	20	21	22	23	24	25		
	28	29	30	31	—	—	—		26	27	28	29	30	—	—		
<b>Aprilo</b>	—	—	—	—	1	2	3	<b>Oktobro</b>	—	—	—	—	—	1	2		
	4	5	6	7	8	9	10		3	4	5	6	7	8	9		
	11	12	13	14	15	16	17		10	11	12	13	14	15	16		
	18	19	20	21	22	23	24		17	18	19	20	21	22	23		
	25	26	27	28	29	30	—		24	25	26	27	28	29	30		
	—	—	—	—	—	—	—		31	—	—	—	—	—	—		
<b>Majo</b>	—	—	—	—	—	—	1	<b>Novembro</b>	—	1	2	3	4	5	6		
<b>Ĉieliro: 5</b>	2	3	4	5	6	7	8	<b>Ĉiuj Sanktuloj: 1</b>	7	8	9	10	11	12	13		
<b>Pentekosto: 15</b>	9	10	11	12	13	14	15		14	15	16	17	18	19	20		
	16	17	18	19	20	21	22		21	22	23	24	25	26	27		
	23	24	25	26	27	28	29		28	29	30	—	—	—	—		
	30	31	—	—	—	—	—		—	—	—	—	—	—	—		
<b>Junio</b>	—	—	1	2	3	4	5	<b>Decembro</b>	—	—	—	—	—	1	2	3	4
	6	7	8	9	10	11	12	<b>Kristnasko: 25</b>	5	6	7	8	9	10	11		
	13	14	15	16	17	18	19		12	13	14	15	16	17	18		
	20	21	22	23	24	25	26		19	20	21	22	23	24	25		
	27	28	29	30	—	—	—		26	27	28	29	30	31	—		



## UNUA PARTO.

# ENCIKLOPEDIO.

### Kronologio.

La jaro **1920** de la *Gregoria Kalendaro* respondas al la jaro: **1920** de la *Julia Kalendaro* (komenco: 14 januaro 1920).

**5680—5681** de la *Hebrea Kalendaro* (komenco de la jaro 5681: 13 septembro 1920).

**1338—1339** de la *Mohamedana Kalendaro* (komenco de la jaro 1339: 15 septembro 1920).

La *Gregoria Kalendaro* estas la Julia Kalendaro plibonigita per dekreto de Papo Gregorio XIII<sup>a</sup> la 15 oktobro 1582 kaj sinsekve akceptita de la pli multaj civilizitaj ŝtatoj. (De 1918 sovjeta Rusio ankaŭ uzas la Gregorian Kalendaron.)

La *Julia Kalendaro* estas ankoraŭ uzata de la Ortodoksaj popoloj; ĝi diferencas de la Gregoria per tio, ke ĝi malfruas je 14 tagoj.

La *Hebrea Kalendaro* enhavas 12 aŭ 13 monatojn, la monatoj, fiksitaj laŭ la irado de la luno, 29 aŭ 30 tagojn; la 12-monataj jaroj havas 353, 354 aŭ 355 tagojn, la 13-monataj 383, 384 aŭ 385 tagojn. Tiuj diversaj jaroj sin sekvas tiel, ke je ĉiu 19<sup>a</sup> jaro la komenco de la Hebrea jaro konicidu kun tiu de la suna jaro.

La *Mohamedana Kalendaro* komenciĝas je la Hegiro (16 julio 622 p. Kr.), t. e. la forkuro de Mohamedo el Meko al Medino. La monatoj havas 29 aŭ 30 tagojn, laŭ la luno; la jaro havas ĉiam 12 monatojn kaj 354 aŭ 355 tagojn.

### Sezonoj.

*Printempo*: 20 marto.

*Aŭtuno*: 23 septembro.

*Somero*: 21 junio.

*Vintro*: 22 decembro.

En la suda duonsfero la sezonoj estas inversaj.

### Luno.

- ☾ NL = Nova luno.
- ☽ PL = Plena luno.
- ☾ UK = Unua kvarono.
- ☽ LK = Lasta kvarono.

Januaro	Februaro	Marto	Aprilo	Majo	Junio	Julio	Augusto	Septembro	Oktobro	Novembro	Decembro
5 PL	4 PL	4 PL	3 PL	3 PL	1 PL	1 PL	7 LK	5 LK	5 LK	3 LK	2 LK
13 LK	11 LK	12 LK	11 LK	11 LK	9 LK	9 LK	14 NL	12 NL	12 NL	10 NL	10 NL
21 NL	19 NL	20 NL	18 NL	18 NL	16 NL	15 NL	21 UK	20 UK	20 UK	18 UK	18 UK
28 UK	16 UK	27 UK	25 UK	24 UK	23 UK	22 UK	29 PL	28 PL	27 PL	26 PL	25 PL
						30 PL					

### Eklipsoj.

**2—3 majo:** Plena *luneklipo*, videbla en Eŭropo, sud-okcidenta Azio, Hinda Oceano, Afriko, Atlanta Oceano, Sud-Ameriko, Nord-Ameriko (krom okcidenta Kanado kaj Alasko) kaj en orienta parto de Granda Oceano.

**18 majo:** Parta *suneklipo*, videbla en Hinda Oceano kaj Aŭstralio.

**27 oktobro:** Plena *luneklipo*, videbla en orienta Eŭropo, okcidenta Nord-Ameriko, Granda Oceano, Aŭstralio, Azio, Hinda Oceano, orienta Afriko.

**10 novembro:** Parta *suneklipo*, videbla en nord-orienta Ameriko, suda Groenlando, norda Atlanta Oceano, okcidenta Eŭropo, Maroko, Alĝerio, nord-okcidenta Saharo.

### Suna sistemo.

La *Suno* estas 1 253 000 pli granda kaj 333 470 pli peza ol la tero. Meza distanco de la Tero: 150 milionoj da km. Temperaturo taksata je 5000—10 000<sup>o</sup> C. La sunvarmo, kiun ricevas la Tero po m<sup>2</sup> en 1 sekundo, egalvaloras 2<sup>1</sup>/<sub>4</sub> HP.

La *Tero* havas areon da 510 082 000 km<sup>2</sup>, el kiuj <sup>3</sup>/<sub>4</sub> estas maroj. Pezo: 5690 trilionoj da milkilogramoj. Diametro je la ekvatoro: 12 756 km, je la poluso: 12 735 km. Platiĝo: <sup>1</sup>/<sub>293</sub>. La tero turniĝas

en 23 h. 56 m. 4 s. (465 m po sekundo) kaj ĉirkaŭiras la Sunon en 365<sup>1</sup>/<sub>4</sub> tagoj (30 km po sekundo).

La *Luno* estas 50 pli malgranda ol la Tero. Distanco de la Tero: 384 446 km. Ĝi ĉirkaŭiras la Teron en 27<sup>1</sup>/<sub>4</sub> tagoj. Temperaturo taksata je 100<sup>o</sup> C tage kaj —50<sup>o</sup> C nokte.

La *Planedoj* moviĝas ĉirkaŭ la Suno. Jen informoj pri la grandaj:

Nomo de la planedo	Rondiro ĉirkaŭ la suno	Distanco de la Suno (per milionoj da km.)			Grandeco kompare kun la Tero (= 1)
		minimuma	meza	maksimuma	
	Jaroj Tagoj				
Merkuro . . .	— 88	46	58	70	0,053
Venuso . . .	— 224	107	108	109	0,93
Marso . . . .	1 321	206	227	248	0,15
Jupitero . . .	11 314	738	775	813	1318
Saturno . . .	29 166	1344	1424	1504	686
Uranio . . .	84 6	2731	2864	2996	62
Neptuno . . .	164 286	4446	4487	4527	83

La distanco inter la plej proksima stelo (*Centaŭro*) kaj la Tero estas 41 trilionoj da km (270 000 pli ol la distanco inter la Tero kaj la Suno).

La suprajn distancojn oni povas pli facile taksi per la jena komparato: Se oni fiksas je 1 metro la distancon inter la Suno kaj la Tero, la distanco inter la Tero kaj la Luno estos nur 2<sup>1</sup>/<sub>2</sub> milimetroj, inter la Tero kaj Venuso, la plej proksima planedo, 28 centimetroj, inter Tero kaj Neptuno, la plej malproksima planedo, 28 metroj kaj inter la Tero kaj Centauro, la plej proksima stelo, 270 kilometroj.

La rapideco de la lumo estas 300 000 km po sekundo. Ĝi venas de la Suno en 8 minutoj, de la plej proksima stelo en 4<sup>1</sup>/<sub>4</sub> jaroj.

### Horo.

La pli multaj civilizitaj landoj kalkulas la horon laŭ la meridiano de Greenwich (fama observatorio apud Londono); kelkaj konservis horon laŭ enlanda meridiano. Por havi en diversaj landoj aŭ lokoj

la horon kompare kun tiu de Greenwich oni devas adicii al ĝi aŭ subtrahi de ĝi la tempon ĉi-sube montritan:

<i>Okcident-Eŭropa horo (Greenwich)</i> . . . . .	+ 0	<i>Monta horo Amerika</i> . . . . .	- 7
Belgio, Britio (sen Irlando), Francio, Hispanio, Portugalio, Alĝerio, Tunizio.		Kanado: Alberta, Assiniboia, Athalaska, Saskatchewan.	
<i>Mez-Eŭropa horo</i> . . . . .	+ 1	Usono: Arizona, Colorado, North Dakota, South Dakota, Idaho, Montana, New Mexico, Utah, Wyoming.	
Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Danio, Germanio, Hungario, Italio, Jugoslavio, Luksemburgo, Norvegio, Polio, Svedio, Svisio.		<i>Centra horo Amerika</i> . . . . .	- 6
<i>Orient-Eŭropa horo</i> . . . . .	+ 2	Kanado: Kawatin, Manitoba	
Bulgario, Estonio, Letonio, Rumanio, Rusio, Turkio, Egiptio, Sud-Afriko.		Usono: Alabama, Arkansas, Florida, Illinois, Indiana, Iowa, Kansas, Kentucky, Louisiana, Michigan, Minnesota, Missisipi, Missouri, Nebraska, Ohio, Tennessee, Texas, Wisconsin	- 6
Eritreo, Madagaskaro . . . . .	+ 3	Honduras	
Hindio . . . . .	+ 5.30	<i>Orienta horo Amerika</i> . . . . .	- 5
Anamo, Suda Ĉinio, Koriĉinio, Tonkino	+ 7	Kanado: New Brunswik, Ontario, Quebec, West Labrador	
Orienta Ĉinio, Filipinoj, West Aŭstralio	+ 8	Usono: North Carolina, South Carolina, Connecticut, Delaware, Georgia, Maine, Maryland, Massachusetts, New Hampshire, New Jersey, New York, Pensylvania, Rhode Island, Vermont, Virginia, West Virginia	
Japanio, Koreo . . . . .	+ 9	Panama	
South Aŭstralio . . . . .	+ 9.30	Ĉilio, Peruo	
New South Wales, Queensland, Tasmania, Victoria, Nova Gvineo	+ 10		
Nova Zelando . . . . .	+ 11.30		
Hawai . . . . .	- 10.30		
Alaska . . . . .	- 9		
<i>Pacifika horo Amerika</i> . . . . .	- 8		
British Columbia, California, Nevada, Oregon, Washington			

<i>Atlanta horo</i> . . . . .	- 4	Salvadoro . . . . .	- 5.56
Nova Scotia, Porto Riko		Nikaragvo . . . . .	- 5.45
Islando, Gvineo, Madeira, Senegalo	- 1	Kosta Riko . . . . .	- 5.36
<i>Aliaj horoj</i> (ne laŭ Greenwich)		Kubo . . . . .	- 5.29
Nederlando . . . . .	+ 0.20	Ekvadoro . . . . .	- 5.14
Grekio . . . . .	+ 1.35	Kolombio . . . . .	- 4.57
Java . . . . .	+ 7.19	Venezuelo . . . . .	- 4.28
Meksiko . . . . .	- 6.36	Argentino . . . . .	- 4.16
		Urugvajo . . . . .	- 3.45
		Brazilo . . . . .	- 2.52
		Irlando . . . . .	- 0.25

### Mezuroj kaj Pezoj.

#### Metra sistemo.

La metra sistemo estas enkondukita en Francio per leĝo de 7 aprilo 1795 kaj estas deviga de 1837. Ĝi estas nun akceptita en ĉiuj Eŭropaj ŝtatoj (krom Britio, Grekio, Rusio), en Meksiko, en la ŝtatoj de Centra kaj Suda Ameriko (krom Bolivio, Paragvajo, Venezuelo). Ĝia uzado estas laŭvola en Bolivio, Britio kaj kolonioj, Egiptio, Grekio, Japanio, Paragvajo, Rusio, Siamo, Turkio, Usono, Venezuelo.

#### Pezo:

1 tuno (t)	= 1000 kilogramoj.
1 kvintalo (kv)	= 100 kilogramoj.
1 kilogramo (kg)	= 1000 gramoj.
1 hektogramoj (hg)	= 100 gramoj.
1 dekagramoj (dag)	= 10 gramoj.
1 gramo (g)	= pezo de 1 cm <sup>3</sup> de distilita akvo je 4 <sup>o</sup> .
1 decigramoj (dg)	= 0,1 gramo.
1 centigramoj (cg)	= 0,01 gramo.
1 miligramoj (mg)	= 0,001 gramo.

#### Enhavo:

1 kilolitro (kl)	= 1000 litroj.
1 hektolitro (hl)	= 100 litroj.
1 dekalitro (dal)	= 10 litroj.
1 litro (l)	= volumeno de 1 kg da akvo = 1 dm <sup>3</sup> .
1 decilitro (dl)	= 0,1 litro.
1 centilitro (cl)	= 0,01 litro.
1 mililitro (ml)	= 0,001 litro.

#### Longo:

1 Miriametro (Mm)	= 10 000 metroj.
1 kilometro (km)	= 1 000 metroj.
1 hektometro (hm)	= 100 metroj.
1 dekametro (dam)	= 10 metroj.
1 metro (m)	= $\frac{1}{4000000}$ de la tergloba meridiano.
1 decimetro (dm)	= 0,1 metro.
1 centimetro (cm)	= 0,01 metro.
1 milimetro (mm)	= 0,001 metro.

#### Areo:

1 hektaro (ha)	= 10 000 metroj <sup>2</sup> .
1 kvadratkilometro (km <sup>2</sup> )	= 1 000 m <sup>2</sup> .
1 aro (a)	= 100 m <sup>2</sup> .
1 centiaro (ca)	} = 1 m <sup>2</sup>
1 kvadratmetro	

## Aliaj mezuroj kaj pezoj.

<i>Britaj:</i>		<i>Rusaj:</i>	
Inĉo . . . . .	= 0,025 m.	Colo . . . . .	= 0,025 m.
Futo . . . . .	= 0,305 m.	Verŝoko . . . . .	= 0,043 m.
Jardo . . . . .	= 0,914 m.	Futo . . . . .	= 0,304 m.
Mejlo . . . . .	= 1609 m.	Arŝino . . . . .	= 0,711 m.
Perĉo . . . . .	= 22,293 m <sup>2</sup> .	Versto . . . . .	= 1066 m.
Akro . . . . .	= 4046 m <sup>2</sup> .	Deciatino . . . . .	= 1,09 ha.
Galono . . . . .	= 4,54 l.	Vedro . . . . .	= 12,29 l.
Buŝelo . . . . .	= 36,37 l.	Funto . . . . .	= 409 g.
Unco . . . . .	= 28,35 g.	Pudo . . . . .	= 16,380 kg.
Pundo . . . . .	= 453,59 g.		

## Diversaj unuoj.

Maraj: *Mejlo* ( $\frac{1}{60}$  de grado) = 1852 m. — *Nodo* ( $\frac{1}{120}$  de mejlo) = 15,435 m. — *Klaffo* = 1,624 m. (Brita 1,829 m).

La nombro de la nodoj mezurataj en 30 sekundoj respondas al la pohora rapideco esprimata per mejloj. Ekz.: 25 nodoj en 30 sekundoj montras rapidecon de 25 mejloj hore (= 46,300 km).

La interna ŝipvolumeno, utila por transportado de komercaĵoj, estas mezurata per la internacia komerca tuno = 2,830 m<sup>3</sup>.

Por militŝipoj oni kalkulas la pezon per *metraj tunoj* da 1000 kg en Francio aŭ per tunoj da 1016 kg en Brita Imperio kaj aliaj landoj.

Teknikaj: 1 *kalorio* estas la varmokvanto necesa por varmigi 1 kg da akvo de 0° ĝis 1° C.

1 *atmosferpremo* estas egala al la premo de hidrarga kolono alta 760 mm (meza barometra stato ĉe la maro) = la premo de 1,033 kg sur 1 cm<sup>2</sup>.

1 *kilogrametro* estas la potenco necesa por levi 1 kg ĝis 1 m.

1 *ĉevalforto* (HP, t. e. *horse power* Angle) estas la potenco necesa por levi 75 kg ĝis 1 m dum 1 sekundo.

1 *ohmo* estas la elektra kondukrezisto, kiun produktas kolono de hidrargo longa 106,3 cm kaj ampleksa 1 mm<sup>2</sup> je 0° C.

1 *ampero* (unu de elektra fluforto) estas signata de la neŝanĝebla elektra fluo, kiu pasante tra akva solvaĵo de arĝentnitrato precipitas en 1 sekundo 0,001118 g da arĝento.

1 *volto* estas la elektromotora forto de fluo, kiu produktas 1 amperon je rezisto de 1 ohmo.

1 *wato* estas la potenco produktata de elektra forto je tensio de 1 volto kaj je fluforto de 1 ampero en 1 sekundo. 1 wato =  $\frac{1}{736}$  de ĉevalforto aŭ potenco necesa por levi 102 g ĝis 1 m dum 1 sekundo. 1 kilowato = 1000 watoj = 1,36 ĉevalforto.

## Temperaturo.

## Termometro.

La temperaturon oni mezuras per termometro. Tri skaloj estas uzataj:

*Centigrado*, ankaŭ nomata *Celsius* (C), laŭ la Sveda astronomo, kiu ĝin diskonigis en la plej multaj Eŭropaj landoj. La spaco inter la glaciiga kaj vaporiga punkto de l'akvo estas dividata je 100 gradoj.

*Réaumur* (R), laŭ la nomo de la Franca fizikisto ĝin elpensinta. La spaco inter la glaciiga kaj vaporiga punkto de l'akvo estas dividata je 80 gradoj. Tiu skalo estas ankoraŭ uzata en Francio. Por transformi temperaturon esprimitan per Réaumur-gradoj en centigraĵojn, oni multiplikas ĝin per 5 kaj dividas la produkton per 4.

*Fahrenheit* (F), laŭ la nomo de la Germana natursciencisto ĝin elpensinta. La spaco inter la glaciiga kaj vaporiga punkto de l'akvo estas dividata je 180 gradoj. En tiu skalo, la glaciiga punkto estas montrata per grado 32<sup>a</sup>, la vaporiga punkto per grado 212<sup>a</sup>. La skalo Fahrenheit estas uzata en Britaj landoj kaj en Usono. Por transformi temperaturon esprimitan per Fahrenheit-gradoj en centigraĵojn, oni subtrahas de ĝi 32 kaj multiplikas la restantan nombron per  $\frac{5}{9}$ .

## Vaporiga punkto de kelkaj likvaĵoj.

Hidrargo 357° C, linoleo 315°, fosforo 290°, terebintoleo 157°, marakvo 104°, akvo 100°, salpetracido 86°, benzino 80°, alkoholo 78°, etero 35°.

## Fandiga punkto de kelkaj substancoj.

Ŝtalo 1700—1900°, forĝofero 1300—1500°, griza ferfandaĵo 1200°, kupro 1065°, oro 1064°, blanka ferfandaĵo 1050°, arĝento 955°, zinko 419°, plumbo 322°, stano 241°, blanka vakso 68°, flava vakso 61°, glacio 0°, hidrargo — 39°.

## Homa temperaturo.

La normala homa temperaturo varias inter 36,4° kaj 37,4° C, laŭ la horoj (plej alta punkto inter 6<sup>h</sup> kaj 7<sup>h</sup> vespere). Febra stato komenciĝas je 37,5° vespere aŭ 37° matene.



Meza temperaturo de kelkaj lokoj

(Esprimita per centigradoj)

	Lati- tudo	Tempera- turo			Lati- tudo	Tempera- turo	
		Janu- aro	Julio			Janu- aro	Julio
Nova Zemblo . . . . .	72 N.	-21	6	Bagdad . . . . .	33 N.	11	34
Arhangelsk (Rusio) . . . . .	64 N.	-13	15	Tuggurt (Sahara) . . . . .	33 N.	11	36
Moskvo . . . . .	55 N.	-11	19	Kairo (Egiptio) . . . . .	30 N.	12	29
Irkutsk (Siberio) . . . . .	52 N.	-21	18	Hawai . . . . .	21 N.	21	25
Berlin . . . . .	52 N.	0	19	Mexico (2277 m) . . . . .	19 N.	12	18
London . . . . .	51 N.	3	18	Masaŭa (Ruĝa Maro) . . . . .	15 N.	26	35
Paris . . . . .	48 N.	2	18	Madras (Hindio) . . . . .	13 N.	24	31
Quebec (Kanado) . . . . .	46 N.	-11	20	Brazzaville (Kongo) . . . . .	4 N.	28	22
Bukarest . . . . .	44 N.	-3	23	Quito (2850 m) . . . . .	0	14	13
Nice (Sud-Francio) . . . . .	43 N.	8	24	Batavia (Java) . . . . .	6 S.	25	26
New-York . . . . .	40 N.	-1	23	La Paz (3650 m) . . . . .	16 S.	13	7
Peking . . . . .	39 N.	-5	26	Rio-de-Janeiro . . . . .	23 S.	25	20
San Francisco . . . . .	37 N.	9	14	Cape town (Sud.-Afri- ko) . . . . .	34 S.	21	12
Alger . . . . .	36 N.	12	25	Auckland (Nov-Ze- lando) . . . . .	36 S.	19	11
Tokio . . . . .	36 N.	2	25				
Madeira . . . . .	33 N.	15	23				

La plej altaj montoj.

Eŭropo. — *Kaukazo*: Elbruz 5629 m. — *Alpoj*: Monto-Blanka 4810 m. — *Pireneoj*: Maladetto 3404 m. — *Hispanaj montoj*: Cerro de Mulhacen 3481 m. — *Siciliaj montoj*: Etna 3313 m. — *Balkanoj*: Muss Alla 2936 m. — *Apeninoj*: Gran Sasso 2921 m. — *Korsiko*: Cinto 2710 m. — *Karpatoj*: Gerlsdorfpinto, Tatra 2663 m. — *Skandinavaj Alpoj*: Galdhøpiggen 2561 m. — *Centra montaro Franca*: Mont-Dore 1886 m. — *Jura*: Crêt de la Neige 1723 m. — *Ural*: Tel-Pos-Is 1688 m. — *Bohemaj kaj Saksaj montoj*: Schneekoppe, Riesen-G., 1605 m. — *Vogesoj*: Ballon de Guebwiller 1426 m. — *Skotlando*: Ben Nevis 1343 m.

Azio. — *Montaro de Centro Azio*: Everest 8840 m. — *Elburz*: Demavend 5670 m. — *Armenaj montoj*: Ararat 5160 m. — *Kamĉatka*: Kliučevsk 4916 m. — *Borneo*: Kinibalu 4175 m. — *Taurus*: Erdšias 3960 m. — *Japanaj montoj*: Fuzi-Yama 3778 m. — *Libano*: Dahr-el-Khobib 3070 m. — *Arabio*: Djebel Sabor 3006 m.

Afriko. — *Orienta Montaro*: Kilima Ndjaro 6010 m. — *Abisenaj montoj*: Ras Dajan 4620 m. — *Atlaso*: Tamdjurt 4600 m. — *Kamerun*: 4055 m. — *Kanarioj*: Pico de Teyde 3706 m. — *Sud-Afriko*: Champagne Castle 3650 m. — *Madagaskaro*: Tsiafajavona 2630 m.

Ameriko. — *Andoj*: Aconcagua 7040 m. — *Alaskaj Montoj*: Mac Kinley 6240 m. — *Sierra Madre*: Orizaba 5550 m. — *Sierra Nevada*: Whitney 4540 m. — *Alleghany*: Black Dome 2044 m. — *Rokaj Montoj*: Massive 4396 m.

Aŭstralazio. — *Hawai*: Maūna Kea 4208 m. — *Nov-Zelando*: Cook 3768 m. — *Aŭstraliaj Alpoj*: Townsend 2241 m.

*La plej altaj loĝataj urboj* estas en Azio Kursok 4541 m, L'hasa (Tibeto) 3630 m, en Nord-Ameriko observatorio Lincoln 4360 m, en Sud-Ameriko, Tacora 4344 m, urboj Potosi 3960 m, La Paz 3694 m, Quito 2350 m, en Eŭropo la hospico St Bernard (Svisaj Alpoj) 2472 m.

La plej grandaj marprofundoj.

Atlantiko: 8530 m. — Mediteraneo 4404 m. — Nigra Maro: 2240 m. — Norda Maro: 347 m. — Manĉo [Kanal] 110 m. — Antilia Maro: 5200 m. — Hinda Oceano: 5911 m. — Granda Oceano: 9425 m.

La plej longaj riveroj.

Eŭropo. — *Al Glacia Oceano*: Peĉora 1490 km, Dvina 1140 km. — *Al Balta Maro*: Vistulo 1050 km, Dvina 960 km, Oder 870 m. — *Al Norda Maro*: Rejno 1223 km, Elbe 1100 km, Meuse [Maas] 950 km, Weser 712 km. — *Al Atlanta Oceano*: Loire 1020 km, Tajō 1006 km, Douro 850 km, Guadiana 806 km, Seine 776 km, Garonne 650 km. —



*Al Mediteraneo*: Rhône 812 km, Ebro 800 km, Po 675 km. — *Al Nigra Maro*: Danubo 2800 km, Don 2106 km, Dnjepr 1950 km, Dnjestr 1200 km. — *Al Kaspia Maro*: Volga 3395 km.

**Azio.** — *Al Glacia Oceano*: Jenisejsk 5500 km, Lena 4400 km, Ob 4100 km. — *Al Granda Oceano*: Jang-Tse 5200 km, Hoang Ho 4700 km, Mekong 4200 km, Amur 4000 km. — *Al Hinda Oceano*: Gango 3000 km, Indus 2900 km, Eŭfrato 2900 km.

**Afriko.** — *Al Mediteraneo*: Nilo 6400 km. — *Al Atlanta Oceano*: Kongo 4700 km, Niger 4200 km, Senegalo 1800 km. — *Al Hinda Oceano*: Zambezo 2700 km.

**Ameriko.** — *Al Glacia Oceano*: Mackensie 4000 km. — *Al Granda Oceano*: Yucon 3300 km, Columbia 2100 km. — *Al Atlanta Oceano*. En Nord-Ameriko: Mississipi-Missouri 7200 km, Saint-Laurent 3700 km, Arkansas 3400 km. En Sud-Ameriko: Amazonas 5500 km, Plata 4000 km, Madeira 3500 km, Purus 3000 km, Tocantius 2700 km, Orinoco 2500 km.

**Aŭstralazio.** — Murray 1800 km, Darling 1800 km.

La plej longa rivero en la tuta mondo estas *Mississipi* kun *Missouri* 7200 km. Poste venas *Nilo* 6400 km, *Amazonas* 5500 km, *Jenisejsk* 5500 km.

### La plej grandaj lagoj.

**Eŭropo.** — Ladoga 18130 km<sup>2</sup>, Onega 9750 km<sup>2</sup>, Peipus 3510 km<sup>2</sup>, Vener 6240 km<sup>2</sup>, Vetter 1960 km<sup>2</sup>, Mälär 1690 km<sup>2</sup>, Balaton (Hungar) 690 km<sup>2</sup>, Geneva 580 km<sup>2</sup>, Bodensee [Konstanz] 540 km<sup>2</sup>.

**Azio.** — Aral 67770 km<sup>2</sup>, Bajkal 31400 km<sup>2</sup>, Issik Kul 5780 km<sup>2</sup>, Van 3690 km<sup>2</sup>.

**Afriko.** — Victoria 83300 km<sup>2</sup>, Tanganyika 32600 km<sup>2</sup>, Nyassa 26500 km<sup>2</sup>, Albert 20000 km<sup>2</sup>, Banguelo 20000 km<sup>2</sup>, Ĉad [Tchad] 16300 km<sup>2</sup>.

**Ameriko.** — Supera 83000 km<sup>2</sup>, Huron 60300 km<sup>2</sup>, Michigan 52000 km<sup>2</sup>, Granda Lago de l'Ursoj 36000 km<sup>2</sup>, Granda Lago de Sklavoj

26000 km<sup>2</sup>, Erie 24000 km<sup>2</sup>, Winnipeg 22000 km<sup>2</sup>, Ontario 18700 km<sup>2</sup>, Nicaragua 15900 km<sup>2</sup>, Titicaca (Sud-Ameriko) 8400 km<sup>2</sup>.

La plej grandaj lagoj en la mondo (Victoria kaj Supera Lago) havas areon duoble pli vastan ol Nederlando.

### La plej loĝataj urboj.

Ekzistas en la tuta mondo 371 urboj kun pli ol 100000 loĝantoj. El ili 180 estas en Eŭropo (47 en Germanio, 44 en Britio, 16 en Francio, 16 en Italio), 95 en Ameriko (66 en Usono), 83 en Azio (29 en Hindio, 16 en Ĉinio, 14 en Japanio), 7 en Afriko, 6 en Aŭstralazio.

Estas 22 urboj kun pli ol unu miliono da loĝantoj, nome (por Eŭropo la ciferoj estas antaŭmilitaj):

London* . . . . .	7,5	Osaka (Japan) . . . . .	1,5
New York . . . . .	5,6	Han-Keŭ (Ĉin.) . . . . .	1,4
Paris* . . . . .	4,0	Calcutta . . . . .	1,2
Berlin* . . . . .	3,5	Konstantinoplo . . . . .	1,2
Chicago . . . . .	2,5	Rio-de Janeiro . . . . .	1,2
Petrograd . . . . .	2,3	Glasgow . . . . .	1,1
Tokio . . . . .	2,2	Hamburg . . . . .	1,0
Wien . . . . .	2,0	Budapest . . . . .	1,0
Moskvo . . . . .	1,8	Varsovio . . . . .	1,0
Philadelphia . . . . .	1,7	Bombay . . . . .	1,0
Buenos Aires . . . . .	1,6	Kanton (Ĉin.) . . . . .	1,0

\* Kun la ĉirkaŭaj antaŭurboj.

### Areo kaj loĝantaro de la diversaj landoj.

Ni donas ĉi-sube la areon, loĝantaron kaj densecon de la diversaj landoj en la mondo. Ni atentigas, ke pri multaj Eŭropaj ŝtatoj la ciferoj estas nur proksimumaj, ĉar la limoj ne estas ankoraŭ ĉie fiksitaj kaj popolalkulado ne okazis dum aŭ post la milito. En la proksimaj eldonoj ni korektos la ciferojn laŭ la novaj oficialaj informoj.

### Kontinentoj.

	Areo (per miloj da km <sup>2</sup> )	Loĝantaro (per milionoj)	Denseco (po km <sup>2</sup> )		Areo (per miloj da km <sup>2</sup> )	Loĝantaro (per milionoj)	Denseco (po km <sup>2</sup> )
<i>Eŭropo</i> . . . . .	9898	450,0	45	<i>Ameriko</i> . . . . .	39020	185,0	4
<i>Azio</i> . . . . .	44193	920,0	28	<i>Aŭstralazio</i> . . . . .	8960	7,0	0,8
<i>Afriko</i> . . . . .	30781	150,0	5	<i>Tutmondo</i> . . . . .	132852	1712,0	13

### Eŭropo.

	Areo (per miloj da km <sup>2</sup> )	Loĝantaro (per milionoj)	Denseco (po km <sup>2</sup> )		Areo (per miloj da km <sup>2</sup> )	Loĝantaro (per milionoj)	Denseco (po km <sup>2</sup> )
Albanio . . . . .	28	0,850	30	Italio . . . . .	300	37,0	123
Aŭstrio . . . . .	90	6,0	66	Jugoslavio . . . . .	250	16,0	64
Belgio . . . . .	30	7,5	257	Letonio (Latvio) . . . . .	90	3,0	32
Britio . . . . .	314	46,0	145	Litovio . . . . .	75	2,5	33
Bulgario . . . . .	90	4,5	50	Luksemburgo . . . . .	2,5	0,3	102
Ĉeĥoslovakio . . . . .	140	14,0	100	Nederlando . . . . .	35	6,7	197
Danio . . . . .	40	3,0	75	Norvegio . . . . .	323	2,6	8
Estonio . . . . .	20	0,5	25	Polio . . . . .	270?	25,0	92
Finnlando . . . . .	373	3,6	9	Portugaliao . . . . .	92	6,0	65
Francio . . . . .	550	40,0	74	Rumanio . . . . .	?	16,0	—
Germanio . . . . .	441	58,0	131	Rusio . . . . .	?	120,0	—
Grekio . . . . .	120?	5,0	41	Svedio . . . . .	444	5,8	13
Hispanio . . . . .	505	20,7	41	Svisio . . . . .	41	3,9	95
Hungario . . . . .	140?	10,0	71	Ukrajnio . . . . .	?	28,0	—
Sub la kontrolo de la Ligo de Nacioj:				Plebiscite decidotaj:			
Danzig . . . . .	1,9	0,350	170	Partoj de Ger-			
Saar-teritorio . . . . .	2,0	0,650	325	mana teritorio . . . . .	33	3,0	—

### Azio.

	Areo (per miloj da km <sup>2</sup> )	Loĝantaro (per milionoj)	Denseco (po km <sup>2</sup> )		Areo (per miloj da km <sup>2</sup> )	Loĝantaro (per milionoj)	Denseco (po km <sup>2</sup> )
<i>Sendependaj ŝtatoj:</i>				<i>Francoj</i> . . . . .	803	17,5	—
Afganistano . . . . .	558	4,8	7	[Anamo . . . . .	155	5,5	—
Ĉinio . . . . .	11138	330,0	30	[Košimĉinio . . . . .	59	3,0	—
Georgio . . . . .	—	3,5	—	[Tonkino . . . . .	119	6,5	—
Japanio . . . . .	673	79,0	117	<i>Nederlandaj</i> . . . . .	1915	48,0	25
Nepalo . . . . .	140	5,0	36	[Java . . . . .	131	36,0	274
Omano . . . . .	192	0,5	2	<i>Portugalaj</i> . . . . .	23	0,8	4
Persio . . . . .	1645	10,0	6	<i>Rusaj</i> . . . . .	16153	24,0	1
Siamo . . . . .	600	9,0	15	[Centra Azio . . . . .	3488	11,0	—
<i>Eŭropaj pose- daĵoj:</i>				[Siberio . . . . .	12400	10,0	—
<i>Britaj</i> . . . . .	5287	325,0	60	<i>Usonaj</i> (Filipinoj) . . . . .	296	9,0	3
[Hindiio . . . . .	4844	316,0	65]				

Pri Arabio, Armenio, Azerbeĥano, Turkio ciferoj ne estas doneblaj, ĉar la limoj ne estas nun eĉ proksimume fiksitaj.

### Afriko.

	Areo (per miloj da km <sup>2</sup> )	Loĝantaro (per milionoj)	Denseco (po km <sup>2</sup> )		Areo (per miloj da km <sup>2</sup> )	Loĝantaro (per milionoj)	Denseco (po km <sup>2</sup> )
<i>Sendependaj ŝtatoj:</i>				<i>Britaj</i> . . . . .	9092	54,0	5
Abisenio . . . . .	1120	10,0	9	[Egiptio . . . . .	916	12,5	14
Liberio . . . . .	95	1,5	15	[Sud-Afriko . . . . .	1225	6,0	5
<i>Eŭropaj pose- daĵoj:</i>				<i>Francaj</i> . . . . .	9203	32,0	3
<i>Belgaj</i> (Kongo) . . . . .	2365	12,5	5	[Alĝerio . . . . .	575	5,5	10
				[Maroko . . . . .	420	4,0	10
				[Tunizio . . . . .	120	2,0	16
				<i>Italaj</i> . . . . .	1633	1,7	1
				<i>Portugalaj</i> . . . . .	2057	8,5	4

## Ameriko.

	Areo (per miloj da km <sup>2</sup> )	Loĝantaro (per milionoj)	Denseco (po km <sup>2</sup> )		Areo (per miloj da km <sup>2</sup> )	Loĝantaro (per milionoj)	Denseco (po km <sup>2</sup> )
Argentino . . . .	2987	9,3	3	Panamo . . . . .	86	0,750	9
Bolivio . . . . .	1333	3,0	2	Paragvajo . . . . .	253	1,0	4
Brazilo . . . . .	8526	26,5	3	Peruo . . . . .	1 382	6,0	4
Ĉilo . . . . .	750	4,0	5	Salvadoro . . . . .	34	1,3	38
Dominiko . . . . .	48	0,8	15	Urugvajo . . . . .	187	1,5	7
Ekvadoro . . . . .	300	3,0	6	Usono . . . . .	9 595	102,0	10
Gvatemalo . . . . .	113	2,2	17	Venezuelo . . . . .	1 020	3,0	3
Haitio . . . . .	28	2,5	72	<i>Eŭropaj pose- daĵoj:</i>			
Honduras . . . . .	115	0,6	5	<i>Britaj</i> . . . . .	10 497	10,8	10
Kosta-Riko . . . . .	48	0,5	10	[ <i>Kanado</i> . . . . .	9 659	8,5	9]
Kolombio . . . . .	1206	7,0	6	<i>Francaj</i> . . . . .	91	0,450	5
Kubo . . . . .	166	2,6	15	<i>Nederlandaj</i> . . . . .	129	0,180	1
Meksiko . . . . .	1987	26,0	8				
Nikaragvo . . . . .	128	0,7	6				

## Aŭstralazio.

	Areo (per miloj da km <sup>2</sup> )	Loĝantaro (per milionoj)	Denseco (po km <sup>2</sup> )		Areo (per miloj da km <sup>2</sup> )	Loĝantaro (per milionoj)	Denseco (po km <sup>2</sup> )
<i>Eŭropaj pose- daĵoj:</i>				[Nov-Zelando . . . . .	271	1,1	4]
<i>Britaj</i> . . . . .	8267	6,5	1,0	<i>Francaj</i> . . . . .	22	0,086	4
[ <i>Aŭstralio</i> . . . . .	7701	4,8	0,6]	<i>Usonoj</i> (Hawaiĵ) . . . . .	17	0,3	2

*Rimarkoj:* La areo de Eŭropo estas 18, tiu de Ameriko 70 pli granda ol la areo de Francio. Se Ameriko havus la saman loĝantaro-densecon kiel Eŭropo, ĝi havus 1800 milionojn da loĝantoj, t. e. tiom multe kiom nun la tuta mondo. Se ili havus la saman densecon kiel

Francio Usono kalkulus 750, Brazilo 650, Argentino 220 milionojn da loĝantoj. Inverse, se Eŭropo havus la saman densecon kiel Brazilo, ĝi havus nur 30 milionojn da loĝantoj (anstataŭ 450), Francio 1<sup>1</sup>/<sub>2</sub> milionojn, Svisio 120 000.

## Rasoj kaj religioj.

**Rasoj.** — Blankuloj: 1100 milionoj. Flavuloj: 500 milionoj. Nigrujoj: 100 milionoj.

**Religioj.** — *Kristanoj:* 620 milionoj. (Katolikoj: 310; Protestantoj: 180; Ortodoksaj kaj orientaj eklezioj: 130.) — *Izraelidoj:* 12 milionoj. — *Mohamedanoj:* 220 milionoj. — *Brahmanoj:* 220 milionoj. — *Konfucianoj:* 250 milionoj. — *Taoistoj kaj ŝintoistoj:* 60 milionoj. — *Idolanoj:* 150 milionoj.

## La lingvoj en la mondo.

**Dividoj:** La lingvistoj dividas la lingvojn laŭ tri grandaj grupoj: monosilabaj, aglutinaj, fleksiaj.

*Monosilabaj* estas la lingvoj, en kiuj ĉiu vorto havas nur unu silabon. En ili, la frazelementoj estas difinitaj ne laŭ ŝanĝoj en la formo de vorto, sed laŭ la loko, kiun ĉiu el ili okupas rilate al la aliaj. La ĉefaj monosilabaj lingvoj estas la Ĉina kaj ĝiaj multaj dialektoj, la lingvoj de Tibeto, Himalajo, Anamo, Siamo, Kamboĝo, ktp.

*Aglutinaj* estas la lingvoj, en kiuj la ĉefaj elementoj de la parolo havas propran signifon, kaj estas kompletigataj per afiksoj, kiuj agluigas al ili kaj modifas la sencon. Aglutinaj estas la lingvoj Japana, Korea, Malaja, Polineziaj, Mongolaj, Kalmuka, Kirgiza, Ĉerkesa, Turka, Hungara, Finna, Lapona, ktp., kiel ankaŭ la Afrikanaj kaj Amerikanaj indiĝenaj lingvoj.

*Fleksiaj* estas la lingvoj, kies elementoj modifiĝas, eĉ la radikoj. Oni dividas ilin jene:

- 1<sup>e</sup> Ĥamidaj lingvoj (Kopta, Kabila, Tuarega, Etiopa, ktp.).
- 2<sup>e</sup> Semidaj lingvoj (Hebrea, Siriaka, Araba).
- 3<sup>e</sup> Hindu-Eŭropaj lingvoj, subdividatoj jene:

### A. Eŭropa branĉo:

- a) Helena familio: Greka lingvo.
- b) Latina familio: Latina, Itala, Franca. Provenca, Hispana, Kataluna, Portugala, Romanĉa, Rumana, ktp.

- c) Kelta familio: Galla, Bretona, Kimra, Gaela, Irlanda, k. a.  
 d) Germana familio: Gotika, Dana, Islanda, Norvega, Sveda; Angla; Frislanda; Malalt-Germana, Holanda, Flandra; Alt-Germana, Germana.  
 e) Slava familio: Rusa; Slavona, Bulgara; Serba; Ĉeĥa, Slovaka, Kaĉuba; Pola.  
 f) Letona familio: Lëtona, Litova.  
 g) Albana familio: Iliria, Albana.

**B. Azia branĉo:**

- a) Hinda familio: Sanskrita, Prakrita, Hindaj modernaj lingvoj (Hindia, Hindustania, Bengalio, ktp.).  
 b) Irana familio: Persa, Kurda, Osseta, Afgana, ktp.  
 c) Armena familio: Armena, Georga, ktp.

**Statistiko.** — La ciferoj pri la disvastiĝo de la diversaj lingvoj estas nur proksimumaj. La statistikon malfaciligas la fakto, ke en landoj havantaj nur unu oficialan lingvon (ekzemple, la diversaj Amerikaj ŝtatoj), multaj elmigrintoj Eŭropaj aŭ Aziaj ankoraŭ uzas sian hejman lingvon kaj nur kiel helpkunprenigilon la enlandan lingvon. Aliparte, lingvoj Aziaj havantaj literaturan unuecon (ekzemple, la Ĉina, la Araba) estas parolataj laŭ diversaj dialektoj, tiel ke reciproka sinkomprenado inter diversregionaj samlingvaj nekleruloj estas malfacila aŭ eĉ nebla.

Kun la supraj rezeĵoj, jen la plej diskonataj lingvoj (ciferoj en milionoj):

<i>Ĉina</i> . . . . .	350	<i>Itala</i> (Italio, Ameriko) . . .	42
<i>Angla</i> (Britio, Usono, Kanado, Sud-Afriko, Aŭstralazio)	145	<i>Araba</i> (Arabio, Sirio, Nord-Afriko)	32
<i>Hindia</i> (Hindio)	120	<i>Portugala</i> (Portugalia, Brazilo)	30
<i>Rusa</i> (Rusio, Siberio)	100	<i>Hindustania</i> (Norda Hindio)	30
<i>Germana</i> (Germanio, Svisio, Bohemio, Baltlandoj, Ameriko)	77	<i>Javana</i> (insulo Java)	28
<i>Hispana</i> (Hispanio, latina Ameriko, krom Brazilo, Filipinoj)	65	<i>Bengalia</i> (Orienta Hindio)	26
<i>Japana</i> . . . . .	56	<i>Ukrajna</i> . . . . .	25
<i>Franca</i> (Francio, Belgio, Svisio, Kanado, Haitio)	50	<i>Bhojpuria</i> (Hindio)	20
		<i>Guzeratia</i> „	20
		<i>Telugua</i> „	20

Aliaj malpli diskoataj Eŭropaj lingvoj: *Pola*: 15 milionoj, *Serbo-Kroata*: 14, *Rumana*: 12, *Ĉeĥa*: 11, *Flandra-Holanda*: 10, *Hungara*: 10, *Turka* (kun Azio): 10, *Greka*: 7, *Sveda*: 6, *Bulgara*: 6, *Dana*: 5, *Letona*: 3, *Finna*: 3, *Litova*: 2, *Kataluna*: 2, *Albana*: 1.

La lingvoj, kiuj okupas la plej vastan teritorion, estas la Angla, la Rusa, la Hispana, la Portugala, la Ĉina, la Araba. En Eŭropo estas parolataj pli ol 25 lingvoj; kontraste aperas Ameriko, kiu, kvankam kvaroble pli vasta ol Eŭropo, havas nur tri ĉeflingvojn. Pro la kreskanta plidensiĝo de la Amerika loĝantaro, la lingvoj, kiuj verŝajne plej multe disvastiĝos, estos la Angla, la Hispana kaj la Portugala; en Azio la Rusa lingvo havas vastajn perspektivojn pro la amplekso de Siberio. Kontraŭe, la graveco de la Germana, Franca, Itala kaj malpli diskonataj Eŭropaj lingvoj kredeble malpligrandiĝos proporcie, pro manko de grava samlingva teritorio ekster Eŭropo.

**Monda komerco.**

En la suba tabelo ni indikis la ciferojn de la importoj kaj eksportoj de kelkaj landoj dum 1913 kaj 1918, tiel ke oni povas konstati la influon de la milito je la komerca movado.

Ni ne menciis ŝtatojn, kiuj tute alifirmiĝis, kiel ekzemple Aŭstrio, Bulgario, Hungario, Rumanio, Serbio, Turkio ktp., ĉar iliaj ciferoj aŭ estas ne haveblaj, aŭ neniel taŭgas por komparo. Kelkaj ŝtatoj (Belgio, Germanio, Nederlando) en la lastaj jaroj ne plu publikigis statistikon pri importoj kaj eksportoj. La ciferoj pri 1919 ne estis ankoraŭ riceveblaj en februaro.

En la venonte eldono tiuj informoj estos kompletigataj.

(La ciferoj estas en milionoj de la naciaj monvaloroj).

Lando	Monunuo	Importo		Eksporto	
		1913	1918	1913	1918
Argentino . . . . .	Peso	496	501	519	801
Belgio . . . . .	Franko	4 637	( <sup>1</sup> )	3 635	( <sup>1</sup> )
Britio . . . . .	Funto	769	1 288	525	498
Danio . . . . .	Krono	777	( <sup>1</sup> )	3 635	( <sup>1</sup> )
Francio . . . . .	Franko	8 421	19 915	6 880	4 143
Germanio . . . . .	Marko	10 770	( <sup>1</sup> )	10 097	( <sup>1</sup> )
Hispanio . . . . .	Peseto	1 270	736( <sup>2</sup> )	1 056	1 290( <sup>2</sup> )
Italio . . . . .	Liro	3 646	14 107	2 512	2 484
Japanio . . . . .	Jeno	729	1 660	632	1 931
Nederlando . . . . .	Guldeno	3 918	2 111( <sup>3</sup> )	3 083	1 749( <sup>3</sup> )
Svisio . . . . .	Franko	1 919	2 401	1 376	1 963
Svedio . . . . .	Krono	847	759( <sup>2</sup> )	817	1 350( <sup>2</sup> )
Usono . . . . .	Dolaro	1 813	3 031	2 466	6 149

(<sup>1</sup>) De post 1913 ne plu publikigita. — (<sup>2</sup>) 1917. — (<sup>3</sup>) 1915.

### Ĉefaj monunuoj.

Ni citas ĉi-sube la ĉefajn monunuojn kun ilia nominala valoro kaj ilia kurzo rilate al la Svisa franko je la fino de januaro 1914, 1919 kaj 1920. Dum kaj post la milito la valutoj de la Eŭropaj militintaj ŝtatoj grave malplialtiĝis kompare kun tiuj de la neŭtralaj landoj.

Lando	Monunuo	Valoro en Svisaj frankoj			
		Nominala valoro	31. jan. 1914	31. jan. 1919	31. jan. 1920
Argentino . .	Peso (= 100 centavoj)	2,20 <sup>(1)</sup>	2,20	2,21	2,45
Aŭstrio . . .	Krono (= 100 heleroj)	1,05	1,05	0,29	0,02 <sup>5</sup>
Belgio . . . .	Franko (= 100 centimoj)	1,—	1,—	0,87	0,42
Brazilo . . . .	Milreĵso (= 1000 reĵsoj)	2,83	1,60	1,28	1,37
Britio . . . .	Funto (= 20 ŝilingoj)	25,22	25,18	23,40	19,85
Bulgario . . .	Levo (= 100 stotinki)	1,—	1,—	—	0,11
Ĉeĥoslovakio	Krono (= heleroj)	<sup>(2)</sup>	<sup>(2)</sup>	<sup>(2)</sup>	0,06
Ĉinio . . . .	Taelo (= 1000 cash.)	7,54	3,40	4,68	8,40
Danio . . . .	Krono (= 100 oeroj)	1,40	1,38	1,28	0,95
Finnlando . .	Marko (= 100 penni)	1,—	1,—	—	0,15
Francio . . . .	Francio (= 100 centimoj)	1,—	1,—	0,90	0,43
Germanio . . .	Marko (= 100 pfenigoj)	1,24	1,23	0,58	0,07 <sup>2</sup>
Grekio . . . .	Drahmo (= 100 lepta)	1,—	1,—	0,96	0,74 <sup>5</sup>
Hispanio . . .	Peseto (= 100 centimoj)	1,—	0,94	0,99	1,04
Hungario . . .	Krono (= 100 filler)	<sup>(2)</sup>	<sup>(2)</sup>	<sup>(2)</sup>	2,35
Italio . . . .	Liro (= 100 centimoj)	1,—	1,—	0,77	0,26
Japanio . . . .	Jeno (= 100 ŝenoj)	2,55	2,55	2,53	2,75
Jugoslavio . .	Krono <sup>(4)</sup> (= 100 heleroj)	<sup>(2)</sup>	<sup>(2)</sup>	<sup>(2)</sup>	0,05 <sup>2</sup>
Meksiko . . . .	Peso (= 100 centavoj)	5,44	—	3,83	—
Nederlando . .	Guldeno (= 100 cendoj)	2,10	2,09	2,03	2,16
Norvegio . . .	Krono (= 100 oeroj)	1,40	1,38	1,36	1,00 <sup>5</sup>
Polio . . . .	Marko (= 100 )	<sup>(3)</sup>	<sup>(3)</sup>	—	0,04 <sup>4</sup>
Portugaliao . .	Eskudo (= 100 centavoj)	5,60	4,85	3,41	1,50
Rumanio . . .	Levo (= 100 bani)	1,—	0,98	0,43	0,09 <sup>5</sup>
Rusio . . . .	Rublo (= 100 kopekoj)	2,67	2,64	0,50	0,08
Svedio . . . .	Krono (= 100 oeroj)	1,40	1,38	1,38	1,10
Usono . . . .	Dolaro (= 100 cendoj)	5,18	5,18	4,92	5,56

<sup>(1)</sup> Papero. — <sup>(2)</sup> Sama mono kiel Aŭstrio. — <sup>(3)</sup> Sama mono kiel Rusio. — <sup>(4)</sup> En Serbio, 1 dinaro = 100 para.

Aliaj monunuoj. — *Brita Imperio*: 1 funto (Sterl.) = 20 ŝilingoj (s.) — 1 ŝilingo = 12 pencoj aŭ denieroj (d). (Ekz.: 2 Sterl. 3 s. 4 d = 2 funtoj 3 ŝilingoj 4 pencoj). — Kiel mallongigon por ŝilingo oni ofte uzas la signon. (Ekz.:  $\frac{4}{3}$  = 4 ŝilingoj 3 pencoj). — Aliaj Britaj monnomoj: 1 Guineo = 21 ŝilingoj. — 1 Crown = 5 ŝilingoj. — 1 Double Florin = 4 ŝilingoj. — 1 Half Crown = 2 ŝilingoj 6 pencoj. — 1 Florin = 2 ŝilingoj. — 1 Farthing =  $\frac{1}{4}$  penco.

*Kanado* uzas la saman monsystemon kiel Usono (Dolaro.)

*Egiptio*: 1 funto (nominale 25,61 Fr.) = 100 piastroj.

*Hindio*: 1 rupio (nominale 2,38 Fr.) = 16 anna. — 1 sovereign = 15 rupioj. — En insuloj *Ceĵono* kaj *Maurico*, en *Orienta Afriko*, 1 rupio = 100 cendoj.

*Persio*: 1 Krano (nominale Fr. 0,90) = 20 ĉahi = 100 dinaroj.

*Siamo*: 1 tikal (nominale Fr. 1,94) = 4 salung = 100 satang.

*Turkio*: 1 funto (nominale 22,78 Fr.) = 100 piastroj, 1 piastro = 40 para.

*Ameriko*: Pri *Argentino*, *Brazilo*, *Meksiko* kaj *Usono*, vidu la supran tabelon.

*Bolivio*: 1 boliviano (nominale 2,10 Fr.) = 100 centavos.

*Ĉilo*: 1 peso " 1,89 " = 100 "

*Dominiko*: 1 dolaro " 5,18 " = 100 "

*Ekvadoro*: 1 condor " 25,22 " = 1000 "

*Gvatemalo*: 1 peso " 5,— " = 100 "

*Haitio*: 1 gurdo " 5,— " = 100 centimoj.

*Honduraso*: 1 peso " 5,— " = 100 centavos.

*Kolombio*: 1 peso " 5,04 " = 100 "

*Kosta-Riko*: 1 colon " 2,41 " = 100 "

*Kubo*: 1 piastro " 5,18 " = 100 "

*Nikaragvo*: 1 peso " 5,— " = 100 "

*Panamo*: 1 balboa " 5,18 " = 100 "

*Paragvajo*: 1 peso " 5,— " = 100 "

*Peruo*: 1 libra " 25,22 " = 10 soles (1 sol = 100 centavos)

*Salvadoro*: 1 peso " 5,— " = 100 centavos.



*Urugvajo*: 1 peso (nominale 5,36 Fr.) = 100 „

*Venezuelo*: 1 bolivar „ 1,— „ = 100 centimos.

Por la plimultaj landoj de Centra kaj Suda Ameriko, ekzistas granda diferenco inter la nominala valoro de la ora monunuo kaj la borsa valoro de la papera monunuo.

### Monda ŝiparo.

Laŭ la Brita *Lloyd's Register*, la monda ŝiparo, kalkulis, en junio 1919, 47897000 tunojn (anstataŭ 45404000 en junio 1914). Malgraŭ la milito ĝi do ne malkreskis, sed kompreneble sen ĝi la kresko estus multe pli grava. Oni kalkulas, ke laŭ normala progreso la monda ŝiparo, sen la milito, atingus 55370000 tunojn.

Dispartigo laŭ la landoj:

Landoj	ciferoj en miloj da tunoj			Landoj	ciferoj en miloj da tunoj		
	Junio 1914	Junio 1919	diferenco		Junio 1914	Junio 1919	diferenco
Brita Imperio	20 524	18 208	- 2316	Nederlando .	1 472	1 574	+ 102
Usono (mar-ŝipoj) . . .	2 027	9 773	+ 7746	Italio . . .	1 430	1 238	- 192
Usono lagŝipoj . . . . .	2 260	2 160	- 100	Svedio . . .	1 015	917	- 98
Germanio 1)	5 135	3 247	- 1888	Hispanio . .	884	709	- 175
Japanio . . .	1 708	2 325	+ 617	Danio . . . .	770	631	- 139
Francio . . .	1 922	1 962	+ 40	Grekio . . .	821	291	- 530
Norvegio . .	1 957	1 597	- 360	Aliaj landoj	3 479	3 265	- 214
				Tutmondo . .	45 404	47 897	+ 2493

1) Kun la ŝipoj liverotaj laŭ la pacotraktato.

### Fervojaj komunikoj.

Ni donas ĉi-sube informojn pri la longeco de la fervojaro en ĉiu kontinento kaj en kelkaj landoj. (Statistiko pri la novaj orientaj ŝtatoj de Eŭropo ne estas ankoraŭ haveblaj). Por ke oni povu kom-

pari la fervojaran densecon en la cititaj landoj, ni notis ankaŭ la nombron de km po 100 km<sup>2</sup> kaj po 10000 loĝantoj.

	Longeco per km	Kilometroj po			Longeco per km	Kilometroj po	
		100 km <sup>2</sup>	10000 loĝ.			100 km <sup>2</sup>	10000 loĝ.
Eŭropo . . .	346 235	3,5	8	Svedio . . .	14 491	3	26,5
Azio . . . .	108 147	0,2	1	Svisio . . . .	4 863	12	14
Afriko . . .	44 309	0,1	3	<i>Azio</i>			
Ameriko . .	570 108	1,4	30	Ĉinio . . . .	9 854	0,09	0,3
Aŭstralazio	35 418	0,4	50	Hindio . . . .	55 761	1	1,8
Tutmondo .	1 104 217	0,8	6	Japanio . . . .	10 986	1,7	1,7
<i>Eŭropo</i>				<i>Afriko</i>			
Belgio . . .	8 814	30	12	Alĝerio - Tunizio . . . .	6 382	0,7	9,5
Bulgario . .	1 931	2	4,5	Egiptio . . . .	5 946	0,6	5,5
Britio . . . .	37 717	12	8	Sud-Afriko . .	17 628	1,5	34
Danio . . . .	3 771	10	15	<i>Ameriko</i>			
Francio . . .	53 360	9,5	13	Argentino . .	33 215	1,2	68
Germanio . .	51 932	12	9	Brazilo . . . .	24 985	0,3	10
Grekio . . .	1 609	2,5	6	Ĉilo . . . . .	6 370	0,8	19
Hispanio . .	15 350	3	8	Kanado . . . .	47 150	0,5	60
Italio . . . .	17 634	6	5	Meksiko . . . .	25 492	1,3	17,5
Nederlando .	3 256	10	6	Usono . . . . .	410 918	4,4	42
Norvegio . .	3 092	1	13				
Portugalio .	2 983	3	5,5				

### Poŝtaj komunikoj.

Laŭ antaŭmilita statistiko, ekzistis en la tuta mondo ĉirkaŭ 300000 poŝtoŝtancoj kun entute 1500000 oficistoj. La nombro de la korespondadoj jare sumis 28 miliardojn, la pakadoj 700 milionojn, la interŝanĝitaj valoroj 80 miliardojn da frankoj. La longeco de la telegrafaj linioj atingis 1639958 km; 2600 submaraj kabloj, longeco 500000 km.

Laŭ statistiko liverita de la Oficejo de Universala Poŝta Unuiĝo ni donas ĉi-sube informojn pri la dispartigo de la poŝtoŝtancoj en

diversaj landoj. (Statistikoj pri la novaj orientaj ŝtatoj de Eŭropo ne estas ankoraŭ haveblaj).

Landoj	Numero de		Numero de telefonilo	Landoj	Numero de		Numero de telefonilo
	km <sup>2</sup> poŝtoŝtifejoj	loĝantoj poŝtoŝtifejoj			km <sup>2</sup> poŝtoŝtifejoj	loĝantoj poŝtoŝtifejoj	
<i>Eŭropo</i>				Japanio . . .	60	7 903	250
Belgio . . . .	17	4 390	130	Persio . . . .	10 544	57 692	
Bulgario . . .	45	1 916	1 380	<i>Afriko</i>			
Britio . . . .	12	1 887	59	Alĝerio . . . .	842	8 146	647
Danio . . . .	34	2 378	23	Egiptio . . . .	472	5 877	722
Francio . . . .	36	2 699	115	Sud-Afriko . .	456	2 328	210
Germanio . . .	13	1 569	43	<i>Ameriko</i>			
Grekio . . . .	87	3 500	2 260	Argentino . .	1 013	2 442	100
Hispanio . . .	77	3 064	570	Brazilo . . . .	2 366	7 360	2 300
Hungario . . .	54	3 509	238	Ĉilo . . . . .	791	3 871	228
Italio . . . . .	25	3 216	350	Kanado . . . .	738	653	16
Nederlando . .	21	4 053	78	Meksiko . . . .	662	5 300	625
Norvegio . . .	92	705	28	Urugvajo . . .	194	1 334	160
Portugalio . .	21	1 406		Usono . . . . .	165	1 610	8
Rumanio . . . .	45	2 368	330	<i>Aŭstral-azio</i>			
Svedio . . . .	129	1 668	74	Aŭstralio . . .	905	564	40
Svisio . . . . .	10	924	35	Nov-Zelando .	117	481	24
<i>Azio</i>							
Ĉinio . . . . .	1310	38 800					
Hindio . . . . .	238	16 604	11 000				

### Internaciaj poŝtaj tarifoj.

La monunuo de Universala Poŝta Unuiĝo estas la franca franko je 100 centimoj. Al valoro de 5 centimoj (verda poŝtmarko) la poŝto egaligas: 1/2 penny, 1 cent, 20 pfennig, 10 heller, 5 oere. Al valoro de 10 centimoj (ruĝa poŝtmarko) ĝi egaligas: 1 penny, 2 cents, 40 pfennig, 40 heller, 10 oere. Al valoro de 25 centimoj (blua poŝtmarko) ĝi egaligas: 2 1/2 pence, 5 cents, 80 pfennig, 80 heller, 20 oere.

La internaciaj poŝtaj tarifoj estos plialtigataj de la konferenco de Universala Poŝta Unuiĝo, okazonta dum 1920 aŭ 1921.

*Leteroj.* — 25 centimoj por la unua dudeko da gramoj; ĉiu plia dudeko aŭ parto de ĝi 15 centimoj!

*Poŝtkartoj.* — 10 centimoj; karto kun respondkarto 20 centimoj. Neafrankitaj leteroj kaj kartoj kostas la duoblon.

*Presajfoj.* — 5 centimoj por ĉiu kvindeko da gramoj aŭ parto de ĝi; maksimuma pezo: 2 kg. Dimensioj ne superu 45 cm, laŭ iu ajn direkto. Rulajforma presaĵo ne superu diametre 10 cm, longe 75 cm.

*Aferpapiroj* (dokumentoj ne havantaj karakteron de nuna kaj persona korespondo, ekz.: aktoj, manuskriptoj, malnovaj leteroj). 5 centimoj por ĉiu kvindeko da gramoj aŭ parto de ĝi; minimuma afranko: 25 centimoj; maksimuma pezo: 4 kg. Pri dimensioj vidu sub *Presajfoj*.

*Specimenoj.* — 5 centimoj por ĉiu kvindeko da gramoj aŭ parto de ĝi; minimuma afranko: 10 centimoj; maksimuma pezo: 350 gramoj. Dimensioj ne superu longe 30, larĝe 20, dike 10 cm.

Presajfoj, aferpapiroj kaj specimenoj devas esti afrankitaj almenaŭ parte; por nesufiĉe afrankitaj spiecej sendaĵoj la ricevanto pagas la duoblon de l'mankanta afranko.

Presajfoj, aferpapiroj kaj specimenoj en havu nek leteron, nek skribitan noton, kiu posedas karakteron de vera kaj persona korespondo; ilia enhavo estu facile kontrolebla.

*Respondkuponoj.* — Ŝanĝvaloro: 25 centimoj (afranko de internacia letero). Nuntempĉ ili estas aĉeteblaj kaj ŝanĝeblaj en ĉiuj Eŭropaj landoj (escepte Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Rusio kaj la nove fondiĝintaj ŝtatoj, krom Finnlando), en Britaj, Belgaj, Danaj, Francaj, Italaj kaj Nederlandaj kolonioj kaj protektoratoj, en Brazilo, Ĉilo, Haitio, Honduraso, Japanio, Kosta-Riko, Liberio, Meksiko, Siamo, Usono. Aĉetante respondkuponojn ĉe poŝtoŝtifejoj, oni ne forgesu stampigi ilin; nestampitaj respondkuponoj estas ne valorigeblaj.

*Poŝtmandatoj.* — Tarifoj kaj reguloj varias laŭ landoj; oni informiĝu ĉe poŝtoŝtifejoj.

Sur la kuponon de la mandato oni ne forgesu skribi la nomon de la sendanto kaj celon de l'pago. Por kelkaj regnoj (Brita Imperio, Rusio, Usono) tio ne estas ebla; tiuokaze estas nepre necese akompanigi ĉiun mandaton per klariga poŝtkarto. Kun la jenaj landoj la internacia poŝtmandata servo ne funkcias: Aŭstrio, Balkanaj ŝtatoj, Belgio, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Hungario, Jugoslavio, Polio, Portugalio, Rusio [inkl. la memstarigintaj ŝtatoj].

*Poŝtpakoj, rembursoj, rekvroj.* — Tarifoj kaj reguloj varias laŭ landoj; oni informiĝu ĉe poŝtoŝtifejoj.

*Telegramoj.* — Tarifoj kaj reguloj varias laŭ landoj kaj vojo traireta; oni informiĝu ĉe poŝtoŝtifejoj.

Por telegramoj Esperanto estas nur interkonsentita lingvo. Unu vorto enhavu maksimume 10 literojn. Vorto kun pli ol 10 literoj estas pagota laŭ la tarifo por cifera lingvo, t. e. ĉiu kvino da literoj aŭ parto de ĝi estas konsiderata kiel unu vorto.

**Radiotelegramoj.** — Pri tarifoj oni informiĝu ĉe poŝtoficejo. Radiotelegramoj estas sendeblaj de lando al lando, de Surmara ŝipo al lando, de lando al surmara ŝipo, de surmara ŝipo al surmara ŝipo.

### Ĉefaj internaciaj institucioj.

Dum la dua parto de la XIX<sup>a</sup> kaj komenco de la XX<sup>a</sup> jarcento kreiĝis granda nombro de internaciaj institucioj. Antaŭ la milito ekzistis ĉirkaŭ kvincent. Laŭ ilia organizo oni povas ilin dividi je: A. **Oficialaj institucioj**, kreitaj per konvencio inter la ŝtatoj kaj pagataj de ili. B. **Neoficialaj institucioj**, kreitaj per privata iniciato. La monrimedojn liveras kotizaĵoj de membroj (individuoj aŭ socioj), donacoj aŭ fondaĵoj, kaj iafoje ŝtataj monhelpoj. La plej gravaj internaciaj organizaĵoj havas konstantan oficejon aŭ sekretariejon. Multaj internaciaj asocioj estas federacioj de naciaj socioj kun nacia oficejo, kiu plenumas la ĉefan laboron; la internacia sekretariejo servas kiel ligilo inter la diversnaciaj socioj, dokumentejoj kaj arkivejoj.

Pro la monda milito multaj internaciaj organizaĵoj ĉesis funkcii kaj estas reorganizotaj. Ni publikigas ĉi-sube la liston de la institucioj, pri kiuj ni scias, ke ili ankoraŭ ekzistas. Tiu listo estas nekompleta. Ni petas, ke oni bonvolu helpi al ĝia kompletigo, sendante al ni informojn pri ĉiuj notindaj *internaciaj* institucioj ne sube cititaj.

### Oficialaj internaciaj institucioj.

**Ligo de Nacioj.** — Kreita laŭ la Versailles-traktato.<sup>1)</sup> Celas eviti, ke en difinitaj okazoj oni uzu la militon, sensekretigi kaj bazi sur justeco kaj honoro la internaciajn interrilatojn, observi akuratege la interkonsentojn de internacia juro, akceptitajn de nun kiel efektivan regulon por konduto inter registaroj, estigi la justecon kaj skrupulan obeon al ĉiuj devoj de la traktatoj en la reciprokaj rilatoj de la organizitaj popoloj<sup>2)</sup>. La Ligo estas regata de *Kunsilantaro* (unu voĉo po ŝtato), de *Konsilantaro* (9 membroj, unu el Usono (?), Britio, Francio, Italio, Japanio, Belgio, Brazilo, Hispanio, Grekio), kaj de *Sekretariejo*. Sidejo en Genevo, provizore en Londono. Originaj anoj

<sup>1)</sup> Esperanta traduko de la Kontrakto kun tekstoj Angla kaj Franca ĉe Centra Oficejo Esp, 51 Rue de Clichy, Paris. Prezo: 3 Fr.

estas Usono, Belgio, Bolivio, Brazilo, Brita Imperio, Ĉeĥoslovakio, Ekvadoro, Francio, Grekio, Gvatemalo, Haitio, Hedĵaso, Hindio, Honduro, Italio, Japanio, Kubo, Liberio, Nikaragvo, Panamo, Peruo, Polio, Portugalio, Rumanio, Serbo-Kroato-Slovenio, Siamo, Urugvajo. Aliaj ŝtatoj estas aliĝontaj komence de 1920.

**Internacia Labororganizo.** — Kreita laŭ la Versailles-traktato. Celas studi kaj proponi solvojn pri internaciaj laborproblemoj; preparas konvenciojn, poste ratifikotajn de naciaj parlamentoj, kaj esprimas dezirojn pri intern. labordemandoj. La *internacia laborkonferenco* konsistas el 4 membroj po ŝtato (2 reprezentas la registaron, 1 la dungantojn, 1 la dungatojn); kunvenas almenaŭ ĉiujare. La efektivan laboron plenumas la *Internacia Laboroficejo* gvidata de *Administra Konsilantaro* el 24 membroj (12 reprezentas la registarojn, 6 la dungantojn, 6 la dungatojn). Sidejo en *Genève*.

**Universala Poŝta Unuiĝo.** — Kreita en 1874. Oficejo en *Bern*, kunigas, publikigas kaj liveras ĉiajn informojn pri la intern. poŝta servo, eldonas gazeton.

**Universala Telegrafa Unuiĝo.** — Kreita en 1868. Oficejo en *Bern*, servas kiel oficiala ligilo inter la diverslandaj telegraf-administracioj.

**Internacia Unuiĝo por protektado de industria propraĵo.** — Kreita en 1883. Celas protekti la inventojn, industriajn desegnaĵojn kaj modelojn, fabrikmarkojn, firmnomojn, ktp. Oficejo en *Bern*.

**Internacia Unuiĝo por protektado de literatura kaj arta propraĵo.** — Kreita en 1886, 18 aliĝintaj ŝtatoj. Celas protekti literaturajn kaj artajn verkojn kontraŭ senpermesa reprodukto; eldonas gazeton. Oficejo en *Bern*.

**Centra Oficejo de la fervojoj.** — Kreita en 1890. Celas fiksi la juron pri internaciaj transportoj; eldonas gazeton. Oficejo en *Bern*.

**Internacia Unuiĝo por la publikigo de la dogantarifoj.** — Kreita en 1890. Celas publikigi la ĉiulandajn dogantarifojn en kvin lingvoj. Oficejo en *Bruxelles*.

**Internacia Agrikultura Instituto.** — Kreita en 1905. Celas kunigi; studi kaj publikigi ĉiujn informojn, statistikojn pri terproduktoj, malsanoj de vegetaĵoj, ekspluatkondiĉoj, salajroj, agrikultura kredo kaj kooperado; eldonas bultenojn kaj jarlibrojn. Sidejo en *Roma*.

**Internacia Komerca Instituto.** — Fondita en 1919. Celas centriĝi, kunordigi, publikigi kaj konigi informojn pri statistiko, komerca leĝaro, komercaj traktatoj. Sidejo en *Bruxelles*.

**Internacia Oficejo de la Pezoj kaj Mezuroj.** — Kreita en 1875. Celas konservi la intern. pez-kaj mezurnormojn kaj periode kompari ilin kun la naciaj. Sidejo en *Sevres* (apud Paris).

**Internacia Oficejo de Publika Higieno.** — Kreita en 1907. Celas publikigi ĉiujn informojn pri sanitaraj leĝoj, statistikojn kaj bibliografiojn pri publika sano kaj higieno, ktp. Sidejo en *Paris*.

**Tutamerika Unuiĝo.** — Kreita en 1899. Celas liveri informojn pri la Amerikaj respublikoj kaj plimultigi iliajn kulturajn kaj ekonomiajn interrilatojn; eldonas monografiojn kaj monatan revuon. Sidejo en *Washington*.

**Centramerika Oficejo.** — Celas plimultigi la rilatojn inter la respublikoj de Centra Ameriko. — Sidejo en *Guatemala*.

### *Neoficialaj internaciaj institucioj.*

#### INTERNACIA VIVO. PACO:

**Unuiĝo de la Internaciaj Asocioj.** — Kreita en 1910. Celas studi la faktojn de intern. vivo, prepari la efektivigon de tutmonda organizaĵo, faciligi la rilatojn inter la intern. asocioj; eldonas revuon kaj jarlibron. Sidejo en *Bruxelles*.

**Internacia Instituto de Bibliografio.** — Kreita en 1895. Celas studi la demandojn pri dokumentado kaj sisteme ĝin organizi; starigis universalan bibliografian repertorion, dokumentan kaj ikonografian repertoriojn (dek milionoj da slipoj). Sidejo en *Bruxelles*.

**Fondaĵo Carnegie por Paco.** — Kreita en 1910 per donaco de S<sup>ro</sup> Carnegie (10 000 000 dolaroj) por favori la intern. pacon. Tri fakoj rilatoj kaj edukado (helpado al pacaj societoj), ekonomio kaj historio (studoj pri la militoj), juro internacia. Sidejo en *Washington*.

**Fondaĵo Nobel.** — Kreita en 1900 laŭ testamento de S<sup>ro</sup> inĝeniero Nobel, kun kapitalo da 43<sup>1</sup>/<sub>2</sub> milionoj da Fr. Ĉiujare donas premion pri fiziko, hemio, medicino, literaturo, paco. Sidejo en *Stockholm*.

**Interparlamentara Unuiĝo.** — Fondita en 1888. Konsistas el membroj de la diverslandaj parlamentoj, celas favori la ideon pri internacia arbitracio. Sidejo en *Bruxelles*.

**Unuiĝo de la Asocioj por Ligo de Nacioj.** — Fondita en 1919. Federiĝo de la diverslandaj asocioj por Ligo de Nacioj. Sidejo en *Bruxelles*.

**Konstanta Pacoficejo.** — Sekretariejo de la diverslandaj pacifistaj societoj; eldonas gazeton kaj jarlibron. Sidejo en *Bern*.

**Paca Mondligo.** — Fondita en 1919. Celas starigi centron por intersanĝo de pensoj inter pacamikoj kaj disvastiĝo de la ideoj pri interpopola alproksimiĝo; eldonas trilingvan gazeton. Sidejo en *Hago*.

**Internacia Ligo de la Virinoj por Paco kaj Libereco.** — Fondita en 1915. Celas efektigi la rezoluciojn voĉdonitajn ĉe la intern. kongresoj de la Virinoj kaj apogi ĉiun proponon favoran al paco kaj libereco de la virinoj; eldonas gazeton. Sidejo en *Genève*.

**Ligo por homaraj intereso.** — Fondita en 1913. Celas starigon de internacia ordo kaj organizon de homara progreso; eldonas gazeton Francon kaj Germanan. Sidejo en *Versoix-Genève*.

**Internacia Komitato por repreno de internaciaj rilatoj.** — Fondita en 1919. En rilato kun la Brita "Unuiĝo por demokrata Kontrolo". Sidejo en *Bern*.

**"Klareco".** — Fondita en 1919. Internacia unuiĝo por spirita alproksimiĝo de la ĉiulandaj intelektuloj; eldonas gazeton. Sidejo en *Paris*.

#### SOCIALAJ MOVADOJ:

**Internacia sekretariejo de naciaj sindikataj federacioj.** — Kunigas la dokumentojn pri la diverslanda sindikata movado kaj preparas la intern. Konferencojn. La diversnaciaj sindikataj unuiĝoj reprezentas ĉ. 18 milionojn da sindikatanoj. Sidejo en *Amsterdam*.

**Internacia Asocio por leĝa protektado de laboristoj.** — Kreita en 1900. Celas kunligi ĉiujn interesulojn pri leĝa laborista protektado, starigis intern. Laboroficejon, eldonas bultenon kaj publikigas leĝojn pri laboro. Sidejo en *Basel*.

**Internacia Instituto de mezaj klasoj.** — Sidejo en *Bruxelles*.

**Internacia kooperativa ligo.** — Sidejo en *London*.

**Internacia Oficejo kontraŭ alkoholismo.** — Sidejo en *Lausanne*.

#### RELIGIAJ KAJ FILOZOFIAJ MOVADOJ:

**Ordo de Bontemplanoj.** — Celas kunigi ĉiujn batalantojn kontraŭ alkoholo kaj venenaĵoj. Ekzistas ankaŭ *Sendependa ordeno de la Bontemplanoj*, sur nereligia fundamento.

**Internacia Federacio de Blua Kruco.** — Religia kontraŭ alkohola unuiĝo, disvastigita precipe en protestantoj landoj. Sidejo en *Genève*.

**Kristana Unuiĝo de Junaj Viroj.** — Celas kunigi ĉiujn Kristanajn junulojn; starigis multajn hejmojn por junuloj, disvastiĝis precipe en protestantaj landoj. Sidejo en *Genève*.

**Savarmeo.** — Kreita en 1876. Celas savi la homojn per Jesuo Kristo kaj bonfari; starigis grandan nombron de helpopostenoj, rifuĝejoj, ktp. Sidejo en *London*.

**Teozofia Societo.** — Fondita en 1875. Kunigas la diversnaciajn teozofiajn grupigojn. Sidejo en *Adyar* (Hindio).



**Universala Izraelida Ligo.** — Kreita en 1860. Celas helpi al la emancipo de la Izraelidoj; fondis lernejojn, precipe en Oriento. Sidejo en *Paris*.

**Internacia Zionista organizaĵo.** — Celas restarigi en Palestino hejmlandon por Izraelidoj; starigis koloniojn en Palestino. Sidejo en *Kopenhago*.

BONFARADO. EDUKADO.

**Internacia Ruĝa Kruco.** — Kreita en 1864. Celas helpi al militvunditoj kaj militviktimoj; kunigas la diverslandajn Ruĝakrucajn sociojn. Sidejo en *Genève*.

**Internacia Ligo de la Ruĝakrucaj Societoj.** — Kreita en 1919. Unuiĝo de Ruĝakrucaj Societoj per sistema kontraŭbatalo de la mizeroj kaŭzita de la malsano kaj de la grandaj katastrofoj; starigis intern. oficejon en *Genève*.

**Internacia Unuiĝo de la amikinoj de l'junulino.** — Kreita en 1877. Celas helpi al vojaĝantaj junulinoj; starigis stacidomajn postenojn. Sidejo en *Neuchâtel* (Svisio).

**Internacia katolika Asocio por protektado de junulinoj.** — Kreita en 1907. Celas antaŭgardi la katolikajn junulinojn kontraŭ la vojaĝdanĝeroj; starigis stacidomajn postenojn. Sidejo en *Fribourg* (Svisio).

**Internacia Unuiĝo por infanhelpado.** — Kreita en 1919. Sidejo en *Bern*.

SCIENCO:

**Internacia Perada Instituto.** — Fondita en 1919. Celas plifaciligi la rilatojn inter diverslandaj scienculoj kaj liveri al esplorantoj informojn pri temoj de intern. intereso, juraj, ekonomiaj, politikaj, ktp.; eldonas bultenon. Sidejo en *Hago*.

**Instituto de Internacia Juro.** — Fondita en 1873. Celas studi ĉiujn demandojn pri intern. juro, civila, komerca, diplomata aŭ milita; eldonas jarlibrojn. Sidejo en *Gand* (Belgio).

**Internacia Instituto Sociologia.** — Sidejo en *Paris*.

**Internacia Instituto Statistika.** — Sidejo en *London*.

**Internacia Instituto Kolonia.** — Sidejo en *Bruxelles*.

**Internacia Instituto por esploro de militsekvoj.** — Sidejo en *Kopenhago*.

Ĉefaj datoj de la mondhistorio.

*Antikva epoko.*

- Antaŭ Kristo.
- 3300. Fondo de la unua Egipta Imperio.
- 3000. Ekcivilizo en Ĉinio kaj Hindio.
- 2200. Dua Egipta Imperio. Tebo.
- 2150. Haldea Imperio. Babilono.
- 1500. Niniva Imperio.
- 1320. Elmigro de la Hebreoj el Egiptio. Mozeo. Leĝodonado ĉe Sinai.
- 1300. Florado de Egiptio. Ramses.
- 1193—1184. Troja milito.
- 1020. Unua reĝolando Hebrea.
- 1000. Florado de Fenicio (Tir, Sidon).
- 850. Fondo de Kartago.
- 753. Fondo de Romo.
- 606. Detruo de la Niniva Imperio. Babilona Imperio.
- 586. Detruo de Jeruzalemo. Kaptiteco de la Hebreoj en Babilono.
- 539. Detruo de la Babilona Imperio. Persa Imperio.
- 530. Reformo de Buddha en Hindio.
- 525. Detruo de la Egipta Imperio.
- 493—480. Greko-Persaj militoj.
- 464—429. Florado de Ateno. Perikles.
- 336—329. Imperio de Aleksandro.
- 301. Divido de l'Imperio Aleksandra.
- 264. Unua milito de Romo kontraŭ Kartago.
- 146. Detruo de Kartago.
- 58—50. Konkero de Gallio.
- 49—44. Diktatoreco de Julio Cezaro.

39—14 p. K. Florado de Roma Imperio Aŭgusto.

Post Kristo.  
1—33. Vivo de Jesuo Kristo.  
233. Oficialigo de Kristanismo.  
375. Komenco de la popolmigroj.  
476. Finiĝo de la Roma Imperio okcidenta.

*Mezepoko.*

- 571—632. Vivo de Mohamedo.
- 780—810. Florado de l'Araba Imperio.
- 800. Restarigo de l'okcidenta Imperio. Karlo Granda.
- 843. Verdun-traktato. Divido de la Okcidenta Imperio.
- 962. Fondo de la Germana Roma Imperio.
- 1000. Florado de l'Inka Imperio en Peruo.
- 1053. Orienta skismo. (Apartigo de la Roma kaj Greka Eklezio.)
- 1066. Konkero de Anglio per la Normandoj.
- 1096—1270. Krucomilitoj.
- 1150—1200. Disvolviĝo de la Gotika arkitekturo. La katedraloj.
- 1338—1453. Centjara milito (Angla-Franca).
- 1440. Elpenso de la presmaŝino.

*Moderna epoko.*

- 1492. Eltrovo de Ameriko.
- 1517. Komenco de Reformo. Luther.
- 1562—1598. Religiaj militoj en Francio.



- |  |   |
|--|---|
| 1562. Fondo de la Anglikana Eklezio.                     | 1814. Elpenso de lokomotivo (Stephenson).                           |
| 1618—1648. Tridekjara milito. Wallenstein. Gustav-Adolf. | 1815. Wien-traktato. Sankta Alianco.                                |
| 1648. Westfalia paco.                                    | 1830. Julia revolucio en Francio.                                   |
| 1649. Angla respubliko. Cromwell.                        | 1848. Revolucio en Francio, Germanio, Aŭstrio, Hungario, Italio.    |
| 1661—1715. Regado de Ludoviko XIV. en Francio.           | 1852. Restarigo de la Imperio en Francio.                           |
| 1689—1725. Regado de Petro. Granda en Rusio.             | 1860. Unueciĝo de Italio.   |
| 1756—1761. Sepjara milito. Frederiko Granda.             | 1870. Franco-Germana milito. Fondo de Franca Respubliko.            |
| 1768. Elpenso de vapormaŝino (Watt).                     | 1914. Monda milito.   |
| 1776. Sendependeco de Usono.                             | 1917. Rusa revolucio. Bolŝevismo.                                   |
| 1789—1799. Franca revolucio.                             | 1918. Revolucioj en Germanio, Aŭstrio, Hungario. Fino de la milito. |
| 1799—1814. Regado Napoleona.                             |   |
| 1810—1870. Sendependiĝo de la Hispan. Amerikaj kolonioj. |   |



## Esperantistoj! LERNU LA ANGLAN LINGVON

sen instruisto  
Per la Marlborough serio  
de mem-instruaj lernolibroj

**Enhavo:** Vortaroj, Konversaciaj frazoj, Gramatiko, Komerco, Vojaĝado, Juraj kaj religiaj frazoj, Fotografado, Biciklado, Aŭtomobilismo, Amuzaĵoj, Mono, Pezoj kaj Mezuroj, k. t. p.

Prezo:

- |  |                      |
|--|----------------------|
| Esperanto Self Taught . . . . .              | 1 ŝ. 9 p., Tolo 3 ŝ. |
| Por Francoj: L'Anglais sans maître . . . .   | 1 ŝ. 9 p., Tolo 3 ŝ. |
| Por Germanoj: Der englische Dolmetscher      | 1 ŝ. 9 p., Tolo 3 ŝ. |
| Por Italoj: L'Inglese imparato da se . . . . | 1 ŝ. 9 p., Tolo 3 ŝ. |
| Por Hispanoj: El Inglés para Gada Cual       | 1 ŝ. 9 p., Tolo 3 ŝ. |
| Rusoj: Самоучитель английского языка         | 1 ŝ. 9 p., Tolo 3 ŝ. |
| Hebreoj: <b>ענגליש: זעלבסט-לערער</b>         | 1 ŝ. 9 p., Tolo 3 ŝ. |

### Frazlibroj por Vojaĝantoj:

Esperanto-Angla Prezo: . . 6 p., Tolo 1 ŝ.

Esperanto-Itala Prezo: 9 p., Tolo 1 p 6 ŝ.

**Enhavo:** Prononcado, Konversaciaj frazoj, (temoj aranĝitaj alfabete), Tabeloj de mono, Pezoj kaj Mezuroj, Numeroj, Listoj diversspecaj, Vortaroj de ĉiutage uzataj vortoj.

### Серия Английской и Иностранной КОММЕРЧЕСКОЙ КОРРЕСПОНДЕНЦИЯ “МАЛБОРО“

(Marlborough's Series of English of Foreign Commercial Correspondence.)  
содержащая образцы фраз писем, запросов, касающихся товаров, предложений товаров, заказов и исполненій таковых, транспортной корреспонденции, агентств, должностей, финансового кредита, страхования товаров, отъездов финансовых рынков, съ фразами. Объявлениями, рекомендательскими письмами. Жалобы и требования вознаграждений, касающихся товаров. Переводные векселя, внутренние и иностранные. Коммерческие термины. Коммерческие сокращения. Мадлицы монетъ, вѣсовъ и мѣръ, и пр., и пр.

RUSSIAN and ENGLISH

### КОММЕРЧЕСКАЯ КОРРЕСПОНДЕНЦИЯ

(Съ русским и латинскимъ шрифтомъ)

подъ редакціей

S. G. STAFFORD,

Преподавателя русскаго языка въ City of London College, и  
WILLIAM CHEVOR-MAURICE, A. I. L. London.

Demu 8vo, 128 стр. Вурый холщевый переплетъ 3/- нетто. Бурая обертка 2/- нетто.

Riceveblaj ĉe Anglaj kaj Kontinentaj Librejoj.

Por plena listo petu Katalogon n° 2, senpage, de  
E. MARLBOROUGH & Co., 51, Old Bailey, LONDONO (Anglujo).

# OLIVAJ OLEOJ

Altkvalitaj  
Pureco garantiita

Anonima Societo  
Nicea de Olivoleoj

(Société An<sup>me</sup>. Niçoise d'Huiles d'Olive)

Kapitalo: 1600 000 fr.


NICE  
(FRANCIO)

Ekspedoj por ĉiuj landoj


Oni akceptas  
agentojn.

# RIKOW-WERKE

WARNSDORF <BOHEMIO>




Seria fabrikado pogrande de ĉiuj  
maŝinoj por prilaboro de ligno



# RICHARD KOCH

WARNSDORF <BOHEMIO>



## Akcia Societo de la Fer- kaj Ŝtalfandejoj Antaŭe Georg Fischer

Schaffhausen (Svisio).

Svisa entrepreno kun Svisa kapitalo  
Fondita 1805. — 4500 laboristoj.

Fandaĵoj ĉiaspecaj por ĉiuj bezonoj de la industrio  
kaj de la metiistoj

Maŝina ŝtalfando	marko	+GF+
Dinama ŝtalfando	marko	+GF+
Aŭto-special-ŝtalfando	marko	+GF+
Tempero-ŝtalfando (mola fando)	marko	+GF+
Speciala Tempero-ŝtalfando: "Tenax Compact"	marko	+GF+

Tenax Compact estas materialo kun speciale alta  
rezisto kaj streĉemo

Elektro-ŝtalfando	marko	+GF+
Malmola ŝtalfando por cement- kaj kalkfabrikejoj	marko	+GF+

### TUBKUNIGILOJ (Fitingoj)

(Marko: +GF+)

por kondukiloj de gaso, akvo, vaporo, ktp. de 1/8 ĝis 6 Anglaj  
coloj, taŭgaj por ĉiuj tuboj de Eŭropa deveno, ekzamenitaj sub  
18 atmosferoj de premo. Ĉirkaŭ 6500 diversaj modeloj; grandegaj  
provizoj por tuja liverado. Riĉa kolekto de specialaj fittingoj por

centra hejtado. Fitingoj por balu-  
stradoj, kaj kompletaj balustradoj  
el tuboj kaj fittingoj. Tuj livereblaj  
nigre, zinkite, polurite aŭ nikelite.



Korespondado en ĉiuj lingvoj.



## Limigilo "Boldrini" por elektra fluo

Ekonomia — preciza — praktika — nedifektebla

Fabrikata de la  
**Laborejo elektromekanika  
Boldrini & K-io  
Spezia (Italio)**

Prezroj malkaraj

Oni konstruas, kiajn ajn elektrikajn  
varmigajn aparatojn, pneŭmatikajn  
aparatojn, precizajn mekanikajojn

L. N. Trobolda  
(D-ro Paolo Lepante Boldrini)

**"La estonta organizado de la mondo"**

Prezo: 2 liroj, ĉe la librejo "Libreria  
Internazionale, Via Torna buoni 20,  
Firenze (Italio)

# Ludwig Bendl

Doganagento de l' ĉefdoganejo  
kaj ekspedisto de la Buschtehrad'a fervojo  
Fondita 1860

**Karlsbad – Eger i. B.**

## Limdogano

de l' importo kaj eksporto.  
(Ĉeĥoslovaka-Bavara-Saksa limo)

## Passau

(Bavara - Germanaŭstria) limo


\* \*

Trafiko de ŝarĝoj al  
**Wien, German-Aŭstrio, Budapest**  
**Hungario, Jugoslavio kaj**  
**Balkano**

Prop raj vagonoj. — Specialaj vagonaj por porcelano

Prizorgo de permesoj por importo kaj eksporto.

# LUKSA MAROKENAĴO



Specialeco de ŝildoj kaj blazonoj de urboj, ŝtatoj,  
provincoj, societoj, k. t. p. per reliefa premo sur  
ĉiuj ledaj artikoloj de nia fabrikado kiel:

Sorbiloj, porskribaj subkajeroj,  
saketoj por sinjorinoj, monujoj, cigar=  
kaj cigaredujoj, protektiloj por libroj,  
ledaj kusenoj, biletujoj, bloknotoj

k. t. p. k. t. p.


Postulu niajn katalogojn.

Adreso:

**Maroquinerie de Luxe, Spiez**

[Svisio]

# Fonto Larbaud- St. Yorre



rekomendata de la kuracistaro  
el ĉiuj landoj kiel la plej  
efika kontraŭ:

diabeto,  
malsanoj de hepato  
kaj stomako,  
renĝtonetaro,  
albuminurio.

La plej malvarma, la mal-  
plej difektebla dum trans-  
porto, senfine konservebla.

Mendoj al:

**LARBAUD-  
ST. YORRE**  
Vichy (Francio).

DUA PARTO.

## ESPERANTISMO.

### Historio de la Esperanto-movado.

#### Krea periodo.

La kreinto de Esperanto, D<sup>ro</sup> Ludoviko Lazaro Zamenhof, estas naskita la 15. decembro 1859 en Bialystok (gubernio Grodno), kie lia patro havis lingvan lernejon. En sia fama "Letero pri la deveno de Esperanto", leginda de ĉiu Esperantisto, li mem rakontis, kiamaniere naskiĝis ĉe li la ideo, ke neŭtrala lingvo, ne ofendanta ies naciajn sentojn, povus plibonigi la amikajn rilatojn inter la homoj kaj kiamaniere li laboris por la efektiviĝo de tiu ideo, senkonscie trapasinte la samajn fazojn, kiujn la historiistoj poste difinis en la evoluado de lingvo internacia.

En 1878, la unua formo de la lingvo jam estis preta, kaj la 5. decembro 1878, en rondo de Varsoviaj gimnazianoj, estis festata la apero de la nova lingvo, simbolo de frata unuiĝo de la homaro. Sed Zamenhof estis ankoraŭ tro juna por publikigi sian laboron; li decidis atendi kelkajn jarojn kaj dume perfektigi la lingvon. En 1885, post multaj provoj, ĝi ŝajnis al li preta por praktika uzado kaj li decidis publikigi la unuan lernolibron. Vane serĉinte eldoniston dum du jaroj, li fine mem aperigis la Rusan eldonon en julio 1887, sub la pseŭdonimo D<sup>ro</sup> Esperanto; tiun nomon la adeptoj poste donis al la lingvo. Saman jaron li ankaŭ eldonis la unuan broŝuron en Pola, Franca kaj Germana lingvoj.

#### Germana-Slava periodo (1887—1896).

La lingvo komence disvastiĝis tre malrapide pro la indiferenteco de la publiko kaj la manko de monrimedoj. En 1889, la unua adresaro eldonita de D<sup>ro</sup> Zamenhof enhavis mil nomojn, plejparte



Slavajn; ekzistis malgrandaj lernolibroj en la ĉefaj lingvoj kaj tradukoj de A. Grabowski. En Germanio energian propagandon faris Leopold Einstein († 1890), la unua pioniro de nia afero. La 1. septembro 1889 ekaperis en Nürnberg la unua Esperanta gazeto "La Esperantisto", kiu tuj fariĝis efika ligilo inter la diverslandaj adeptoj; ĝi publikigis bonajn tekstojn kaj helpis la pli profundan studadon de la lingvo. En 1890 D<sup>ro</sup> Zamenhof prenis sur sin la redaktadon de la gazeto, sed terure malfacila por li estis tiu tasko, ĉar li tiam ofte translokiĝis de urbo en urbon; vane serĉante lokon, kie lia okulkuracista praktiko povus sufiĉi al liaj modestaj bezonoj. Feliĉe, en la kriza momento fervora Germana pioniro W. H. Trompeter († 1901) per monhelpo ebligis la pluan aperon de la gazeto kaj per tio faris gravan servon al Esperanto.

La epoko 1890—1894 estas karakterizata per vigla agitado pro diversaj reformproponoj, kiuj tre malhelpis la disvastiĝon de la lingvo. Multaj diskutoj aperis en "La Esperantisto". Fine, en novembro 1894 okazis voĉdonado de la abonintoj, de kiu rezultis, ke la lingvo devas resti en sia ĝisnuna formo.

En 1895 "La Esperantisto" estis malpermesata de la Rusa cenzuro pro publikigo de traduko el Leo Tolstoj kaj, ĉar la pli multaj abonantoj estis Rusoj, devis ĉesigi sian aperon. Sed fervora grupo de Esperantistoj en Upsala (Svedio) baldaŭ aperigis novan gazeton „Lingvo Internacia", kiu daŭrigis la utilan taskon komencitan de „La Esperantisto". Inter 1892—1895 kluboj fondiĝis en kelkaj urboj; aliparte, per tradukoj kaj originala verkado, la lingvo fariĝis pli fleksebla, pli vivanta, kaj alprenis propran spiriton. En tiu epoko aperis la klasika traduko de D<sup>ro</sup> Zamenhof: Hamlet, de Shakespeare, kaj versaĵoj de talentaj poetoj kiel Grabowski, Devjatnin, Gernet, Goldberg, Kofman, Seleznet, Soloviev, Wasniewski, k. a.

### Franca periodo (1896—1904).

De 1896, Esperanto komencis disvastiĝi en Francio, precipe dank' al la agado de Louis de Beaufront, kiu publikigis artikolojn, propagandilojn, lernolibrojn, kaj en 1908 fondis la gazeton "L'Esperantiste" kaj la societon por la propagando de Esperanto. Li sukcesis interesi al Esperanto kelkajn scienculojn kaj multajn agemajn personojn. La grava firmo Hachette en Parizo vaste eldonis lernolibrojn kaj vortarojn.

Fruktodona propagando okazas en la periodo 1898—1904. En Francio laboris agemaj propagandistoj kiel Generalo Sebert, Prof. Th. Cart, Prof. Carlo Bourlet († 1913), Prof. Boirac († 1917), D<sup>ro</sup> Dor († 1912), D<sup>ro</sup> Javal († 1907), Abato Peltier († 1909), Kapitano Capé-Montrosier († 1916), Gaston Moch, René Lemaire, Paul Fruictier,

Gabriel Chavet, k. a. Kreiĝas kursoj kaj grupoj; lernolibroj kaj tradukoj plimultiĝas. En 1902 la gazeto "Lingvo Internacia", tiama centra organo, post diversaj migroj, translokiĝas en Parizon, kie ĝi aperas ĝis 1914 sub la gvidado de Paul Fruictier kaj poste de Prof. Cart. Ankaŭ en aliaj landoj Esperanto disvastiĝas. Dum 1902, 1903 kaj 1904, gazetoj kaj propagandaj societoj fondiĝis en Kanado, Belgio, Nederlando, Bohemio, Bulgario, Svisio, Peruo, Cilio, Meksiko, Hispanio, Britio, Germanio, Hungario. En Britio la unuaj pioniroj estis Jos. Rhodes, John Ellis, H. Bolingbroke Mudie († 1916), Cefeĉ († 1918), F. Moscheles († 1918), Kol. John Pollen, Alf. Wackrill, k. a.; en Germanio Jean Borel, D<sup>ro</sup> Mybs, Prof. Christaller, D<sup>ro</sup> A. Schmidt. Inter la verkistoj de tiu epoko estas citindaj D<sup>ro</sup> Bein (Kabe), S. Meyer, Devjatnin, Kofman, D<sup>ro</sup> Vallienne († 1908), Motteau († 1908), Bicknell († 1918).

### Internacia periodo (1904—1914).

De 1904 Esperanto estas pli-malpli konata en ĉiuj landoj; post la Slava (1887—1896) kaj la Franca (1896—1904) periodo, venas la internacia. Al la progresoj de Esperanto en la praktika vivo kaj al la firmigo de la movado multe helpis la universalaj kongresoj de Esperanto. La unua okazis en Boulogne s. Mer (aŭgusto 1905) en la ĉeesto de D<sup>ro</sup> Zamenhof kaj vekis grandan entuziasmon, ĉar la unuan fojon diverslandaj samideanoj grandare renkontiĝis kaj interparolis Esperanton. En Boulogne s. Mer oni akceptis la Deklaron pri Esperantismo kaj elektis la unuan Lingvan Komitaton. Kelkan tempon poste fondiĝis en Parizo, laŭ iniciato de Generalo Sebert, la Centra Oficejo Esperantista, kiu fariĝis la sekretario de la lingvaj kaj kongresaj institucioj. La dua kongreso okazis en, Genève (1906) kaj decidis la fondon de Konstanta Komitato de la Kongresoj. Je tiu kongreso fondiĝis la unuaj fakaj societoj kaj aperis "La Revuo", direktata de Prof. Bourlet kun la konstanta kunlaborado de D<sup>ro</sup> Zamenhof. La tria kongreso (Cambridge 1907) estis tre impona manifestado, kiu multe helpis la progreson de Esperanto en la Anglolingvaj landoj. En 1907—1908 okazis bedaŭrinda krizo: Delegitaro por la alprenado de lingvo internacia, fondita de D<sup>ro</sup> L. Couturat († 1914) dum la Pariza ekspozicio (1900), kun la helpo de Esperantistoj, akceptis Esperanton sub kondiĉo de reformoj prezentitaj en la projekto Ido, kies ĉefa aŭtoro estis Louis de Beaufront. La granda plimulto de la Esperantistoj estis kontraŭ la reformoj, opiniante, ke ili endanĝerigas la movadon kaj ne estas necesaj. En 1908, laŭ la iniciato de H. Hodler kaj Th. Rousseau († 1916) fondiĝis Universala Esperanto-Asocio por helpi al la praktika uzado de la lingvo kaj plimultiĝi la rilatojn inter

diverslandaj Esperantistoj. La kvara kongreso okazis en Dresden (1908), la kvina en Barcelona (1909), la sesa en Washington; ĉiuj estis tre sukcesaj. Antaŭ kaj dum la sepa kongreso (Anvers 1911), okazis viglaj diskutoj pri la internacia organizo de la movado. La oka kongreso (Krakow 1912) estis frata manifestado okaze de la 25a jubileo de Esperanto. La naŭa kongreso kunisidis en Bern (1913) kaj la deka en Paris (1914), kiu promesis fariĝi la plej grandioza el ĉiuj, estis malhelpita de la mondmilito.

La periodon 1904—1914 karakterizas intensa ĉiea propagando kaj, precipe en la lastaj jaroj, energia penado por la enkonduko de Esperanto en la praktikan vivon. Oni komprenas, ke propagandi ne sufiĉas, sed ke oni ankaŭ devas utiligi la lingvon, tute kiel ĉiun vivantan lingvon, kaj per ĝi plifaciligi, jam nun, la ĉiuspecajn rilatojn inter la homoj.

## La mondmilito.

La mondmilito, kompreneble, malhelpis tre grave la movadon. Multaj societoj ĉesis funkcii, gazetoj malaperis, agemaj samideanoj ne plu povis sin okupi pri Esperanto. Tamen, la movado ne pereis. En 1915 okazis la dek-unua kongreso en San Francisco. Dum la milito la Centra Oficejo de UEA restis konstante malfermita, servante al la militviktimoj per Esperanto kaj ebligante la pluan vivadon de la internacia movado per regula aperigo de la gazeto "Esperanto". Grandan ĉagrenon en la Esperantistaro vekis la morto de D<sup>ro</sup> Zamenhof en Varsovio, la 14. aprilo 1917.

Kun la subskribo de la pacotraktato nova periodo komenciĝis. Esperplene la ĉiulandaj samideanoj denove laboras por enkonduki Esperanton en la internacian vivon kaj per ĝi helpi al la naskiĝo de pli bona mondo.

**Bibliografio:** Edmond Privat, *Historio de la lingvo Esperanto 1887—1900* (reeldonota). — Sama aŭtoro, *Doktoro Zamenhof, lia vivo kaj lia verko* (aperonta). — Adam Zakrzewski, *Historio de Esperanto 1887—1912* (Varsovio, 1913). — *Esperantista Dokumentaro pri la oficialaj, historiaj, bibliografiaj kaj statistikaj aferoj* (Centra Oficejo Esperantista, Paris). — Multajn informojn ankaŭ liveras la kolektoj de la diversaj gazetoj, speciale *La Esperantisto* (ne plu aĉetebla), *Lingvo Internacia*, *La Revuo*, *Esperanto* kaj la naciaj organoj.

## La lingvo Esperanto.

### Giaj ecoj.

Esperanto ne estas ĝustadire "artefarita" lingvo, sed, pli vere, genie "eltrovita" sintezo de la Eŭropaj lingvoj. El ili devenas ĝiaj fundamentaj elementoj, sed tiamaniere kunmetitaj kaj kunfonditaj, ke la lingvo aperas kiel tute memstara harmonia kreaĵo, ricevinta per la uzado propran stilon kaj spiriton.

La Esperanta gramatiko estas rezultato de studado kaj simpligo de l' gramatikoj de la modernaj Eŭropaj lingvoj. D<sup>ro</sup> Zamenhof sukcesis malpliigi ĝis minimumo la gramatikajn regulojn, forigante la neutilan balaston, pro kiu la naciaj lingvoj estas tiel malfacile lerneblaj. Malgraŭ la simpleco de sia konstruo Esperanto estas kapabla trafte esprimi la plej delikatajn nuancojn de l' penso, kiel pravas ĝia jam granda literaturo. Cetere, ankaŭ en la gramatiko, arbitro estis laŭeble evitata. La Esperantaj finaĵoj ekzistas en kelkaj naciaj lingvoj, sed tre malregule. Eĉ la tabelo de la simplaj vortetoj estas nur logika sistemigo de rilatoj troveblaj en iuj naciaj idiomoj.

La radikojn de la vortaro D<sup>ro</sup> Zamenhof elektis konforme al la principo de maksimuma internacieco, t. e. por ĉiu sufiĉe internacia kaj klare diferencebla ideo li elektis tiun radikon, kiu estas la plej facile komprenebla de la plej multaj homoj. Pro la supre nomita principo, kiu cetere ne estas matematike aplikebla, la Esperanta vortaro estas plejparte Latina, sed por restarigi la ekvilibron, D<sup>ro</sup> Zamenhof prefere elektis Germanan aŭ Slavan radikon, kiam mankas sufiĉa internacieco. Dank'al la supersignaj literoj kaj sen rompo al la logika principo: unu litero, unu sono, multaj radikoj konservas en Esperanto la aspekton, kiun ili havas en la naciaj lingvoj, kaj sekve estas pli facile rekoneblaj. La derivado fariĝas per la samaj naturaj procedoj kiel en aliaj vivantaj lingvoj kaj konforme al la leĝo de minimuma penado. Pro la genia sistemo de prefiksoj kaj sufiksoj kaj pro la ebleco krei kunmetitajn vortojn, la nombro de la lernotaj radikoj estas nekompareble pli malgranda ol en iu alia Eŭropa lingvo, kaj malgraŭ tio la riĉeco de la vortkombinoj estas uzabela kiel memstara radiko, Esperanto ĝuas la avantaĝojn de la aglutinaj lingvoj.

D<sup>ro</sup> Zamenhof mirinde sukcesis, ke lia lingvo estu ĝusta ekvilibro inter la diversaj Eŭropaj pensmanieroj. Rilate al la tri grandaj grupoj, Latina, Germana, Slava, Esperanto estas kvazaŭ mezo. Se la vortaro estas pli facile lernebla de la Latinaj popoloj, la akuzativo, la vortfarado, la sintakso estas pli facilaj por Germanoj kaj Slavoj. Esperanto

estas internacia ne nur pro sia celo, sed ankaŭ en sia strukturo. Nur genio povis kunmeti tian harmonian verkon.

Pro sia interna ekvilibro, Esperanto mirinde taŭgas por respeguligi la spiriton de la aliaj lingvoj. Ne ekzistas pli trafa tradukilo. Komparo de nacilingvaj tradukoj kun Esperantaj ĉiam montras la superecon de la Zamenhofa lingvo rilate precizecon kaj esprimecon.

## Ĝia evoluo.

Pri la elkresko de la lingvo el la malgranda materialo eltrovita de D<sup>ro</sup> Zamenhof, jene skribis D<sup>ro</sup> Edmond Privat en sia *Historio de la lingvo Esperanto*:

“Kiamaniere fleksebligis, dolĉiĝis, ekfluis la lingvo en manoj de genio, tion klarigas la historio pri la deveno de Esperanto, kaj kiamaniere pliriĉiĝis kaj plivastiĝis tiu sama lingvo en la manoj de l’ĉiulandaj uzantoj, de l’novaj fervoraj verkantoj proze aŭ poezie, tion montras la unuatempa literaturo. Rimarkinde estas, kiel malriĉa estis la tiama vortaro kaj tamen kiel mirinde la lingvo kreis al si esprimajn rimedojn, grupigis la vortojn kaj ilin devigis helpi unu la alian. Sin nutrante nur el sia propra malriĉaĵo, per senĉesa uzado kaj prilaborado de sia malvasta havaĵo, la lingvo sukcesis krei al si propran riĉecon, memgajnitan belecon kaj luman klarecon de eleganta simpleco. . . Plej bone estas, ke ĝi sciis riĉiĝi restante malriĉa, ĉar tiel estis uzata ĉio uzebla kaj stariĝis vivanta fundamento, kiu poste povis komuniki sian vivon kaj sian spiriton al la pli malfrue alvenanta nova materialo. Se tuj, anstataŭ penadi por serĉadi en la ekzistanta propraĵo aŭ formi per ĝi la bezonatajn esprimilojn, la unuaj verkantoj estus konstante aldonintaj ĉiam novaĵojn el ekstero, la lingvo estus kredeble tre malmola, malfleksebla, senspirita kaj senkaraktere preta suferi ĉiujn influojn de naciaj lingvoj kun granda risko de konfuziĝo. Tre saĝe la Esperantistoj de l’unua horo ĉefe zorgis pri vivanteo de la lingvo kaj sciis doni al ĝi propran animon; tiamaniere sekvante la direkton tre klare montritan de Zamenhof je l’frua komenco, ili certe kaŭzis la sukceson de la lingvo.”

## La Fundamento.

De kiam la lingvo Esperanto publike aperis, en la jaro 1887, ĝi disvolviĝis kaj pliriĉiĝis laŭ natura vojo, tute kiel ĉiu vivanta lingvo. La Esperantistaro ĉiam malakceptis ĉiun provon arbitre ŝanĝi la lingvon, ĉar ili prave opinias, ke la plej grava kondiĉo por la sukceso de lingvo internacia estas unueco kaj netuŝebleco.

Tial la unua universala kongreso de Esperanto akceptis kiel netuŝeblan bazon de la lingvo la verkon titolitan “*Fundamento de Esperanto*”: ĝi konsistas el la dek-ses reguloj de la gramatiko, el serio de ekzercoj por montri la sintakson kaj stilon de la lingvo kaj el la Universala Vortaro, kiu enhavas ĉirkaŭ 2500 radikojn. Sur tiu verko estas bazitaj ĉiuj naciaj lernolibroj, kaj tiamaniere la sameco de la lingvo tra la tuta mondo estas certigita.

Pri la celo de la Fundamento jene skribas D<sup>ro</sup> Zamenhof en la antaŭparolo: “Por ke lingvo internacia povu bone kaj regule progresadi kaj por ke ĝi havu planan certecon, ke ĝi neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj, estas necesa antaŭ ĉio unu kondiĉo: la ekzistado de klare difinita, neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla *Fundamento* de la lingvo. Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la *registaroj* de la plej ĉefaj regnoj kaj tiuj ĉi registaroj per speciala *leĝo* garantios al Esperanto tute certan vivon kaj uzatecon kaj planan sendanĝerecon kontraŭ ĉiuj personaj kapricoj aŭ disputoj, tiam aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj, havos la rajton fari en la Fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, se tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj; sed *ĝis tiu tempo* la Fundamento de Esperanto devas plej severe resti absolute senŝanĝa, ĉar severa netuŝebleco de nia Fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progresado kaj la plej grava kondiĉo por nia regula kaj paca progresado estonta.”

## Fundamento kaj evoluo.

La ekzisto de la Fundamento tute ne signifas, ke la lingvo ĉiam devas resti rigida kaj ne povas evolui “Malgraŭ la severa netuŝebleco de la Fundamento, skribas D<sup>ro</sup> Zamenhof, nia lingvo havos la planan eblon ne sole konstante riĉiĝadi, sed eĉ konstante *pliboniĝadi* kaj *perfektiĝadi*; la netuŝebleco de la Fundamento nur garantios al ni konstante, ke tiu perfektigado fariĝos ne per arbitra, interbatala kaj ruiniga *rompado* kaj ŝanĝado, ne per nuligado aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo natura, senkonfuza kaj sendanĝera”.

Nia Majstro montras, ke tiu perfektigado estas realigebla per vojo de novaj vortoj kaj de neologismoj. Flanke de ekzistanta formo, povas esti proponata nova formo, kiu estas uzebla paralele kun la malnova. Kun la tempo la formo nova, se ĝi montriĝas pli oportuna en praktika uzado, iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos arĥaismo, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo. Sed, formante parton de la Fundamento, tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elfjetitaj, sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj sam-

tempe kun la formoj novaj. La unueco de Esperanto neniam estos rompata kaj neniu verko, eĉ el la plej frua tempo, perdos sian valoron kaj kompreneblecon por la estontaj generacioj.

Tiuj ĉi principoj jam estas de longe aplikitaj. Pro la postuloj de la praktiko, estas uzataj multaj novaj vortoj, formoj paralelaj al la Fundamentaj (ekzemple, *arkitekturo* flanke de *arĥitekturo*, *kemio* flanke de *hemio*, *komentoj* flanke de *komentarii*), fine eĉ novaj afiksoj, ĉu por esprimi nuancojn ne montreblajn per la Fundamentaj afiksoj (ekzemple, *aĉo*, *mis-*), ĉu por diferencigi malsamajn sencojn de ekzistanta afikso (ekzemple, *-jo* kaj *-ujo*, *enda* kaj *-ota*). Al la Lingva Komitato apartenas la tasko oficialigi tiujn aldonojn, post kiam ili estas sufiĉe eksperimentitaj.

**Bibliografio.** Pri la vivo de la lingvo: Dro L. L. Zamenhof *Dua Libro*, *Aldono al Dua Libro* (ne plu aĉeteblaj), *Fundamento de Esperanto*, *Lingvaj Respondoj*, *Esenco kaj estonteco de L. I.* kaj la diversaj kongresaj paroloj.

La nombro de la vortaroj, gramatikoj, lernolibroj, komentarioj pri la lingvo estas tro granda, por ke ni povu citi ilin. Oni trarigardu la katalogojn de la Esperanto-librejoj.

## Deklaro pri Esperantismo.

Akceptita en la unua Universala Kongreso de Esperanto  
(Boulogne sur Mer. Aŭgusto 1905).

Ĉar pri la esenco de la Esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni subskribintoj, reprezentantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la internacia Kongreso Esperantista en Bulonjo-apud-Marco, trovis necesa laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto doni la sekvantan klarigon:

### Kio estas Esperantismo?

1. La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu "ne etrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniam celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn", donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povas esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson

por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo estos lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas.

### Kial Esperanto?

2. Ĉar en la nuna tempo neniu esploranto en la tuta mondo jam dubas pri tio, ke lingvo internacia povas esti nur lingvo arta, kaj ĉar el ĉiuj multegaj provoj faritaj en la daŭro de la lastaj du centjaroj, ĉiuj prezentas nur teoriajn projektojn, kaj lingvo efektive finita, ĉiu-flanke elprovita, perfekte vivipova kaj en ĉiuj rilatoj plej taŭga montriĝis nur unu sola lingvo, Esperanto, tial la amikoj de la ideo de lingvo internacia, konsciente, ke teoria disputado kondukos al nenio kaj ke la celo povas esti atingita nur per laborado praktika, jam de longe ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ la sola lingvo Esperanto kaj laboras por ĝia disvastigado kaj riĉigado de ĝia literaturo.

### Kiu estas mastro de la lingvo?

3. Ĉar la aŭtoro de la lingvo Esperanto tuj en la komenco rifuzis unu fojon por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate tiun lingvon, tial Esperanto estas "nenies propraĵo", nek en rilato materiala, nek en rilato morala.

Materiala mastro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn kiajn li deziras, kaj uzadi la lingvon por ĉiaj eblaj celoj; kiel spiritaj mastroj de tiu lingvo estos ĉiam rigardataj tiuj personoj, kiuj de la mondo esperantista estos konfesataj kiel la plej bonaj kaj plej talentaj verkistoj en tiu ĉi lingvo.

### Kio estas la Fundamento?

4. Esperanto havas nenian personan leĝdonanton kaj dependas de neniu aparta homo. Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia Esperantisto, karakteron absolute privatan kaj por neniu devigan. La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj Esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo "Fundamento de Esperanto", en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj "tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto". Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimata per tiu materialo, kiu troviĝas en la "Fundamento de Esperanto", ĉiu Esperantisto havas la



rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro plena unueco de la lingvo, al ĉiuj Esperantistoj estas rekomendate imitati kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.

## Kio estas Esperantisto?

5. Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva societo Esperantista por ĉiu Esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.

## La Esperanta literaturo.

La nombro de la verkoj en aŭ pri Esperanto atingas proksimume du mil kvin cent. El ili almenaŭ la duono rilatas al la instruado de la lingvo.

Jam impona estas la Esperanta literaturo. Ĝi konsistas plejparte el tradukoj. Ilia nombro estas tia, ke ni povas ĉi tie citi nur la plej gravajn. Nuntempe multaj el la sube montritaj verkoj estas elĉerpitaj; reeldonoj aperos, kiam la preskondiĉoj estos pliboniĝintaj. Por plujaj informoj oni sin turnu al la diversaj Esperantistaj librejoj.

El *Angla* lingvo: de Shakespeare, *Hamleto* (trad. D<sup>ro</sup> ZAMENHOF), *Julio Cezaro*, *Makbeto*, *Sonĝo de someromeza nokto*, *Venecia komercisto*, *La Ventego*; de BYRON, *Ĉielo kaj Tero*, *Kain*, *Manfred*; de DEFOE, *Robinson Kruso*; de DICKENS, *Batalo de l' Vivo* (trad. D<sup>ro</sup> ZAMENHOF), *Bardell kontraŭ Pickwick*, *Kristnaska sonorado*; de POE, *Puto kaj Pentolo*, de SWIFT, *Gulliver en Liliputlando*; de O. WILDE, *Salome*; de Kard. WISEMAN, *Fabiola*, ktp.

El *Franca* lingvo: *Rolandkanto*, epopeo; de MOLIÈRE, *Georgo Dandin* (trad. D<sup>ro</sup> ZAMENHOF), *La Avarulo*, *Don Juan*, *Edziĝo kontraŭvola*, *Malsanulo pro imago*; de la FONTAINÉ, *Fabloj*; de RACINE, *Athalie*, *Esther*; de PERRAULT, *Rakontoj pri feinoj*; de PREVOST, *Manon Lescaut*; de B. de ST. PIERRE, *Paŭlo kaj Virginio*; de CHATEAUBRIAND, *La lasta Abenceraĝo*; de BALZAC, *Eugénie Grandet*, *La Vendetto*; de MAISTRE, *Vojaĝo interne de mia ĉambro*; de MERIMEE, *Karmen*; de RENAN, *Vivo de Jesuo*; de ABOUT, *Reĝo de l'Montoj*; de MIRBEAU, *Ĉu ili estas frenezaj?*;

de TRISTAN BERNARD, *Angla lingvo sen profesoro*; de CH. RICHTER, *Sokrato*, ktp.

El *Germana* lingvo: De GOETHE, *Ifigenio en Taŭrido* (trad. D<sup>ro</sup> ZAMENHOF), *Hermann kaj Doroteo*, *La Gefratoj*, de SCHILLER, *La Rabistoj* (trad. D<sup>ro</sup> ZAMENHOF), *Nevo kiel onklo*, *Wilhelmo Tell*; de BÖLSCHÉ, *Unu ĉapitro el la ama vivo en la naturo*; de GRILLPARZER, *La Matrĉa muzikisto*, *Monaĥejo ĉe Sendomir*; de GRIMM, *Elektitaj Fabeloj*; de REUTER, *Kio povas okazi, se oni donacas surprize*; de HEBBEL, *Gyges kaj lia ringo*; de HEINE, *Poeziaĵoj*, de B. VON SUTTNER, *For la batalilojn!*; de HEYSE, *Edziĝa festo en Capri*; de SEIDEL, *Vintrofabeloj*; de RAABE, *Nigra galero*; de STORM, *Imenlago*; de LESSING, *Minna de Barnhelm*; de FOUQUÉ, *Ondino*, ktp.

El *Pola* lingvo: De MICKIEWICZ, *Sinjoro Tadeo*; de ORZESZKO, *Marta* (trad. D<sup>ro</sup> ZAMENHOF), *Interrompita kanto*; *Bona sinjorino*; de PRUS, *Faraono*; de SIEROSZEWSKI, *La fundo de l'mizero*; de SLOWACKI, *Mazepa*; de SVJENTOHOVSKI, *Aspazio*; de WYSPIANSKI, *Profesilas kaj Laodamio*; *Pola Antologio*; de SIENKIEWICZ, *Ŝi, la tria*; *La juĝo de Osiris*; *Kio okazis foje en sidono*; *Janko Muzikanto*, ktp.

El *Rusa* lingvo: De GOGOL, *La revizoro* (trad. D<sup>ro</sup> ZAMENHOF); *Maja Nokto*; de ANDREJEV, *Ruĝa Rido*; de PUŜKIN, *Boris Gudunov*, *Ŝtona Gasto*; de KRILOV, *Fabloj*; de TURGENEV, *Patro kaj Filoj*; krom tio diversaj verkoj de Ĉehov, Gorki, LERMONTOV, TOLSTOJ, ktp.

El *Finna* lingvo: De KIVI, *La Botistoj*; de LINNANKOSKI, *Batalo pri la domo Heikkilä*.

El *Flandra* lingvo: De CONSCIENCE, *Blinda rozo*, *Rikke-Tikke-Tak*; *Paĝoj el la Flandra literaturo*.

El *Greka* lingvo: de HOMERO, *Parto de Iliado*; de SÓFOKLO, *Reĝo Edipo*. — Ranrat batalo.

El *Kataluna* lingvo: de GALL, *Mistero de doloro*.

El *Latina* lingvo: de VIRGILIO, *Eneido*.

El *Provenca* lingvo: de MISTRAL, *Mirejo*.

El *Sveda* lingvo: de STRINDBERG, *Fraŭlino Julie*.

El *Hebrea* lingvo: *La Biblio*, *Malnova Testamento* (trad. D<sup>ro</sup> ZAMENHOF); ankaŭ aperis traduko de la *Nova Testamento*.

Krom tio ekzistas multaj pli malgrandaj verkoj tradukitaj el la supraj kaj el aliaj lingvoj. Riĉan literaturan materialon oni ankaŭ trovas en la kolektoj de estintaj aŭ ankoraŭ aperantaj Esperantaj gazetoj, speciale *Lingvo Internacia* (1896—1914), *La Revuo* (1904—1914), *Literaturo* (de 1919), *Esperanto*, *British Esperantist*, *Germana*



*Esperantisto*, *Ondo de Esperanto* (1909—1916), *Pola Esperantisto* (1908—1914).

La *originala Esperanta literaturo*, krom multaj artikoloj kaj verketoj en gazetoj, enhavas romanojn de D<sup>ro</sup> VALLIENNE, *Ĉu li?* kaj *Kastelo de Prelongo*; de H. A. LUYKEN, *Paŭlo Debenham* kaj *Mirinda amo*; de E. ALLEYNE SYNNOTE, *Lilio*; versan dramon de EDMOND PRIVAT, *Ginevra*; versaĵojn de Devjatnain, Bela Manto, Eski kaj Eska, ktp. La belaj originalaj poeziaĵoj de D<sup>ro</sup> ZAMENHOF (en Fundamenta krestomatia) kaj la tekstoj de liaj kongresaj paroloj estas unuavice legindaj de ĉiu Esperantisto.

## La dek devoj de la Esperantisto.

1. Bone sciu la lingvon, traktu ĝin kun respekto kaj lasu la vers faradon al poetoj.
2. Esperanton uzu parolante, studu legante kaj ne fuŝu skribante
3. La plibonigistoj diskutu; vi Fundamenton sekvu kaj fidela restu.
4. Propagandu ĉiam, ne ĉie; klarigu, ne prediku; rakontu faktojn, ne esperojn.
5. Kion vi povis lerni nur en unu semajno, ne instru en unu horo; el malgravaĵo ne faru regulon kaj el regulo ne faru malgravaĵon.
6. Verkante en Esperanto, ne kreu interesa, kion nacilingve neniu legus; ne imagu, ke preseraroj plibeligas libron; ne malesperu, se mankas aĉetantoj.
7. Al grupo aliĝu; la kunvenon vizitu; Esperante parolu.
8. Atentu, ke internacia lingvo vivos nur per uzado; memoru, ke tial internacia organizaĵo estas necesa; senlace varbu por UEA.
9. Legu gazeton, por ke vi konu novajn faktojn; abonu, por ke ĝi povu ekzisti; kunlaboru, por ke ĝi estu interesa.
10. Por Esperanto kiel movado agu; por ĝi kiel realaĵo pagu kaj kiel altan idealon konservu ĝin en via koro.

## Organizo de la Esperanto-movado.

### Celo de organizo.

Por venki la publikan indiferecon kaj disvastigi siajn ideojn, ĉiu movado bezonas organizon. Frue la Esperantistoj sentis la necescon

kunordigi sian individuan agadon kaj uzi la bonfarojn de la organiza principo por pli trafe atingi la publikan opinionon.

La interesoj de la Esperantistoj nature dividiĝis laŭ teritorioj kaj laŭ fakoj. Ekzistas do organizaĵoj *lokaj*, *naciaj*, *internaciaj*, *fakaj*.

### Loka organizo.

En ĉiu loko, kie ekzistas kelkaj samideanoj, fondiĝis grupo, klubo aŭ societo, kiu celas propagandi la lingvon per publikaj paroladoj, kunvenoj, festoj, artikoloj, ekspozicioj, kaj faciligi ĝian instruadon per kursoj, kunvenoj, bibliotekoj, ktp. La organizo de tiuj lokaj grupoj varias laŭ la enlandaj kondiĉoj kaj la nombro de la Esperantistoj; en kelkaj urboj ekzistas pluraj grupoj, sendependaj aŭ kunfederitaj, ĉu laŭ kvartaloj, ĉu laŭ fakoj. En iuj lokoj estis aranĝita Esperanto-Oficejo, kie estas alcentrigita ĉio, kio rilatas la Esperantan vivadon, librejo, biblioteko, kunvenejo, ktp.

Ĉiu Esperantisto havas la devon partopreni en grupo por helpi la lokan propagadon; vojaĝante li laŭeble vizitu la grupkunvenojn en la trapasataj urboj. En tiu ĉi Jarlibro oni trovos la liston de la grupoj, pri kiuj ni ricevis informojn, kun indikoj pri la adreso, ejo, tago kaj horo de la regulaj kunvenoj. Dum la milito multaj grupoj ĉesis funkcii kaj ne estas ankoraŭ reorganizitaj.

### Nacia organizo.

La Esperantistoj de sama lando havas komunajn interesojn, ĉar la propagando kaj la instruado estas en rilato kun la enlandaj kondiĉoj kaj kun la nacia lingvo. Fondiĝis do *naciaj societoj*, kiuj konsistas ĉu el grupoj, ĉu el individuoj, ĉu plej ofte el ambaŭ kategorioj. La naciaj societoj plene disvolvigintaj eldonas gazetojn, propagandilojn, lernolibrojn, aranĝis servon de ekzamenoj kun diplomoj, okazigas de tempo al tempo naciajn kunvenojn aŭ kongresojn. Ni publikigas en tiu ĉi Jarlibro informojn pri la naciaj societoj, kiuj respondis al nia demando. En kelkaj landoj ili estas reorganizotaj.

### Internacia organizo.

La *internaciaj organizaĵoj* estas jenaj: *Universala Esperanto-Asocio (UEA)*, fondita en 1908, celas plifaciligi la ĉiuspecajn moralajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco de nacieco, raso aŭ lingvo; kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvi ĉe ili la komprenon de fremdaj popoloj; disvastigi la uzadon de la lingvo Esperanto; krei internaciajn servojn uzablaj de

ĉiuj homoj kaj entreprenoj, kies interesoj celas trans la limoj de ilia genta aŭ lingva teritorio. UEA celas kunigi en unu organizaĵo ĉiujn samideanojn, kiuj per la forto de sia nombro kaj la utiligo de la Zamenhofs-lingvo volas pravi al la mondo, ke Esperanto vivas, taŭgas kaj progresas. Pri la organizo kaj servoj de UEA, vidu la specialajn artikolojn.

La organizo de la Universalaj Kongresoj de Esperanto estas la tasko de loka *Organiza Komitato* kaj de la *Konstanta Komitato de la Kongresoj* (K. K. K.), kiu konsistas el du anoj de la loka Komitato de la antaŭa Kongreso, du anoj de la Komitato de la nuna Kongreso, du anoj elektitaj por ĉiu Kongreso decidita por la venonta jaro, unu prezidanto, unu ĝenerala sekretario kaj helpsekretarioj, elektitaj senpere de la Kongreso.

La sekretarioj de la K. K. K. estas ĉe la *Centra Oficejo Esperantista*, 51 rue de Clichy, Paris. Tiu institucio, fondita en 1905, celas helpi la ĝeneralan propagandon, servi kiel arkivejo kaj biblioteko, eldoni la dokumentojn de la kongresaj kaj lingvaj institucioj; ĝi estas financata per Societo de la Amikoj de Esperanto.

La konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo Esperanto kaj la kontrolado de ĝia evoluo estas komisiitaj al *Lingva Komitato* (L. K.), kies anoj estas elektitaj de la L. K. mem por 9 jaroj inter kandidatoj proponitaj de la Akademio. La *Esperantista Akademio* estas supera laborkomisiono, elektita de la L. K. por 9 jaroj kaj postrone rebalotataj ĉiun trian jaron. Dum la milito tiuj institucioj ne funkciis kaj estas reorganizotaj.

Flanke de tiuj organizaĵoj, ekzistas *fakaj societoj*, laŭ profesioj, laŭ partioj, ktp., kiuj celas propagandi Esperanton en difinita fako kaj ĝin utiligi por specialaj celoj. Dum la milito la plimultaj el tiuj societoj ne povis funkcii.

Ĉiu Esperantisto havas la devon partopreni en la diversaj organizaĵoj de la Esperanto-movado kaj interesiĝi pri ilia agado, de kiu dependas la progreso de Esperantismo tra la mondo. Oni evitu krei novajn organizaĵojn por bezonoj kontentigeblaj per jam ekzistantaj. Troeco de organizaĵoj estas same evitinda kiel senorganizeco.

**Bibliografio.** *Esperantista dokumentaro pri la oficialaj, historiaj, bibliografiaj kaj statistikaj aferoj* (Esperantista Centra Oficejo, Paris). — *Oficiala Jarlibro de UEA*. — R. de Ladevèze. *Demandaro pri la Historio, Literaturo kaj Organizaĵoj de Esperanto por Esperantaj Ekzamenoj*. (Ader & Borel, Dresden.)

## Universala Esperanto Asocio.

### Ĝiaj celoj.

Universala Esperanto-Asocio (UEA) estas fondita komence de la jaro 1908, laŭ la iniciato de S-ro Hector Hodler, el Genève, kaj Th. Rousseau, el Dijon († 1916); ĝia kreo respondis al duobla bezono: praktika kaj ideala.

Instruitaj per la reformkrizo de 1907, la iniciatintoj de la Asocio estis konvinkigitaj, ke Esperanto estos vivdaŭra, nur kiam ekzistos sufiĉa aro da personoj kaj organizaĵoj, kiuj internacie uzos ĝin por siaj bezonoj, same kiel oni uzas nacian lingvon. La faktoj estis klare montrintaj, ke nura propagando, kiel oni ĝin ekskluzive faris en la tiama epoko, tute ne sufiĉas por daŭre enradikigi Esperanton. Post kelkatempa entuziasmo multaj personoj ĉesis interesiĝi al la lingvo, ĉar en la praktika vivo ĝi ne utilis al ili. Ili rigardis ĝin kiel momentan ludon, ne kiel gravan ilon por la plimultigo de la interpopolaj rilatoj. Kaj ĝuste ĉar ĝi ne havis radikojn en la praktiko, la lingvo restis elmetata al la danĝero de pereco pro teoriaj diskutoj kaj senĉesaj reformprovoj. Necesa do estis nova organizaĵo, por kunigi en unu fortika fasko ĉiujn aktivajn Esperantistojn kaj starigi praktikan servaron, dank'al kiu Esperanto prezentos tujan utilecon al la personoj ĝin lernintaj.

Ne nur praktikan celon havas UEA. D-ro Zamenhof kreis Esperanton ne sole por ke ĝi servu al la materiaj komunikaĵoj inter la homoj, sed ankaŭ, kiel li tion ofte deklaris, por ke ĝi spirite ilin alproksimigu, plifaciligu la interpopolan komprenon kaj helpu al tutmonda unuigo. La interna ideo de Esperantismo estis la vivcelo de D-ro Zamenhof. Al ĝia realigo ankaŭ utilis UEA, prezentante organizan fundamenton, super kiu ĉiuj progresemaj homoj povas pace intertrakti, sen reciproka altrudo de siaj gentaj apartaĵoj. Por ke efektiviĝu la interna ideo de Esperantismo, necesaj estis ne nur paroloj, sed ankaŭ faktoj, ĉiutagaĵoj okazoj de interkomunikiĝo. Tial estas kreita la servaro per la delegitoj, kies solidara sindonemo helpas homojn servi unuj la aliajn kaj konatiĝi per amikaj rilatoj. La praktika agado do intime ligiĝas kun la ideala celado.

### Ĝia agado.

La provizora regularo de UEA estis akceptita la 28. aprilo 1908 (oficiala fondodato). La unua prezidanto estis S-ro H. Bölingbroke Mudie († 1916), la direktadon prizorgis S-ro H. Hodler kaj la oficejo

estis fiksita en Genève, 10 rue de la Bourse. Kiel oficiala organo funkciis la gazeto "*Esperanto*" (fondita en 1904 de Paul Berthelot, de 1905 gvidata de H. Hodler, en Genève).

En malmulte da tempo la Asocio rapide progresis; kelkajn monatojn post sia fondiĝo, ĝi kalkulis jam milon da membroj kaj kelkcentojn da Delegitoj; ĝi organizis diversajn servojn, publikigis jarlibron kaj donis impulson al la movado por la praktika uzado de Esperanto. La unua kongreso okazis en Augsburg (1910); de tiam la kongresoj de UEA okazis samtempe kun la Universalaj Kongresoj de Esperanto, en Antverpeno (1911), Krakovo (1912), Berno (1913). En 1910 estis voĉdonita la unua statuto, modifita en 1912 pro plialtigo de la kotizaĵo. En 1914 UEA kalkulis 7233 membrojn. La nombro de la servoj plenumitaj de 1909 ĝis 1913 atingis 46549, el kiuj 11876 pri komerco, 13556 pri turismo, 2167 pri junuloj kaj studentoj kaj 18950 diversaj; la movado de la korespondaĵoj sumis 231158.

La monda milito grave malhelpis la agadon de UEA, sed malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj funkciis ĝia oficejo, servante kiel internacia ligilo inter la ĉverslandaj Esperantistoj kaj farante multajn servojn al la militviktimoj per Esperanto. (Movado de la korespondaĵoj dum 1914—1918: 196403).

En 1919 Sro H. Hodler, ĝis tiam Direktoro, fariĝis Prezidanto de la Asocio; Sro Ed. Stettler, Vicedirektoro, estis elektita kiel Direktoro. La Oficejo estis translokata al Bern, Museumsstrasse 14.

## Ĝia organizo.

Nova statuto de UEA estas preparata kaj voĉdonota dum 1920. Tial ni ne represas la ĝisnunan, baldaŭ ne plu valoran (vidu tekston en la Jarlibro 1914, paĝoj 49—59).

UEA estas tute internacie organizita; naciajn sekciojn ĝi ne havas. Ĝi konsistas el individuaj membroj, kiuj pagas la kotizaĵon fiksitan en la koncerna tabelo; ĉiu membro rajtas uzi la servojn organizitajn de la Asocio kaj ricevi la Jarlibron. Firmoj, korporacioj, societoj povas aliĝi kiel Esperantiaj Entreprenoj, pagante specialan kotizaĵon; ili rajtas presigi 40-vortan anoncon en la Jarlibro.

En ĉiuj gravaj lokoj, laŭeble, UEA estas reprezentata de Delegito kaj de Vicedelegito; en la lokoj kun pli ol 20 membroj, ilin elektas por 3 jaroj la membroj mem, en aliaj la Direktoro. La Delegito varbas membrojn, enkasigas la kotizaĵojn, prizorgas la administradon, starigas la servojn, respondas la infompetojn kaj reprezentas la membrojn.

La Asocio estas gvidata de Komitato, kiu konsistas el 10 membroj elektitaj de la voĉdonrajtaj Delegitoj por 3 jaroj. La Komitato elektas

la Prezidanton, la Viciprezidanton, la Direktoron kaj la Vicedirektoron. La administra laboro estas plenumata ĉe la Centra Oficejo de UEA (Museumsstrasse 14, Bern), kiun gvidas la Direktoro helpata de la necesaj oficistoj. La Kongreso kunvenas laŭeble ĉiujare, ekzamenas la situacion de la Asocio kaj voĉdonas deziresprimojn. Lasta instanco de UEA estas la skriba voĉdonado de la Delegitoj.

**Bibliografio.** Pri la detala historio de UEA kaj ĝia laboro oni legu la kolektojn de *Esperanto*, de la *Oficiala Jarlibro* (1908 ĝis 1914, 1916), de la *Kongresaj Dokumentaroj* (1910 ĝis 1914).

## Esperantistaj Organizajoj.

### Internaciaj institucioj

(Starigitaj de la Universalaj Kongresoj de Esperanto).

#### Esperantista Lingva Komitato.

Viciprezidanto: D<sup>ro</sup> MYBS, 68 Marktstrasse, Hamburg-Altona.  
Direktoroj de sekcioj: A. GRABOWSKI, 42 Hoza, Warszawa (por la gramatiko), TH. CART, 12 rue Soufflot, Paris (por la vortaro).

#### Konstanta Komitato de la Kongresoj.

Prezidanto: Generalo SEBERT, 14 rue Brémontier, Paris.  
Ĝenerala Sekretario: GABRIEL CHAVET, 51 rue de Clichy, Paris.

#### Esperantista Centra Oficejo.

Direktoro: Generalo SEBERT, 14 rue Brémontier, Paris.  
Sekretario de la sekcio A: GABRIEL CHAVET, 51 rue de Clichy, Paris.  
Sekretariino de la sekcio B: Sino E. F. CENSE, 51 rue de Clichy, Paris.

#### Administra Komitato de la Esperantista Centra Oficejo.

Prezidanto: Generalo SEBERT.  
Ĝenerala Sekretario: GABRIEL CHAVET.

#### Internacia Unuiĝo de la Esperantistaj Societoj.

#### Internacia Societo de Amikoj de Esperanto.

Prezidanto: Generalo SEBERT, 14 rue Brémontier, Paris.  
Viciprezidantoj: BARONINO DE MENIL, 21 rue de l'Hotel-de-Ville, Neuilly-sur-Seine, DANIEL EYQUEM, 1 rue Gay-Lussac, Paris, MAURICE ROLLET DE L'ISLE, 35 rue du Sommerard, Paris.  
Sekretariino: Sino E. F. CENSE, 51 rue de Clichy, Paris.

Komuna sidejo de ĉiuj supre nomitaj institucioj:  
*Esperantista Centra Oficejo, 51 Rue de Clichy, Paris.*

Komuna oficiala organo:  
*Oficiala Gazeto Esperantista, 51 Rue de Clichy, Paris.*

### Esperantistaj naciaj societoj.

(La societoj montritaj per la signo \* ne respondis al nia demando. Ni citas ilian titolon laŭ antaŭmilitaj informoj. Ili estas petataj sendi la mankantajn informojn por la venonta eldono.)

#### AŬSTRIO.

\*Ligo de Germanlingvaj Aŭstriaĵ grupoj.

#### BELGIO.

\*Belga Ligo Esperantista.

#### BRITIO.

Brita Esperantista Asocio (B. E. A.). — *Fondo*: 1904. — *Organizo*: Konsistas el individuoj ("fratuloj" kaj membroj) kaj el grupoj. Regata de Konsilantaro kunvenanta ĉiumonate. — *Kof.*: Fratuloj 10 s.; membroj 5 s. (kun la gazeto). — *Organio*: "The British Esperantist". — *Servoj*: Eldonejo, propagandiloj, gazeto, ekzamenoj, oficejo en Londono. ktp. — *Estraro*: Prez. J. MABON WARDEN, vicprez. GEORGE J. COX, HARRISON HILL, D<sup>ro</sup> G. JAMESON JOHNSTON, JOHN MERCHANT, JOHN POLLEN, Sir THOMAS VEZEY STRONG, Miss AD. SCHAFER, ANDREW WILSON; ĝen. sekr.: MONTAGU C. BUTLER; afera sekr.: HARRY A. EPSTEIN; kas.: BERTRAM CHATTERTON. — *Adreso*: 17 Hart Street, London W. C.

#### BULGARIO.

\*Bulgara Esperantista Societo. — *Organio*: "Bulgara Esperantisto". — *Adreso*: S<sup>ro</sup> ST. MINKOV, 77 Nishka ul.

#### ĈEĤOSLOVAKIO.

\*Bohema Asocio Esperantista.

\*Bohema Unio Esperantista.

#### DANIO.

Centra Dana Esperantista Ligo. — *Fondo*: 1908. — *Organizo*: Konsistas el grupoj. — *Kof.*: 35 oere po grupano por la liga kaso. — *Organio*: "Esperanto" (Bern). — *Servoj*: Propaganditoj, jara kongreso,

ktp. — *Stato*: 8 grupoj, 200 membroj. — *Estraro*: Prez. M. BLICHER; vicprez. JUL. WULFF; sekr. por eksterlandaj aferoj: F<sup>ino</sup> ASTRID RYBO; sekr. por enlandaj aferoj: F<sup>ino</sup> LIZZY ASMUSSEN; kas.: ISRAELSEN; anoj: F<sup>ino</sup> ANNA JORGENSEN, S<sup>roj</sup> CHRISTENSEN, HELLSKOV, HINRICHSEN, MEJNDOR, TAUMOSE. — *Adreso*: F<sup>ino</sup> ASTRID RYBO, Kommuneskolen ved Sundholm, Kóbenhavn S.

#### FINNLANDO.

\*Esperanto-Asocio de Finnlando. — *Organio*: "Esperanta Finnlando". — *Adreso*: Teatterikuja 3, Helsinki.

#### FRANCIO.

Franca Societo por propagando de Esperanto (S. f. p. E.). — *Fondo*: 1898. — *Organizo*: Konsistas el membroj; tiuj membroj povas kuniĝi laŭ grupoj. Komitato elektita de ĉiuj membroj por unu jaro. — *Kof.*: 5 Fr.; nur 3 Fr. por la membroj de la grupoj. — *Organio*: "Franca Esperantisto". — *Servoj*: Propagando, ekzamenoj, diplomoj. — *Estraro*: Prez. ROLLET DE L'ISLE; vicprez. TH. CART; sekr.: C. ROUSSEAU; kas.: ROBERT. — *Adreso*: ĉe la Prez., 35 rue du Sommerard, Paris.

#### GERMANIO.

Germana Esperanto-Asocio (G. E. A.). — *Fondo*: 1906. — *Organizo*: Konsistas el grupoj kaj izoluloj. — *Kof.*: Por ordinara membro 3.— M., po Subtenanta membro 3.— M., Izoluloj 20.— M. pojare. — *Organio*: Germana Esperantisto, liverata al ĉiuj grupoj kaj izoluloj po 1 ekzemplero senpage. — *Servoj*: Eldono de propagandiloj, statistiko, libroj. — *Stato*: 68 grupoj kun 1389 ordinaraj, 246 subtenantaj kaj 20 izolaj membroj. — *Estraro*: Prez.: S<sup>ro</sup> D<sup>ro</sup> ALB. STECHE, Leipzig; Kasisto: D<sup>ro</sup> jur. H. ARNHOLD, Dresden; Geschäftsführer: WALTER RANFT, Dresden; *Adreso*: Hauptstrasse 38, Dresden-N.

#### HISPANIO.

\*Hispana Societo por propagando de Esperanto.

\*Kataluna Esperantista Federacio (K. E. F.). — *Organio*: "Bulteno de la K. E. Federacio". — *Adreso*: Mendizabal 3, Sabadell.

#### HUNGARIO.

\*Hungarlanda Esperanta Societo. — *Organio*: "Hungara Esperantisto". — *Adreso*: Szeged, Szentháromság 30.

### ITALIO.

\*Itala Esperantista Federacio. — *Organo*: “Esperanto Itala Revuo”. — *Adreso*: Casella Postale 922, Genova.

### NEDERLANDO.

\*Nederlanda Societo Esperantista “La estonto estas nia”. — *Organo*: “Holanda Pioniro”. — *Adreso*: Paul Krugerlaan 37.

### NORVEGIO.

\*Norvega Esperantista Ligo (N. E. L.). — *Organizo*: Konsistas el grupoj kaj izoluloj. — *Organo*: “La Espero”. — *Estraro*: Prez.: R. BUGGE PAULSEN; vicprez.: O. STÖREN; sekr.: FINO JOHANNSEN; kas.: FINO FINHOLDT. — *Adreso*: Radhusgate 17 III, Kristiania.

### POLIO.

Pola Esperantista Societo. — *Fondo*: 1907. — *Organizo*: Centra oficejo en Warszawa, provincaj filioj, estraro de 5 membroj kaj 3 anstataŭantoj, elektata ĉiujare en februaro. — *Kof.*: 24 P. Mk. — *Organo*: “Pola Esperantisto” (nun ne aperas). — *Servoj*: Kursoj komenca kaj supera, konstanta informejo, kunvenoj, biblioteko, Ligo de Amikoj de L. I. en Polio, periodaj ekspozicioj. — *Stato*: Grupoj en 29 provincaj urboj, 75 membroj en Warszawa, 169 en provinco. — *Estraro*: Prez.: BRONISLAW SZCZEPANKIEWICZ; vicprez.: KAZIMIERZ ZAJACZKOWSKI; sekr.: JAN KOSTECKI; kas.: STANISLAW KAROLCZYK; bibl.: D<sup>ro</sup> ANTONI CUBRYNSKI; anoj: ADAM ZAKRZEWSKI, KOBYLINSKI, TEICHFELD; rev.: D<sup>ro</sup> E. LOTH, STANISLAW ESSIGMAN, D<sup>ro</sup> WILHELM ROBIN. — *Adreso*: 21 Jerolimaska, Warszawa.

### SVEDIO.

Sveda Esperanto-Federacio. — *Fondo*: 1. dec. 1906. — *Organizo*: Konsistas el grupoj kaj individuoj. — *Kof.*: Individua membro pagas abonon kaj 2 Kr. jare, grupo 1 abonon kaj po 1 Kr. por ĉiu grupano. — *Organo*: “La Espero”. — *Servoj*: La Federacio fondis apartan “Eldona Societo Esperanto”, kin eldonas la gazeton, eldonas kaj vendas lernolibrojn kaj vortarojn, vendas ĉian Esp. literaturon, ktp. Krom tio ĝi eldonis kaj disdonas pagate aŭ senpage propagandilojn. Informejo. Esp. biblioteko estas pretigata. — *Stato*: 9 grupoj: 348 membroj. — *Estraro*: Prez.: PAUL NYLÉN; vicprez.: W. WAHLUND; sekr.: FR. SKOG; kas.: ADOLF LARSON; bibl.: RUDOLF PEHRSSON. — *Adreso*: Stockholm 1.

### SVISIO.

Svisa Esperanta Societo (S. E. S.). — *Fondo*: 1902. — *Organizo*: S. E. S. estas unuiĝo de lokaj grupoj; ĝi ankaŭ havas izolajn membrojn, kie ne ekzistas grupo. La ĝenerala kunveno elektos ĉiujare ĉefgrupon, kiu funkcias kiel Centra Komitato. — *Kof.*: —, 50 Fr. por ĉiu grupano; 1 Fr. por izola membro. — *Organo*: “Svisa Espero”. — *Servoj*: Okazigo de kunvenoj kaj de ekzamenoj (du gradoj). Eldono de propagandiloj. Oficiala reprezento de l’Esperanta movado en Svisio. — *Stato*: 16 grupoj, 260 membroj. — *Estraro*: Prez.: JEAN WENGER; vicprez. kas.: G. STROELE; sekr.: FINO E. STRAUB. Ĉefgrupo: Esp. Grupo de Neuchâtel. — *Adreso*: Ĉe la Prez., Côte 113, Neuchâtel.

### NORD-AMERIKO.

\*Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko (E. A. N. A.). — *Organo*: “Amerika Esperantisto”. — *Adreso*: West Newton Mass.

### ARGENTINO.

\*Argentina Esperanto-Asocio. — *Organo*: “Argentina Esperantisto”. — *Adreso*: Belgrano 865.

### BRAZILIO.

\*Brazila Ligo Esperantista. — *Organo*: “Brazila Esperantisto”. — *Adreso*: Praza 15 de novembro, Rio de Janeiro.

### JAPANIO.

\*Japana Esperanto-Asocio. — *Organo*: “Japana Esperantisto”. — *Adreso*:

### Fakaj societoj.

#### Literaturaj:

Esperantista Literatura Asocio. — *Fondo*: 1911. — *Organizo*: Povas aliĝi ĉiu Esperantisto, kiu per libro, gazetartikoloj aŭ poemoj pliriĉigis nian literaturon. — *Kof.*: 4 Fr. Fr., 3 Fr. Sv., 2 ŝ. 6 p., 2 FMk., 2 Kr. Sk., 2 P., 5 L., 1 G., 0,5 D. — *Servoj*: Konatiĝo inter verkistoj, reciproka helpo, korektado de verkoj. — *Estraro*: Prez.: SINO M. HANKEL; sekr.: FINO J. ZSCHEPANK. — *Adreso*: Ĉe la Prez., Nicolaistr. 18, Dresden.

Brita Literatura kaj Debata Societo. — *Fondo*: sept. 1917. — *Organizo*: Konsistas el individuoj. Komitato de 22 membroj. — *Kof.*: Por membroj de BEA 2 s. 6 p., por aliaj personoj en la Britaj



insuloj 5 s., aliaj landoj 2 s. — *Organo*: "Literaturo". — *Servoj*: Kritikado de manuskriptoj, informoj pri malfacile tradukeblaj frazoj, pri gramatikaj kaj lingvaj demandoj, prunto de verkoj, konsiloj pri verkoj tradukotaj, informoj literaturaj. — *Stato*: 210 membroj. — *Estraro*: Prez.: JOHN MERCHANT; sekr.: CHARLES H. EDMONDS. — *Adreso*: Ĉe B. E. A., 17 Hart Street, London W. C. 1.

### *Komercaj*:

*Komitato por komuna komerca lingvo*. — *Adreso*: 57. Muirkirk Road, Catford, London S. E. 6.

### *Religiaj*:

*Eklezia Esperantista Ligo*. — *Fondo*: 1918. — *Kot.*: 3 sh. aŭ 6 sh. — *Organo*: "La Eklezia Revuo". — *Servoj*: Kunligas anojn de ĉiuj eklezioj, celas helpi al la reunigo de Kristanoj, propagandas Esp. ĉe profesioj kaj aliaj kleruloj, utiligas Esp. en ĉiuspeca religia kaj literatura agado. — *Adreso*: Pastro A. J. ASHLEY; hon. sekr.: FARNLEY TYAS VICARAGE, Huddersfield (Angllando).

*Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista* (I. K. U. E.). — *Organo*: "Espero Katolika". — *Adreso*: Pro L. KOLLER, parohestro, Göttweig, l. p. Furth (Aŭstrio).

*Ligo de Katolikaj Esperantistoj Germanaj*. — *Adreso*: M. MIELERT, prez., Werderstr. 35, Breslau.

*Aŭstria Katolika Ligo Esperantista*. — *Adreso*: L. SIEDL, vicprez., Robert Hamerlinggasse 9, Wien.

### *Socialaj*:

"*Liberiga Stelo*". — *Kot.*: 4.— Fr. — *Adreso*: 23 rue Boyer, Paris XX.

"*Germana Laborista Esperantista Asocio*". — *Organo*: "Germana Laborista Esperantisto". — *Estraro*: FR. HEGEWALD, Aternstr. 36, Hannover.

## Gazetoj Esperantistaj (nuntempe aperantaj).

### I. Internaciaj.

*Esperanto*. Oficiala organo de UEA. Monata. F. 1904, 20 p., 32×21 cm. *Dir.*: H. HODLER †. *Adr.*: Museumsstr. 14, Bern (Svis.). *Ab.*: 10.— Fr. jare. Kun membreco de UEA 12,50 Fr.

*Oficiala Gazeto Esperantista*. Monata. F. 1908, 12 p., 25×16 cm. *Red. kaj Adr.*: 51 rue de Clichy, Paris. *Ab.*: 5.— Fr. jare.

*Internacia Socia Revuo*. Monata. F. 1912, 16 p., 22×14 cm. *Red. kaj Adr.*: W. NUTTERS, Ostadestraat 94, Amsterdam (Nederlando). *Ab.*: 2,50 Fr. jare.

*Esperantista Laboristo* (Le Travailleur Espérantiste). Monata. F. 1920, 8 kaj 2 p., 29×22 cm. *Red.*: E. ADAM. *Adr.*: 24 Bd. Beaumarchais, Paris. *Ab.*: 5.50 Fr. jare. (Internacia gazeto kun nacilingva aldono).

*Internacia Komerca Revuo*. Monata. F. 1919, 20 p., 23,5×15 cm. *Red.*: DR<sup>o</sup> H. UNGER. *Adr.*: Hauptpostfach 6104, Zürich (Svisio). *Ab.*: 5.— Fr. jare.

*Literaturo*. Trimonata gazeto Esperanta. F. 1919, 24 p., 18×12,5 cm. *Red.*: CHARLES H. EDMONDS. *Adr.*: 254 Wightman Road, London N 8. *Ab.*: 2/6 ŝ. Brita Imperio; 3 ŝ.

*Esperanta Ligilo*. Universala gazeto por la blinduloj. Monata. F. —, 46 p., 26×18 cm. (En Braila skribo). *Red.*: H. THILANDER. *Adr.*: Majorsgatan 12, Stockholm (Svedio). *Ab.*: ne montrita.

*La Eklezia Revuo*. Organo de la Eklezia Esperantista Ligo. F. 1918, 24 p., 25×16 cm. *Red.*: Pastro A. J. ASHLEY. *Adr.*: FARNLEY TYAS VICARAGE, Huddersfield.

*Espero Katolika*. Oficiala organo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. Monata. F. 1903, 24 p., 22,5×15,5 cm. *Red.*: Pastro L. KOLLER. *Adr.*: JOHANN SCHRÖDER, Kaiserstrasse 10a, Wien VII. *Ab.*: 12.— Fr. sv. jare.

*Kristana Espero*. Trimonata revuo. F. 1920, 32 p., 22,5×16 cm. *Red.*: Ĉefpastro H. PÄTIÄLÄ. *Adr.*: S<sup>ro</sup> HUGO SALOKANNEL, Laihia (Finnlando). *Ab.*: 10.— Fm. enlande; 5.— svisaj Fr. eksterlande.

*La Esperantisto*. Organo de Esperanta Universitato Popola. Monata. F. 1919, 4 p., 41×29 cm. *Red.*: DR<sup>o</sup> ARDANTE POPOLAN. *Adr.*: Postamt 34, Wien II/L. *Ab.*: 1 Fr. jare aŭ 4 Resp. kup.

*La Unuigita Tuthomaro*. Monata. F. 1918, 4 p., 27×19 cm. *Red.*: Pastro W. HEYDORN. *Adr.*: Bahai Verlag, Hamburg 35. *Ab.*: 6.— M. enlande; 7.50 M. eksterlande.

## II. Naciaj.

## AŬSTRIO.

**Nova Tempo.** Monata. *F.* 1919, 12 p., 30×23 cm. *Red.:* D<sup>ro</sup> Ed. Sós. *Adr.:* Tuchlauben 18, Wien I. *Ab.:* 30.— K.

## BELGIO.

**Nia folieto.** Monata. *F.* 1919, 8 p., 21,5×18 cm. *Red.:* Esperanto Klubo "La Progreso". *Adr.:* Place du Commerce, 11 Gand. *Ab.:* 1,75 Fr.

## BRITIO.

**British Esperantist.** The Official organ of the British Esperanto Association. Monata. *F.* 1905, 16 p., 24×18,5 cm. *Red. kaj Adr.:* British Esperanto Association, 17 Hart street, London W C 1. *Ab.:* 5 ŝ. jare.

## BULGARIO.

**Bulgara Esperantisto.** Organo de la Bulgara Esperantista Societo. Monata. *F.* 1919, 24 p., 23×16 cm. *Red. kaj Adr.:* Pl. Sveta Nedelja 6, Sofia. *Ab.:* 20 levoj enlande, 5.— Fr. sv. eksterlande.

## ĈEĤOSLOVAKIO.

**La Progreso.** Ĉeĥoslovaka Organo Esperantista. Monata. *F.* 1918, 12 p., 27×19 cm. *Red.:* B. TITTL. *Adr.:* Radynska 10, Plzen. *Ab.:* 12.— K. ĉ.

## FINNLANDO.

**Esperanta Finnlando.** Organo de Esperanto Asocio de Finnlando. Monata. *F.* 1918, 22 p., 23,5×16 cm ilustrata. *Red.:* VILHO SETÄLÄ. *Adr.:* Esperanto Oficejo de Finnlando, Teatterikuja 3, Helsinki I. *Ab.:* 30 Resp. kup. jare, 17 Resp. kup. duonjare.

## FRANCIO.

**Franca Esperantisto.** Oficiala organo de la S. F. P. E. Monata. *F.* 1908, p. 24,5×19 cm. *Red.:* P<sup>ro</sup> TH. CARL. *Adr.:* Rue de Clichy 51, Paris. *Ab.:* 8.— Fr. enlande, 10.— Fr. eksterlande.

**Le Monde Espérantiste.** Organe universel absolument indépend. Monata. *F.* 1908, 8 p., 32,5×24,5 cm. *Red.:* A. FRECHAS. *Adr.:* 3 Rue Sophie Germain, Paris XIV. *Ab.:* 3.— Fr. enlande, 4.— Fr. eksterlande jare.

**Fluganta Skribilo.** Stenografa gazeto. Monata. *F.* 1913, 4 p., 31×21 cm. *Red.:* P. FLAGEUL. *Adr.:* 9 Bd. Voltaire, Issy (Seine). *Ab.:* 2,50 Fr. (Hektografiita).

**Komercio per Esperanto.** Monata. *F.* 1919, 8 p., 22,5×16 cm. *Red.:* P. FLAGEUL. *Adr.:* 9 Bd. Voltaire, Issy (Seine). *Ab.:* 2,50 Fr. (Hektografiita).

## GERMANIO.

**Germana Esperantisto.** Oficiala Organo de Germana Esperanto Asocio. Monata. *F.* 1903, 16 p., 24×18,5 cm. *Red. kaj Adr.:* ADER & BOREL, Struvestr. 40, Dresden 1. *Ab.:* 10.— M. jare, eksterlande 15.— M.

**Germana Laborista Esperantisto** (Deutscher Arbeiter-Esperantist). Oficiala organo de la Germana Laborista Esperantista Asocio. Monata. *F.* 1914, 4 p., 37×26,5 cm. *Red.:* P. RAUSCHENBACH. *Adr.:* F. HEGEWALD, Asterstr. 36, Hannover. *Ab.:* jare 6,— M. enlande, 7,— M. eksterlande.

**Esperanto Praktiko.** Unterhaltungs- und Fortbildungsblatt für Esperantisten deutscher Zunge. Monata. *F.* 1919, 16 p., 23×15 cm. *Red.:* FR. ELLERSIEK. *Adr.:* Wissmannstr. 46, Berlin S 59. *Ab.:* 8.— M. jare. Eksterlande: 9.— M.

## HISPANIO.

**Hispana Esperantisto.** Oficiala Organo de Andaluzia Federacio. Monata. *F.* 1915, 16 p., 22,5×16 cm. *Red.:* JULIO MANGADA ROSENÖRN. *Adr.:* S<sup>ro</sup> J. MANGADA ROSENÖRN, majoro de la Inf. Regt. Galicia No. 19, Jaca (Huesca). *Ab.:* 4 pes. jare.

**Monata Bulteno de la "Aplech Esperanto Grupo".** Monata. *F.* 1919, 8 p., 21,5×15,5 cm. *Red. kaj Adr.:* Mendizabal 3, Sabadell (Hispanio). *Ab.:* ne montrita.

## HUNGARIO.

**Hungara Esperantisto.** Oficiala organo de la Hungarlanda Esp. Societo. Monata. *F.* 1918, 8 p., 24×15,5 cm. *Red.:* PETRO TURZÓ. *Adr.:* Szentháromság utca 30, Szeged. *Ab.:* 20,— Kr. jare, 10,— Kr. duonjare.

## ITALIO.

**Esperanto Itala Revuo** (Itala Esperantisto). Organo Ufficiale della Federazione Esperantista Italiana. Monata. *F.* 1915. *Red. kaj Adr.:* Esperanto Domo, Via Spiga 29, Milano. *Ab.:* 4,— L. enlande; 5.— L. eksterlande.

**L'Esperanto.** Monata. *F.* 1914, 16 p., 25×17,5 cm. *Red. kaj Adr.:* A. PAOLET, S. Vito al Tagliamento (Italio). *Ab.:* 4,05 L. enlande, 5,— Fr. eksterlande jare.

## NEDERLANDO.

**La Holanda Pioniro.** Oficiala organo de la Ned. Societo Esp. "La Estonto estas Nia". Monata. *F.* 1908, 16 p., 23,5×15,5 cm. *Red.:* H. C. MEES. *Adr.:* J. L. BRULIN, 37 Paul Krugerlaan, 's Gravenhage. *Ab.:* Senpage por membroj, 1,25 fl. jare enlande, 2,10 fl. eksterlande.

**Nederlanda Katoliko.** Officieel Orgaan van den Nederl. R.-Kath. Esperantistenbond. Monata. *F.* 1910, 8 p., 21×12,5 cm. *Red.:* P.

HEILKER. *Adr.*: Th. C. SIMONS, Vrouw Jannestraat 23b, Rotterdam. *Ab.*: 1,50 fl. enlande, 1,80 fl. eksterlande.

**Nederland Esperanto.** Orgaan ter verbreiding van de Wereldhulptaal Esperanto in Nederland. *Semajna. F.* 1917, 4 p., 25×16 cm. *Red.*: JOHN GABRIELS. *Adr.*: C. G. STERKENBURG, Spitaalstraat 3, Zutphen. *Ab.*: —, 25 fl. kvaranjare.

## POLIO.

**German-pola Esperantisto.** Monata. *F.* 1919, 4—6 p., 29×23 cm. *Red.*: A. PANKRATZ. *Adr.*: Bromberg, Brenkenhoffstr. 13c. *Ab.*: 4,— M. jare.

## SVEDIO.

**La Espero.** Oficiala organo, por Sveda Esperanto Federacio kaj Norvega Esperantista Ligo. Monata. *F.* 1913, 8 p., 29,5×22,5 cm. *Red.*: PAUL NYLEN. *Adr.*: Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1. *Ab.*: Por Svedio: 3,50 Kr., Norvegio: 4,— Kr., Eksterlande: 4,50 Kr.

## SVISIO.

**Svisa Espero.** Oficiala organo de la Svisa Esperanta societo. Monata. *F.* 1903, 8 p., 22,5×14 cm. *Red.*: A. THONNEY. *Adr.*: Epinettes 3, Lausanne. *Ab.*: 2,50 Fr. enlande, 3 Fr. eksterlande, jare.

## AMERIKO.

**Amerika Esperantisto.** Official organ of The Esperanto Association of North America. Monata. *F.* 1907, 16 p., 23×15 cm. *Red.*: SIMO I. M. HORN kaj N. W. FROST. *Adr.*: American Esperantist Company, West Newton (Mass.). *Ab.*: 1,— Dol. jare.

**Argentina Esperantisto.** Oficiala organo de Argentina Esperanto Asocio. Monata. *F.* 1915, 4 p., 27×18,5 cm. *Red. kaj Adr.*: Belgrano 865, Buenos Aires (Argentino). *Ab.*: jare 2 Dol. enlande, 5.— Fr. eksterlande.

**Brazila Esperantisto.** Oficiala organo de Brazila Ligo Esperantista. Monata. *F.* 1909, 8 p., 27,5×18 cm. *Red. kaj Adr.*: Praça Quinze de novembro, Rio de Janeiro (Brazilo). *Ab.*: 3 Dol. enlande, 5 Fr. eksterlande, jare.

**Esperanto.** Organo del Centro Esperantista "Nova Sento". Monata. *F.* 1919, 8 p., 26,5×18 cm. *Red. kaj Adr.*: Santa Fé 77, Bahía Blanca (Argentino). *Ab.*: 2,50 Dol.

## AZIO.

**La Revuo Orienta.** Organo de Japana Esperanto Instituto. Monata. *F.* 1919, 16 p., 23,5×15,5 cm. *Red.*: K. OSAKA. *Adr.*: Japana Esperanto Instituto Uŝigome Ŝin Ogaŭamaŝi III—14, Tokio. *Ab.*: 2,20 Jen.

**The World Salesman (La Monda Komercesto).** Monata. Kun 3 paĝa esperanta Aldono. *Red.*: R. H. DICK. *Adr.*: 76 Jamaŝitaĉo, Jokohama (Japanio). *Ab.*: 8.— Jen jare.

## La Esperanto-movado dum 1919.

La jaro 1919 estis por la Esperanto-movado periodo de ekrekonstruado. Malgraŭ ne favoroj ekonomiaj kondiĉoj kaj malordo ankoraŭ reganta en parto de Eŭropo, oni konstatas en pluraj landoj ĝojigan propagandan revigligon, kiun montras la aranĝo de kursoj, paroloj, ekspozicioj, en multe pli granda nombro da lokoj ol dum la militjaroj.

La landoj, pri kiuj plej ofte raportis la Esperanto-kroniko dum la lasta jaro, estis Britio, Germanio, Italio, Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Finnlando. Aparte citinda estas la enkonduko de nia lingvo en kelkajn Britajn lernejojn. La inspektistoj konstatis, ke la infanoj ĉie lernas Esperanton tiel facile kiel plezure kaj ĝia instruado havas plej favorajn rezultojn, el pedagogia vidpunkto. La urbestro de Milano oficiale aranĝis Esperanto-kursojn.

Sukcesaj Esperantistaj kongresoj aŭ kunvenoj okazis en Liverpool (394 ĉeestintoj), Glasgow, Helsingfors, Luzern, Mannleu (Katalunio), Sevilla, Sofia, Stockholm kaj Montreal. Ili helpis al propagando kaj ĉie montris ĉe la partoprenintoj la intencan kuraĝe repreni la laboron interrompitan aŭ malhelpitan de la milito. La XII<sup>a</sup> Universala Kongreso, okazonta en Hago, sendube favoros pli plenan restarigon de la ĉiulanda Esperanto-movado.

Notinda estis la uzado de Esperanto por *fakaj celoj*. Kiel pli frue en Francio kaj en Germanio, samideanoj en Aŭstrio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario, uzis nian lingvon por diskonigi per libroj aŭ broŝuroj la vidpunkton de sia nacio en la nunaj problemoj. Propagando de Esperanto ĉe *socialistoj* progresis en Francio, kiel reaperas la gazeto "*La Esperantista Laboristo*" kaj kie la kongreso de la grava labor-konfederacio alprenis deziresprimon favoran al Esperanto, en Italio, speciale en Milano, kaj en Portugalio. En Britio vikle laboras *Esperantista Eklezia Ligo*, kiu eldonas "*Eklezia Revuo*". En la *komerca fako* oni devas menci, krom la multaj servoj faritaj de la Delegitoj de UEA, la uzon de Esperanto ĉe la gravaj foiroj en Lyon, Leipzig, Frankfurt a. M. kaj Basel, la eldonadon de „*Internacia Komerca Revuo*“, la fondon de komercaj komitatoj por komuna lingvo en kelkaj landoj.

Fine, malgraŭ la nefacilaj eldonkondiĉoj, la Esperanta literaturo pliriĉiĝis je kelkaj ŝatindaj verkoj, kies liston ni aperigos en la venonta Jarlibro. Kelkaj gazetoj reaperis aŭ nove fondiĝis.

Modestaj estas la progresoj realigitaj dum 1919, sed ili almenaŭ montras, ke Esperanto ekreprenis sian antaŭeniradon kaj venkis la militkrizon, kiu disfaligis tiom de internaciaj organizaĵoj. De la agado de ĉiu Esperantisto dependas la efektivigo de novaj pli gravaj progresoj.

## UEA dum 1919.

La unua postmilita jaro estis por UEA, same kiel por ĉiuj institucioj, malfacilega pro la ĝenerala plialtiĝo de ĉiuj prezoj, al kio oni aldonu la, por nia internacia organizaĵo, ruinigan falon de la valutoj de la militintaj Eŭropaj landoj. Kiel rezisti al tiu danĝeriga krizo, estis nia ĉefa priokupo dum 1919.

Kun ĝojo ni konstatis pligrandiĝon de nia membraro kaj, en multaj regionoj, reviviĝon de la Esperanto-movado. Ĝuste pro tio ni ne povis lasi la Centran Oficejon en la dummilita stato kaj, por ke estu plenumbla la kreskanta laboro, estis necesa la dungado de du pluaj oficistoj (estis nur unu en 1918). El tio rezultis elspezoj, kiujn tute ne povis kompensi la kelkaj pluaj centoj da membroj. Nia situacio financa estas malfacila, ĉar unuflanke la elspezoj, pro la plialtiĝo de salajroj, de preskostoj, ktp., superas la antaŭmilitajn kaj aliflanke la enspezoj, pro la dummilita malkresko de la membraro, fariĝis multe pli malgrandaj. Ni do devis sekvi la vojon truditan de la cirkonstancoj kaj proponi plialtigon de la diversaj kotizaĵoj, nome 5 Fr. por membro, 12,50 Fr. por membro kun abono, 25 Fr. por subtenanto kaj 300 Fr. por dumviva membro. Per 369 voĉoj kontraŭ 11 (el 553 Delegitoj), la proponoj estis akceptataj de la Delegitoj, kiuj per tio klare montris, ke ili komprenas la necesecon starigi UEA sur pli firman financon bazon kaj volas certigi ĝian pluan ekziston.

Tamen, estas antaŭvideble, ke malgraŭ la duobligo de la kotizaĵoj, la enspezoj dum 1920 ne duobligos. Parto, espereble malgranda, de la membroj ne repagos, malgraŭ la tre favoraj kurzoj, je kiuj ni akceptas la fremdlandan monon, kaj pro la sama kaŭzo ni meze enspezos de la pagontoj verŝajne nur 2,50 ĝis 3 Svisajn Frankojn, anstataŭ la 4,50, je kiuj ni rajtas. Por kovri la antaŭvidatajn 20000 Fr. da elspezoj, ni do devus havi minimume 5000 membrojn.

Laŭ la bilanco publikigita en la marta numero de Esperanto la deficito dum 1919 atingas 9600 Fr. (2220 Fr. dum 1918). Ĝi estis amortizata per donaco da 7000 Fr. de la Prezidanto de UEA, Sro H. HÖDLER, kaj la resto per la Garantia Kapitalo. Sed tio estas eksterordinaraj enspezoj, kiuj preferinde devus esti uzataj por plivastigo de UEA anstataŭ por pago de kurantaj elspezoj. La movado de la

korespondaĵoj atingis 20491 (8354 en 1918). La nombro de la membroj estis 3115 (ĉiuj kategorioj kune) kontraŭ 1958 en 1918, do kresko de 58<sup>0</sup>/<sub>0</sub>. Pri la nombro de la servoj, statistiko pli malfrue aperos.

La gazeto *Esperanto* nun regule aperas monate kun 20 paĝoj kaj estas ŝatata de pli kaj pli vasta rondo de legantoj, sed malgraŭ ĝiaj progresoj, la elspezoj ne estas ankoraŭ kovreblaj per la enspezoj.

La *Adresaro*, kiun ni eldonis tuj post la translokiĝo de la Oficejo, ebligis reprenon de la internaciaj rilatoj kaj pli vastan uzadon de la Delegito-servoj.

La translokiĝo de la Oficejo, la financa reformo kaj, laste, malsano de la Direktoro, malebligis, ke UEA povu fari ĝis nun aliajn laborojn ol la preparon de tiu ĉi ampleksa Jarlibro. La enkonduko de nova statuto kaj la reelektado de la komitato, devis esti prokrastataj ĝis 1920. Cetere tiom longe kiom la financa stato de UEA restas malbona, estas por ĝi malfacile plivastigi ĝian agadon, kiel estus dezirinde. Ĉiu nova agado, serioze organizota, postulas pluajn oficistojn, presaĵojn kaj korespondon, t. e. elspezoj. La plej urĝa tasko estas do antaŭ ĉio la varbado de tia nombro da membroj, ke UEA havu pli fortikan financon fundamenton. Ni esperas, ke la nova jaro alportos tiurilate notindan progreson. Ĉiu al tio helpu!

## Praktikaj informoj pri UEA.

### Administro kaj financoj.

**Membroj.** — Ekzistas kvar kategorioj, nome:

*Membroj ordinarioj (M).* Ricevas la Jarlibron.

*Membroj-abonantoj (MA).* Ricevas la Jarlibron kaj la gazeton *Esperanto*. La kotizaĵo kaj abono, je rabatita prezo, nepre devas esti pagataj en unu fojo.

*Membroj-subtenantoj (MS).* Celas helpi al la Asocio per pli alta pago. Samaj rajtoj kiel membroj-abonantoj.

*Membroj dumvivaj (MD),* tie. personoj, kiuj akiras unu aŭ plurajn atestejn de la Garantia Kapitalo je 300 Fr. Svisaj. Ili havas la rajtojn fiksitajn en la regulaĵo pri Garantia Kapitalo kaj dumvive ne plu bezonos ion pagi por kotizaĵo aŭ abono, kiom ajn estos la prezo.

Pri la *kotizaĵoj* de la tri unuaj kategorioj en la diversaj landoj, vidu la spezialan tabelon, sur paĝo 75. En ĉiuj lokoj, kie estas Delegito, la diversaj kotizaĵoj (ankaŭ tiuj de membroj-abonantoj) estu nepre pagataj al la Delegito. Je ĉiuj kotizaĵoj la Delegito rajtas depreni ĉe la sendo procentaĵon da 10<sup>0</sup>/<sub>0</sub> por siaj kostoj.

**Esperantaj Entreprenej.** — Povas aliĝi kiel Esperantaj Entreprenej la firmoj, hoteloj, societoj, korporacioj, ktp., kiuj deziras konigi sian nomon inter la Esperantistaro kaj favori la agadojn de UEA. (Ni ne plu akceptas kiel entreprenojn la Esperantistajn grupojn kaj societojn, sed publikigas senpage en la Jarlibro la informojn pri ili sendatajn de la Delegitoj).

La Esperantaj Entreprenej ricevas specialan karton, la Jarlibron kaj rajtas enpresigi en la teksto de la Jarlibro informon de maksimume 40 vortoj. (Nomo kaj adreso kunkalkulitaj).

Pri la pago de la Esperantaj Entreprenej en la diversaj landoj, vidu la tabelon sur paĝo 75. La Delegito rajtas depreni ĉe la sendo procentaĵon da 20%. Sendante la kotizaĵon, la Delegito aldonu sur speciala folio tre legeble skribitan tekston por la enpresado en la Jarlibro.

**Administro.** — Por plifaciligi la varbadon de membroj, ĉiu Delegito ricevas provizon de *aliĝiloj* disdonataj al la personoj intereseblaj pri UEA. La pleniĝo de tiuj aliĝiloj ne estas deviga kaj ili ne estu sendataj al la Centra Oficejo.

Al ĉiu paginto la Delegito donu kvitancon eltrancitan el la *kvitanco* liverata de UEA. Se Delegito eksiĝas aŭ se okazas malakordigo inter li kaj membro, UEA rajtas postuli la kvitancon por kontrolo.

La Delegito notu la aliĝojn sur specialan *membroliston*, liveratan de UEA, kaj sendu ilin *kun la necesa monsumo* (se li ne havas konton ĉe la centra kaso), ne pli malfrue ol unu semajnon post ricevo, al la Centra Oficejo, aŭ al ĝia reprezentanto, en la landoj, kie ni havas tian pro la nesendebleco de poŝtmandatoj (Vidu la adresojn en tabelo de la kotizaĵoj). Por evitigi rekopiadon kaj tempoperdon, la Delegito estas insiste petataj noti la aliĝojn sur la specialaj membrolistoj sendataj de UEA aŭ, se ne plu estas, sur samformata kartono. Ĉiuj propraj nomoj estu tre legeble skribataj, per latinaj literoj; oni ne Esperantigu ilin.

Ĉiu membro ricevas senpere de la Centra Oficejo *membrokarton* aŭ banderolon sur ĝi algluotan kaj la *Jarlibron*, kiu kutime aperas printempe.

La *membreco* komenciĝas je la ricevo de la membrokarto kaj daŭras ĝis skriba eksiĝo. *Membroj ne eksiĝintaj ĝis 31. oktobro*, fino de la administra jaro, *ŝuldas la kotizaĵon* por la sekva jaro. La Delegito enkasigu la ŝuldatajn kotizaĵojn de la diverskategoriaj membroj ĝis fino de marto. Post tiu tempolimo la Centra Oficejo rajtos mem ilin enkasigi poŝte aŭ alimaniere, konservante por siaj kostoj la procentaĵon de la Delegito.

La abonoj por la gazeto *Esperanto* iras de januaro ĝis decembro. Kiu aliĝas kiel membro-abonanto post januaro ricevas la aperintajn numerojn. Oni atentu, ke la *favor-prezo por membro-abonanto*

devas esti pagata *en unu fojo*. Se oni pagas la kotizaĵon kaj la abonon aparte, oni devas ĉiun pagi taŭ ĝia, plena prezo; pro administraj kaŭzoj oni estas petata eviti tiun sistemon.

**Financoj.** — Ecepte en la landoj, kie ni momente devas havi reprezentanton pro la nesendebleco de poŝtmandatoj (vidu la tabelon de la kotizaĵoj), ĉiuj pagoj estu sendataj al: *Universala Esperanto-Asocio, Museumsstrasse 14, Bern* (ne sub la persona nomo de la Prezidanto, de la Direktoro aŭ de oficisto!).

La centra kaso *akceptas* Svisajn kaj internaciajn poŝtmandatojn, ĉiujn en banko ŝanĝeblajn valor-paperojn kaj stampitajn internaciajn respondkuponojn je valoro de 25 centimoj. Svisoj povas senkoste enpigi al "Esperanto", poŝta ĉeko N. 2600. Ĝi *ne akceptas* poŝtmarkojn, spemilajn ĉekojn aŭ transpagilojn, paperojn valorantajn nur enlande, ne stampitajn bankbiletojn el landoj, kie oni nun stampas ilin, ne stampitajn respondkuponojn.

Sendante monon oni nepre indiku *samtempe* por kiu celo kiel eble plej precize.

Ĉiu membro rajtas malfermigi *konton* ĉe la centra kaso laŭ jenaj kondiĉoj: Minimuma unua enpago: 40 Fr. Svisaj. Ĉiama minimuma bonhavo: 15 Fr. Svisaj. Intereso: 3% por aktiva saldo de 100 Fr. aŭ pli. Tiuj kontoj utilas por pagi kotizaĵojn, abonojn kaj sendi monon al aliaj personoj aŭ firmoj pere de la Centra Oficejo.

La administra kaj financa jaro komenciĝas je 1. novembro. La monsinistemo uzata en la librotendado de UEA estas la Svisa franko. La bilanco kaj financa raporto ĉiujare aperas en la gazeto *Esperanto*.

**Garantia Kapitalo.** — Ĝi konsistas el la pagoj por la atestoj de la dumvivaj membroj (garantiantoj) kaj utilas por plibonigi la financon staton de la Asocio, al kiu ĝi apartenas. La garantiantoj ricevas senpage la oficialan gazeton; ili voĉdonas la regularon pri la kapitalo kaj zorgas, per elektita administrantaro, pri ĝia konservado kaj uzado. Plie, ili povas repreni la reston de la enpagitaj sumoj, se pli ol la duono devis esti uzata por pagi defecitojn de la centra kaso aŭ se la Asocio dissolviĝas. Tiuj rajtoj nuligiĝas je la favoro de UEA post la morto de la garantiantoj. Ili ne estas ŝanĝeblaj sen la konsento de la garantiantoj mem.

La kosto de unu atesto de la nuna dua serio estas 300 Frankoj Svisaj. La Delegito deprenas procentaĵon da 10%.

Ĉiuj amikoj de UEA, kiuj havas la eblon tion fari, estas varme petataj mendi atestojn, ĉar pro la nunaj tre malfacilaj ekonomiaj kondiĉoj, nia Asocio ne povas ekzisti sen eksterordinara monhelpado.

**Devoj de la Delegito.** — Por ebligi la bonan funkciadon de UEA, ĉiu Delegito havas la devon akurate respondi la informetojn de la membroj, regule enkasigi la kotizaĵojn kaj zorge plenumi la administran



laboron rilatantan al sia ofico. Li legu la oficialan organon de UEA, ellernu Esperanton kaj interesiĝu je la interna disvolviĝo de la movado. Ĉefa parto de lia tasko estas la *varbado* de novaj membroj kaj Esperantiaj Entreprenoj. Al tio ankaŭ helpu ĉiuj ĝisnunaj membroj. La prospereco de la internacia Esperanto-movado dependas de forta UEA. Forta ĝi povas esti nur, se ĝi havas multajn membrojn en ĉiuj landoj. Antaŭ la milito UEA kalkulis sep mil membrojn. Ĉiu energie klopodu, por ke tiu nombro estu kiel eble plej baldaŭ reatingita.

*Tabelo de la kotizaĵoj kaj pagoj en nacia mono.*

**Rimarkoj:** En la posta tabelo oni trovas la prezojn de la diverskatego-riaj kotizaĵoj por la plej multaj Eŭropaj landoj. En la *Eŭropaj landoj ne nomitaj en tiu tabelo* (ekz. Estonio, Letonio, Litovio, Rumanio, Rusio, Ukrainio, k. a.), kie pro la nunaj cirkonstancoj kaj ne certaj komunikoj, UEA havas malmulte da membroj, oni bonvolu antaŭe interrilati kun la Centra Oficejo.

En la *ekstereŭropaj landoj* ne nomitaj en tiu tabelo, oni pagu laŭ la *Svisaj valoroj*.

Oni rimarkos, ke ni kalkulis la kurzojn tre favore al niaj membroj. Malpli ol la sube montritaj sumoj ni nenikaze akceptos. Komparante la diverslandajn prezojn, oni konstato, ke ili ne precize respondas al la oficialaj kurzoj, nek al la rilatoj, kiuj ekzistas inter ili. Ni estis devigataj tiel agi por ne peti monsumojn tiel altajn, ke ili malhelpus la plej multajn ĝisnunajn membrojn resti en la vicoj de UEA. Ni devis nin adapti al la enlandaj kondiĉoj, kaj, je la malprofito de nia kaso, sed je la intereso de nia Asocio, atentí pri la pagokapabloj de la membroj en la landoj ekonomie plej suferintaj de la milito. Tial ni esperas, ke la membroj el landoj kun ciferoj ŝajnantaj tro altaj konstatos nian bonvolon indulgi ilin, kaj ke tiuj el landoj pli riĉaj ne plendos, se de ili ni postulas relative pli multe. Oni pripensu, ke niaj elspesoj estas en Svisaj frankoj.

Ni atentigas, ke tiuj favoraj kurzoj valoras nur por la celoj indikitaj, sekve ne por la Garantia Kapitalo, la vendo de insignoj aŭ iuj komercaj peradoj. Oni ne rajtas pagi laŭ la prezoj de alia lando ol de sia. (Ekzemple, membro loĝanta en Nederlando ne rajtas pagi per Markoj aŭ Kronoj.)

En la dekstra kolono ni montris kiel kaj al kiu la mono estu pagota. El kelkaj landoj internaciaj poŝtmandatoj ne estas nun sendeblaj; ni do devis elekti reprezentanton, al kiu oni bonvolu pagi. En aliaj, kiel Germanio, ni petas, ke ĉa pli gravajn sumojn oni pagu al ni per naciaj bankbiletoj, kiujn ni laŭeble konservas ĝis pliboniĝo de la kurzo. Pri estontaj ŝanĝoj en la tabelo oni bonvolu legi la oficialan organon de UEA.

Landoj	Monunuoj	Membro M	Membro-Abonanto M.A	Membro-Subtenanto M.S	Esperantia Entrepreno	Kiel kaj al kiu pagi
Aŭstrio	Kronoj	30.—	75.—	150.—	75.—	Al nia reprezentanto: Sro Dro Ed. Sós, Tuchlauben 18, Wien I.
Belgio	Frankoj	6.—	15.—	30.—	15.—	Al nia reprezentanto: Sro Henri Petiau, 60 Bd. St. Liévin, Gent.
Britio	Ŝilingoj	4/-	10/-	1 Pf. St.	10/-	Senpere. Per poŝtmandato, bankĉeko aŭ Britaj bankbiletoj.
Bulgario	Levoj	15.—	37.50	75.—	37.50	Al nia reprezentanto: Sro St. Minkov, Nishka ul. 77, Sofia.
Ĉeĥo-slovakio	Kronoj	12.—	30.—	60.—	30.—	Al nia reprezentanto: Sro František Kavan, Poděbř. tř. 6 Plzeň.
Danio	Kronoj	3.50	8.75	17.50	8.75	Senpere. Per poŝtmandato aŭ bankĉeko.
Norvegio						
Svedio	Kronoj	3.50	8.75	17.50	8.75	
Finnlando	Markoj	10.—	25.—	50.—	25.—	Al nia reprez.: Esperanto-Oficejo Teatterikuja 3 Helsinki.
Francio	Frankoj	6.—	15.—	30.—	15.—	Senpere. Per poŝtmandato, bankĉeko aŭ Francej bankbiletoj.
Germanio	Markoj	12.—	30.—	60.—	30.—	Senpere. Per ŝtataj bankbiletoj.
Hispanio	Pesetoj	5.—	12.50	25.—	12.50	Senpere. Per poŝtmandato aŭ bankĉeko.
Hungario	Kronoj	30.—	75.—	150.—	75.—	Al nia reprez.: Sro Paŭlo Balkanyi, Hajos u. 15, Budapest VI.
Italio	Liroj	7.—	17.50	35.—	17.50	Senpere. Per poŝtmandato aŭ bankĉeko.
Jugoslavio	Kronoj	20.—	50.—	100.—	50.—	Al nia reprezentanto: Sro Ivan Křepelka, Vinkovci (Bosnio).
Nederlando	Guldenoj	2.50	6.25	12.50	6.25	Senpere. Per poŝtmandato aŭ bankĉeko.
Polio	Markoj	12.—	30.—	60.—	30.—	Al nia reprez.: Sro A. Oberrotman, Krak.Przedmiescie10, Warszawa
Svisio	Frankoj	5.—	12.50	25.—	12.50	Senpere. Senpage per poŝtĉeko III. 2600.
Usono	Dolaroj	1.—	2.50	5.—	2.50	Senpere. Per poŝtmandato, bankĉeko aŭ Usonaj bankbiletoj.

Atentu! El la supre notitaj sumoj, la Delegito deprenu por si 10% de la kotizaĵoj de membroj, membroj abonantoj, membroj subtenantoj kaj 20% de la pagoj de Esperantiaj Entreprenoj kaj Jarlibro-anoncoj.

## Uzado de la servoj.

**Fundamenta principo:** Ĉiu membro rajtas uzi la servojn de la Delegitoj. La servoj mem estas senpagaj, sed la uzanto devas repagi la elspezojn de la Delegito, rezultantajn de la petita servo (respondo, specialaj klopodoj, k. t. p.).

**Pri kio oni povas peti informojn:** Pri komerco, industrio, trafiko, laboro, dungado, salajroj, vojaĝoj, turismo, instruado, junulaj, studentaj kaj virinaj aferoj, lokaj institucioj, k. t. p.

**Pri kio oni ne povas peti informojn:** Pri komerca pagokapablo, morala indeco de persono (konfidenciaz informoj). Tamen, tiuokaze la Delegito rajtas interrilatiĝi kun loka agentejo, kiu sin okupas pri tio. La Delegito ankaŭ rajtas rifuzi servojn, kies plenumon li juĝas kontraŭa al sia konscienco aŭ honoro.

**Kiam oni rajtas plendi:** Se inter landoj kun regulaj poŝtaj rilatoj infornpeto ne estas respondita de la Delegito *kvin* tagojn post ĝia ricevo, la petinto rajtas plendi ĉe la Centra Oficejo, kiu faros la necesan enketon. Oni ankaŭ plendu okaze de malbone farita servo.

**Pri kio ĉiu devas atenti:** 1<sup>e</sup> Skribi *tre legeble*, precipe la adresojn. Tiuj ĉi estu skribataj ĉiam en nacia lingvo kaj per latinaj literoj.

2<sup>e</sup> Skribi sur la adresflanko, post la nomo, la titolon *Delegito de UEA*, tiel ke, se la Delegito forestas, la letero estu transdonata al Vicedelegito.

3<sup>e</sup> Aldoni post la subskribo la *numeron de la membrokarto* kaj ripeti sur ĉiu sendaĵo la *plenan adreson de la sendinto*. Stampo kun nomo kaj adreso estas rekomendata.

4<sup>e</sup> Aldoni al la infornpeto (eĉ se ĝi estas presaĵo) *internacian respondkuponon* (valoro: 25 centimoj) aŭ *respond-poŝtkarton*.

5<sup>e</sup> Skribi ĉiam en *Esperanto*, sola oficiala lingvo de UEA. La uzo de nacia lingvo nuligas la rajton al plendo. (Escepte kie nuntempe la politikaj cirkonstancoj devigas al ĝia uzado.)

6<sup>e</sup> Afranki sufiĉe la poŝtaĵojn (blua poŝtmarko por leteroj kaj ruĝa poŝtmarko por poŝtkartoj).

7<sup>e</sup> Ne forgesi, ke la Delegiteco estas honora ofico, ofte penplena, kiun la Delegitoj afable akceptis por utili al Esperanto. Sekve oni faciligu ilian taskon, ne enuigante ilin per petoj tute malgravaj aŭ proponoj pri interŝanĝado de kartoj, poŝtmarkoj, migrantaj leteroj, k. t. p. (Pri ĉitijaj petoj oni presigu anoncon en la gazeto *Esperanto*). Por ke UEA prosperu, ĝi devas esti reprezentata de seriozaj homoj. Tiuj ne deziras perdi tempon por aferoj ne indaj je ili.

Tiuj reguloj valoras laŭsence ankaŭ por la rilatoj kun la *Centra Oficejo de UEA*.

**Dum vojaĝo:** Ĉar la Delegitoj plej ofte ne disponas libere sian tempon, la membroj vojaĝantaj skribe *informu* la Delegiton pri sia vizito almenaŭ *24 horojn antaŭe*.

La Delegito havas la devon helpi la vojaĝanton. Li donu al li ĉiujn informojn por plifaciligi la restadon kaj la vizitadon de la vidindaĵoj, rekomendu hotelon, prezentu lin ĉe la kunveno de la grupo, k. t. p. Sed oni memoru, ke ne estas la tasko de la Delegito atendi la fremdulojn en la stacidomoj, ilin akompani, fari komisionojn por ili, k. t. p. Se Delegito konsentas al tio, ĝi estas privata afablaĵo, sed ne lia devo.

.....  
 Telegramo:  
 Retten-  
 mayer  
 Wiesbaden  
 .....



.....  
 Telefonoj:  
 12, 115, 124,  
 242, 2376,  
 6611  
 .....


**L. RETTENMAYER**  
**G. m. b. H.**  
**MAINZ-WIESBADEN-KÖLN**

Fondita 1842

Ekspedo, transportoj per veturiloj kaj aŭtomobiloj. Transporto de meblaro; eksterlanda kaj transoceana ekspedo. Transitejo. Deponejoj kun areo de 25000 m<sup>2</sup>.

**Vojaĝoficejo**

Ŝipagentejo,  
 oficiala forsendo de vojaĝpakaĵoj.  
 Ĉiuspeca asekuro.



## Societo de la Telegrafaj Kodoj

(Société des Codes Telegraphiques)

### Georges Lugagne

Societo anonima kun kapitalo de 250 000 Frankoj

Societa sidejo: 32 Rue Edmond-Rostand, Marseille  
Telefona: 5000 / Adreso telegrafa: „Telecode“

# INTERNACIA KODO LUGAGNE

Seplingva (kun Esperanto) en unu volumo.  
Ebligas esprimi ĉion kun ŝparado  
de 30-40 % rilate aliajn  
ĝeneralajn kodojn.

Prezo de l'volumo seplingva: 150.— fr.

#### Privataj ĉiulingvaj kodoj

donantaj la maksimuman  
certecon kaj ŝparadon.  
Ĉiuj studoj kaj projektoj  
estas farataj tute senpage.

## Vortaro Greka - Esperanta kaj Esperanta - Greka

De Dro Anakréon Stamatiadis,  
Saneca Inspektoro.



Tiu-ĉi verko entenas tri partojn:

- 1e. Antaŭparolo kun la bildo de nia neforge-  
sebla majstro Dro L. L. Zamenhof, kaj gramatikon  
de Esperanto.
- 2e. Grekan Esperantan vortaron el 421 paĝoj  
enhavantaj 26000 vortojn de Greka kaj Grek-  
moderna lingvoj (la vortoj de Grekmoderna  
lingvo surhavas steleton kaj respondas al la plej  
korektaj vortoj de la Greka lingvo).
- 3e. Esperantan-Grekan radikaron.  
Volumo en 16 (13/20). Prezo: 5 draĥmoj.  
(Per rekomendita poŝto: 6 draĥmoj).

Havebla ĉe:

**J. Kollaro, Rue du Stade 44  
Ateno**

## LIBROJ-PRESADO-PAPERĴOJ

Nia celo estas servadi niajn samideanojn, kaj kvankam ni devas kompreneble havi profiton, ni intence aranĝas, ke tiu profito estu malalta, por ke ni povu kiel eble plej bone servi niajn samideanojn.

### Sekve:

1. Se vi bezonas paperon iuspecan, presitan aŭ ne, en kvantoj grandaj aŭ malgrandaj.
2. Se vi bezonas librojn pri ia ajn temo, novajn aŭ nenovajn. :: :: :: :: ::

**PERMESU, KE NI CITU AL VI PREZOJN; — PETU NIAN PREZARON;**

**BECK kaj KO.**

**Presistoj, Papervendistoj kaj Librovendistoj**

Vendas pogrande kaj pomalgrande

**WISBECH, Cambs.**

**LONDON**

Park Hall

49, Finsbury Pavement,

\* \*

E. C. 2

Anglujo

## Edition "Lutetia" Nova serio de Francaj klasikaĵoj

Prezo en Francujo: 3.— fr. senrabate  
Prezo en Britujo: 2 s. 6 p. senrabate

Kelkaj volumoj en tiu-ĉi serio estas:

34. Lettres et Pamphlets . . . P. L. Courier
35. De l'Education des filles . Fénelon
36. Théâtre I . . . . . Marivaux
37. Les Tragiques . . . . . D. d'Aubigne
38. Théâtre II . . . . . Marivaux

Novaj volumoj regule aldonataj

## OEUVRES COMPLÈTES DE VICTOR HUGO

Nova eldono en 51 volumoj

Prezo en Francujo: 3.— fr. senrabate  
Prezo en Britujo: 2 s. 6 p. senrabate

## COLECCION ESPANOLA NELSON

Prezo en Francujo: 3.— fr. senrabate  
Prezo en Britujo: 2 s. 6 p. senrabate

Kelkaj titoloj en tiu-ĉi serio estas:

20. Lectures Españolas Azorin
21. Amor de Perdicion Ca Castello Branco
23. El Buscon . . . . . Quevedo
24. La Novena . . . . .

Novaj volumoj regule publikigataj

Skribu por plena listo al:  
**THOMAS NELSON SONS LTD.**  
189 Rue Saint Jacques, Paris / 35-36 Paternoster Row, London / Parkside Works, Edinburgh.



## "COLLECTION NELSON"

Prezo en Francujo: 3.- fr. senrabate

Prezo en Britujo: 2 s. 6 d. senrabate

Ĉi-tiu serio reprezentas la plej bonan Francan literaturon kaj nun enhavas la nomojn de la plej famaj verkistoj. Traduko Francen de famaj libroj el aliaj lingvoj enhaviĝas. Tole bindita.

**Volumoj antaŭ nelonge publikigitaj:**

- |  |                 |
|--|-----------------|
| 141. Madame Corentine . . . . .                      | René Bazin      |
| 142. Monsieur Jean . . . . .                         | Ferdinand Fabre |
| 144. Memoires I . . . . .                            | Mme. d'Abrantes |
| 145. Memoires II . . . . .                           | Mme. d'Abrantes |
| 146. Le mariage de Chiffon                           | Gyp             |
| 147. Voyageuses . . . . .                            | P. Bourget      |
| 149. Suzanne Normis . . . . .                        | Henry Gréville  |
| 161. Les derniers jours du<br>Fort de Vaux . . . . . | Henry Bordeaux  |
| 163. Les Déracinés . . . . .                         | Maurice Barrés  |
| 164. L'Appel au Soldat . . . . .                     | Maurice Barrés  |
| 166. Les captifs délivrés . . . . .                  | Henry Bordeaux  |

**Novaj volumoj regule publikigataj.**

Skribu por plena listo al:

**THOMAS NELSON SONS LTD.**

189 Rue Saint Jacques, Paris / 35-36 Paternoster Row London-Parkside Works Edinburgh

# THORNTON & K-IO, LTD.

**Kauĉuko fabrikantoj**

4 Hanover Street, Edinburgh (Skotlando)

\* \* \*

**Fabrikantoj**

de rimenoj, tuboj k. t. p. Valvoj,  
ŝraŭbumoj, tukoj k. t. p. el kau-  
ĉuko por Inĝenieroj, paperfabri-  
kado, bierfarado, distilado k. t. p.

**Specialaĵo:**



La "Amazona" kauĉuka rimeno  
Specimenoj kun prezoj laŭ peto

Telegramoj: Thornton, Edinburgh

# ESPERANTO OFICEJO DE LYON

ricevinta la jan premion en la konkurso de UEA ĉe la 5a kongreso en Barcelona

SINO A. FARGES, direktorino, 36 Rue Victor Hugo, LYON

Esperantistaj kaj ĉiunaciaj flagetoj el silko:	Esperantistaj flagoj:
1 flageto 4×6 cm 0.50 fr.	El kotono . . 20×30 cm 3.— fr.
1 flageto 10×15 cm 1.25 fr.	58×80 cm 6.— fr.
1 flageto 20×30 cm 4.— fr.	75×115 cm 9.— fr.
(sen stango) Ĉiuspecaj insignoj	El lanstamino 75×115 cm 14.— fr.
	95×115 cm 20.— fr.

**Poŝtkartoj speciale eldonitaj de la Esperanto-Oficejo de Lyon:**  
 "Ruĝa Kruco" 4 malsamaj poŝtkartoj koloritaj . . . . . 1.— fr.  
 "Esperanto ĉe la lernejo", 3 malsamaj poŝtkartoj koloritaj kun seslingva teksto . . . . . 0.75 fr.

**Vidaĵoj kun Esperanta teksto:**  
 El Lyon: 20 malsamajn poŝtkartojn . . . . . 1.75 fr.  
 El Vienne: 20 malsamaj poŝtkartoj . . . . . 1.75 fr.  
 El St. Etienne: 12 malsamaj poŝtkartoj . . . . . 1.— fr.

**Esperantistaj karikaturoj:**  
 32 malsamaj poŝtkartoj Sroj Agache, Archdeacon, Arnhold, Aymonier, Van der Biest-Andelhof, Sro Van der Biest, Boirac, Bord, Bourlet, Bricard, Camescasse, Cart, Chaussegros, Chavet, Dro Dor, Durieux, Dro Fiŝer, von Frenckell, Générmont, Hodler, de Ménil, Mudie, Pichon, Pollen, Poncet, Privat, Rollet de l'Isle, Rosenstock, C. Rousseau, de Saussure, Schmid, van Schoor . . . . . 5.— fr.

**Esperantistaj sigelmarkoj:**  
 Steloj kun la vorto "Esperanto" 100 ekz. 3.— fr., 500 ekz. 12.— fr.  
 Steloj kun la vortoj "Esperanto venkos" . . . . . 100 ekz. 3.50 fr., 500 ekz. 12.— fr.  
 Surskribaĵetoj kun la vortoj "Oni korespondas en Esper." 100 ekz. 3.— fr., 500 ekz. 14.— fr.

**Esperantistaj juveloj:**  
 (brila aŭ nebrila, blankaj kaj verdaj gemoj enkadrigitaj per neoksidebla blanka metalo). Broĉo kun stelo kaj ornamaĵo 11.— fr.  
 Stanĝeta broĉo kun steleto 8.— fr. Pendjuvelo kun granda stelo 10.— fr. Kravatpinglo kun stelo 3.— fr. Pendjuvelo kun stelo kaj ornamaĵo 13.— fr. Kravatpinglo kun steleto kaj rondo 5.— fr.  
 Bela fotografalaĵo de Dro L. L. Zamenhof, subskribita de l'majstro (gluita sur verda kartono: 2.— fr.).

**Busto de Dro L. L. Zamenhof**, verkita de Jean Chorel (la majstro pozis en Lyon en 1909)  
 18 cm×13 cm . . . . . 10.— fr. 65×45 cm . . . . . 400.— fr.  
 Ligna kesteto plie . . . 2.— fr. (Ununura ekzemplero)

La aĉetanto pagas ĉiam la sendelspezojn plie. Ĉiuj prezoj estas montrataj per Francaj frankoj. Specialaj prezoj pogrande por la oficejoj kaj grupoj.

TRIA PARTO.

## CENTRA ORGANIZO DE UEA.

### Komitato.

*Prezidanto:* HECTOR HODLER †

#### *Membroj:*

P. BLAISE, 125 Hambalt Road, Clapham S. W. 4, *London*.  
 A. CARLES, 3 Rue des Balances, *Béziers*, Hérault, Francio.  
 J. KARSCH, Dresdener Strasse 60, *Weixdorf-Lausa*, Sachs., German.  
 P. LINARES, Hinto San Basilio, *Cordoba*, Hispanio.  
 H. C. MEES, Sundastraat 21, 's *Gravenhage*, Nederlando.  
 ED. PRIVAT, 2 Chemin des Roches, *Genève*, Svisio.  
 F. ROCKMANN, Kaiserstr. 61, *Magdeburg*, Germanio.  
 S. SZABUNIEVICZ, Rusio (Mankas informoj deponitaj 1917).

### Centra Oficejo.

Museumstr. 14, Bern

Telefono: 5790 — Poŝtĉeka konto: III. 2600 — Banko: Handelsbank (Banque Commerciale), Bern.

*Direktoro:* ED. STETTLER.

*Sekretario:* HANS JAKOB.

*Kasisto:* RENAUD RICHEZ.

*Oficistino:* SINO M. KIRKCALDY.

La oficejo estas vizitebla ĉiun labortagon de 9—12 kaj 2—5, escepte sabaton posttagmeze. Vizitantoj uzu la rektan tramlinion Nro 6 de la stacidomo al la transrivera kvartalo "Kirchenfeld", haltejo „Bubenbergrasse“.

## Dumvivaj Membroj.

Personoj fariĝintaj Dumvivaj Membroj konforme al la Regularo kiu valoris de 1910 ĝis oktobro 1912. La kvin personoj kun \* estas samtempo Garantiantoj.

Spoĵ J. A. ARAKELOV, Lozovaja; BÜNEMANN, Hamburg; J. CAMESCASSE,\* Paris; DAINELLI, Genova; E. FASCE, Genova; A. FIŠER, Tiflis; † FR. FLECK,\* München; † J. FORESTIER,\* Genève; F. W. HIPSLEY, Birmingham; F. H. LEWIS, Gawler; P. LINARES,\* Cordoba; H. MANGELSDORF, Magdeburg; MARTINET, Paris; Sino MILSOM, Genève; † H. B. MUDIE, London; PRIESTMAN, Bradford; † TH. ROUSSEAU, Dijon; S. SCHULZ, Bydgoszcz; SHARPE,\* Torquay; P. STOJAN, Kragujevac; A. STROMBOLI, Genova; R. VAUGHAN, Tokio.

## Listo de la Garantiantoj

ordigita ĝis fino de junio 1920.

AAB, S., Horsens, Dan. — ALKSNIS, J., Riga. — ALĚMAN, RUIZ, Habana. — DE ALLENDE, V. O., Bilbao. — ALONSO, S. M., Madrid. — ALTENSTADT, G., Zürich. — AMUNDSEN, J. (Fino), Kristiania. — ARNHOLD, H. (D<sup>ro</sup>), Dresden. — BARCOCK, A. H., San Francisco. — BAQUET, J., Pihen, Franc. — BARNES, C. E., Brackley, Angl. — BARTHOLOMEW, A. M. (Fino), Letchworth, Angl. — BARTHOLOMEY, E. M. (Fino), Letchworth, Angl., (2). — W. BAYES, Leicester, Angl. — BEVAN, W., Seacombe, Angl. — † BICKNELL, CLARENCE, Bordighera, Ital., (5). — BLACKETT, E. R., Bath, Anglio. — BLICHER, L. (Sino), Kjöbenhavn. — BONNIER, M., Lyon. — Bostona Esperanto-Asocio, Boston. — BOON, N. (Fino), Haag. — BREDALL, J., Croydon, Angl., (2). — BRUNET, C., Bordeaux. — BUCHANAN, G. D., Glasgow, (2). — BÜNEMANN, O., Hamburg. — BURET, Sainville, Franc. — BUŠUJEV, J. A., Moskvo. — CAMESCASSE, J., Paris. — CAMUFFO, A., Trieste. — CARLES, A., Béziers, Franc. — CARTER, R., Brooklyn. — CHANDELLIER, C., Troyes, Franc. — CHILARD, L., Versailles, Franc. — CHRISTEN, A., New York. — CLARK, G., Wynberg, S. Afriko. — COHENDY, E., Lyon. — COTÉ, G., Utrecht. — COTTRELL, F. G., Washington. — COXE, H., Bathaston, Angl. — DALMAU, D. J., Barcelona. — DAINGERFIELD, San Francisco. — DELANOE, G., Nemours, Franc. — DIDRICHSON, V., Odessa. — DIETL, Graz, Aŭstrio. — DINSLAGE, J. F., London. — DONKER, H. S., Amsterdam. — DORÉ, F., Troyes, Franc. — DORÉ, L., (Sino). — EHNIS, E., Mexico. — ELTEN, E., Hildesheim, German., (2). — ETARD, J., Rouen.

— FAIRMAN, C. A., London. — FALLEK, E., Paris. — FARGES, A. (Sino), Lyon. — FARMER, H. F. S., Woodford, Angl. — FINHOLDT, J. (Fino), Kristiania. — † FLECK, F., München. — FRÉCHET, M., Franc. — FRIDRICHSEN, E., Riga. — † FORESTIER, J., Genève. — FRENCKELL, K. v., Dresden. — FROST, C., Los Angeles, Usono. — GABERT, E., St Etienne, Franc. — GALE, W. A., Southwick, Angl. — GANDELL, F. P., London. — † GIERSBERG, D<sup>ro</sup>, Berlin. — GIESELER, W., Berlin-Weissensee. — GILLETT, M. C. (Sino), Banbury, Angl. — GOEDECKE, A. (D<sup>ro</sup>), Berlin. — GOEMANS, H., Rotterdam. — GOODLIFFE, F., Letchworth, Angl., (2). — GOUCHON, M., Lyon. — † GRAEGER, O., Magdeburg. — GRINEVA, A. M., Staročerkask, Rus. — HARRIS, W. H., Ystradgynlais, Angl. — HART, R., Harlesdon, Angl. — HAY, A., Wallasey, Angl. — HECHTL, J., München. — HERLEMONT, H., Paris. — HETZEL, H. V., Philadelphia. — HILDING, G., Hartford, Usono. — HIRZEL, F., Zürich. — † H. HODLER, Genève, (20). — HOLMES, J. D., Bradford. — HUTTIN, H., Bourg, Francio. — ISRAELSEN, M., Svendborg, Dan. — ISTELE, L., Wiesbaden. — JAZDANI, A., Teheran. — JOHNSON, E., Portsmouth. — JONIDES, C. A., Hove, Angl. — KAWECKI, W., Berlin. — KOCH, A., Varsovio. — KOPOSOV, V. A., Simbirsk, Rus. — KRASSOVSKI, N. B., Kiŝinev, Rus. — KRESTANOF, J., Bern. — V. D. LAARSCHOT, E. J. M., Bussum, Ned., (2). — LAGESTE, F., Dax, Francio. — LAHENS, Paris. — LEROUUDIER, H., Lyon. — † LETORD, AÏN-Sefra, Algerio. — LHERMITTE, J., Paris. — LINARES, P., Cordoba, Hisp., (2). — LOCHHEAD, J. F., Baden, Svis. — LUCAS, F., Bamberg, German. — LUKAŠ, M., Jilemnice, Ĉeĥ. — MAC CALLUM, R. B., Paisley, Skotl. — MACLEAN, N., Aigüilas, Hisp. — MADLENER, H., Nürnberg. — MAKSIMOV, Kutais, Georgio. — MALLET, E., Genève. — MARAURY, R., Huesca, Hisp. — MARCHAND, W., Boston. — MARRIOT, R., Ashton o. M. — MARSEILLE, Ch., Paris. — MASKE, R., Dresden. — DA MAYA, E., Lisboa. — MAZZUCONI, A., Buenos-Aires. — MEGAHY, B. P., Preston, Angl. — MILLNER, M. E., Leek, Angl. — MOODY, R. H., Leeds, Angl. — † MOSCHELES, F., London. — MOSER, F., Rüegsau, Svis. (2). — MOUTINHO, A., Meda, Port. — † MUDIE, H. BOLINGBROKE, London. (20). — MULERT, A., Hochwaldhausen, Germ. — MURIBÖ, M., Bekkelagshöiden, Norv. — NEWCOMB, L. F., Cochrane, Kanado. — NIX, J. P., Romsey, Angl. — Norvega Esp. Ligo, Kristiania. — NOWELL, H. N., Northwich, Angl. — D'OLIVEIRA MARQUES, F., Para, Braz. — OMLOR, A., St. Ingbert, aarl. — PÄTIÄLÄ, H. J., Tampere, Finn. — PARKER, C. H., Auckland, Novzel. — PECKOVER, P. H. (Fino), Wisbech, Angl., (4). — PEDRAZZINI, S., Locarno, Svis. — PETIT, L. (Sino), Dijon. — PHILIPPS, E. G., London. — PINAGEL, V., Aachen, Germ. — PINO, A., Valencia. — PITT, W., Bath, Angl. — POENGEN, H., Kaiserswerth, Germ. — POINTER, M., St. Neots, Angl. (2). — POLLEN, J. (D<sup>ro</sup>), London. — PONCET, L., Lyon. — PRIESTMAN, A. T., Bradford. — PRINZ, D., Bekkelagshöiden,

Norv. — PRIVAT, Ed., Genève. — RAGNELL, H. (Sino), Luopioinen, Finn.  
— RICHARDSON, A., Washington. — † RIFLING, B., Kristiania. —  
RISHKOW, N., Totjma, Rus. — ROCKMANN, F., Magdeburg. — RODIONOV,  
A., Baku. — ROLLET DE L'ISLE, Paris. — ROSEBOOM, J. L., Rochester,  
Usono. — RUMSEY, E. M., Milton, Usono. — SCHACHT, P., Zürich. —  
SCHIFF, L., Berlin. — SCHILLING, E., Bern. — SCHOofs, F., Ant-  
werpen. — Generalo SÉBERT, H., Paris, (4). — Sevilja Esp. Grupo,  
Sevilla. — SHARPE, R., Torquay, Angl. — SHIDANI, B., Teheran. —  
SILBERNIK, J., New York. — ŠIMONEK, B. R., Chicago. — SING, P.  
(Sino), Zürich. — SMITH, CLOUGH J., Folkestone. — VON ŠMURLO, W.,  
Riga. — SNIDER, M. D., Walhonding, Usono. — † SORIANO, T., Sevilla.  
— SOULIER, H. (D<sup>ro</sup>), Lyon. — STECKIEWICZ, Kielce, Pol. — ED.  
STETTLER, Bern, (20). — Svisa Esp. Societo, Bern. — SZABUNIEWICZ, S.,  
Moskvo. — † SZENTMARIAY, D., Audapest. — † SZENTMARIAY, Ev. Betegh,  
Budapest. — TAGLIAFERRI, B., La Plata. — TAMKE, O. (Fino), Agathen-  
burg, Germ. — TIARD (Sino), Parc St Maur, Franc. — TISSOT-MARTIN,  
L. (Sino), Basel. — TSUJI, R., Nishinarigun, Japan. — VERMAAS, B. J.,  
Rotterdam. — VÖRÖS, C. (D<sup>ro</sup>), Budapest. — WALDMANN, A., Lyon. —  
WARDEN, J. M., Edinburgh. — † WENGLER, E., Berlin. — WILSON, J.,  
Leek, Angl. — † WOHLGRATH, F., Genève. — ZÜNDEL, M. (Fino), Bern.

### Dua Parto.

Mendis po 1 atesto (300 fr.):

BÜNEMANN, E. (Sino), Hamburg. — ODIORNE GLEASON, Worcester,  
Usono. — TAYLOR, CHAS S., Haverford, Usono.

## ADRESARO

DE LA DELEGITOJ, VICDELEGITOJ,  
KAJ ERPERANTISTAJ GRUPOJ.

### Rimarkoj pri la Adresaro.

Tiu ĉi Adresaro estas ordigita ĝis fino de junio 1920. Por ĉiuj  
postaj ŝanĝoj aŭ korektoj oni vidu la oficialan organon de UEA.

Krom la adreso de la Delegito kaj Vicdelegito, ni aldonis noton  
pri la lokaj Esperantistaj organizaĵoj kun ilia adreso, kunvenejo kaj  
laŭeble la tago kaj horo de la kunvenoj. Tiuj informoj estas senpage  
presataj; ili devas esti sendataj pere de la Delegitoj.

La urbonomoj estas en nacia lingvo. Kiam la formo de tiu nomo  
estas malmulte konata eksterlande, ni ankaŭ citis la pli konatan nomon.  
Ekz.: *Pilsen* (vidu *Plzeň*). La landa aparteno de la urboj estas  
montrita laŭ la informoj havitaj ĝis fino de februaro 1920.

La personoj, kiuj estus pretaj preni sur sin la taskon de Delegito  
en urbo, kie UEA ne estas ankoraŭ reprezentata, estas petataj skribi  
al la Centra Oficejo. Kie ekzistas grupo, sed neniu Delegito, tiu ĉi  
estu laŭeble proponata de grupo.

### Mallongigoj.

<i>D</i>	= Delegito.	<i>M</i>	= mardo.
<i>VD</i>	= Vicdelegito.	<i>Mk</i>	= merkredo.
<i>EG</i>	= Esperantista grupo.	<i>Ĵ</i>	= ĵaŭdo.
<i>EO</i>	= Esperanto-oficejo.	<i>V</i>	= vendredo.
<i>Adr.</i>	= adreso.	<i>S</i>	= sabato.
<i>Ejo</i>	= kunvenejo.	<i>D</i>	= dimanĉo.
<i>L</i>	= lundo.		

La tagoj kaj horoj de la grupo-kunvenoj estas notitaj inter krampoj  
Ekz.: (L 8<sup>1/2</sup>) = kunvenoj ĉiulunde je 8<sup>1/2</sup> h.

**A**

**Aachen** (Germanio, Rheinland).

*D:* VICTOR PINAGEL, Lütticher Strasse 38.

**Aalborg** (Danio, Jütland).

*D:* EDVARD ALFRED HANSEN, prokuristo, Villa "Hjem", Kaerlundsvej.

*EG: Adr.:* Fino KIRSTEN PETERSEN, Louisegade 7.

**Aarhus** (Danio, Jütland).

*D:* CARL ADOLPH HVORSLEV, instruisto, Trøjborgvej 32.

*VD:* C. A. ETZEROD, orajisto, Valdemarsgade 5.

**Abbeville** (Francio, Somme).

*D:* CLAUDE NEULLIÈS, kuracisto, 8 Rue Saint-Jean des Prés.

**Aberdeen** (Britio, Skotlando).

*D:* Fino C. M. MAC KENZIE OGSTON, 48 Gladstone Place, Woodside.

**Abo** (vidu *Turku*).

**Accrington** (Anglio, Lancashire).

*D:* EDWIN ROBERTS, oficisto, 1 Owen Street.

*VD:* JAMES BARON, oficisto, 102 Manchester Road.

*EG: Adr.:* 64 Devonshire Street. *Ejo:* 54 Blackburn Road (L 8 h.).

**Agram** (vidu *Zagreb*).

**Aguilas** (Hispanio, Murcia).

*D:* NORMAN MACLEAN, komercisto.

**Aïn-Beïda** (Afriko, Alĝerio).

*D:* Fino ADRIENNE RIPPERT, instruistino, Ecole des filles.

**Ala** (Italio, Trentino).

*D:* MARIO MONDINI, komercisto.

**Alagoinhas** (Brazilo, Bahia).

*D:* CARLOS DE SOUZA CUNHA, juĝeja skribisto, Rua 24 de Fevereiro 14.

*VD:* JOSÉ MILITÃO DOS ANJOS, komercioficisto, av. Severino Vieira.

**Alexandria** (Egiptio).

*D:* DEMETRIUS A. YASSÉMIS, asekuristo, Rue Centrale 1, c/o P. VAROUXAKI, PO, Box 1046.

**Alger** (Afriko, Alĝerio).

*D:* FRANCOIS TOUSSAINT MENDE, inĝeniero, 19 Rue Henri Martin.

**Allahabad** (Hindio, United Provinces).

*D:* K. SAMUEL, sekretario, c/o Postmaster.

**Alvarado** (Usono, Alameda County, California).

*D:* ALBERT NORRIS, poŝtestro.

**Amsterdam** (Nederlando, Noord Holland).

*D:* PAUL JAKOBUS BONDIX, librotenisto, Nassaukade 59 II.

*VD:* C. J. HORST, fervoja oficisto, P. Nieuwlandstraat 78 III.

*EG:* Unua Societo Esp. *Adr.:* W. A. J. BECHT, Hoogeweg 68.

"Laborista Societo Esp." *Adr.:* C. F. EVERTS, Albert Cuyppstraat 169. *Ejo:* Damrak 53 (J 8 h.).

"L'Oriento". *Adr.:* H. G. MULDER, P. Nieuwlandstr. 79.

*Ejo:* Eltetho, Javastraat 120 (Mk 8 h.).

"La Progreso". *Adr.:* P. SCHOUTEN, v. Beuningenstr. 130.

*Ejo:* Damrak 53.

Propaganda Komitato: S<sup>ro</sup> JAC LEM, Marnixkade 48 III.

**Angers** (Francio, Maine-et-Loire).

*D:* LOUIS BLOT, fabrikdirektoro, 15 Rue Sarret-Terrasse.

*VD:* HENRI MUFFANG, licea profesoro, 7 Rue du Fresne.

*EG: Adr. Ejo:* Ancienne Cour d'Appel, place des Halles (L 20 h.).

**Annapolis** (Usono, Maryland).

*D:* JAMES L. SMILEY, pastro de la Protestanta Episkopa Eklezio, 130 Prince George Street.

*EG: Adr.:* Ôe la Del.

**Annecy** (Francio, Haute Savoie).

*D:* (vakas).

*VD:* Sino PERRENOT, profesorino, Lycée des Jeunes Filles.

**Ansbach** (Germanio, Bayern).

*D:* UDO ZIEGLER, revizoro, Feuchtwanger Strasse 65.

*EG: Adr.:* Ôe la Del. *Ejo:* Gastejo „Hähnchen", Alte Poststrasse 5 (lasta J monate, 8 h.).

**Antibes** (Francio, Alpes Maritimes).

*D:* THEODORO AUDISIO, florkulturisto, 32 Rue Vauban.

**Antofagasta** (Ĉilio).

*D:* JACINTO FONOLLA, komercisto, 516 Casilla.

**Antwerpen** (Belgio).

*D:* FRANS R. SCHOofs, komercisto, Kleine Beerstraat 45.

**Anvers** (vidu *Antwerpen*).

**Apolda** (Germanio, Thüringen).

*D:* MAX WOLTER, komercisto, Bahnhofstrasse 59.



**Arbroath** (Skotlando, Forfar).

*D:* STEWART HUTCHISON, vinvendisto, 47 Guthrie Port.

**Arden** (Usono, Delaware).

*D:* DONALD STEPHENS, artmetiisto.

*VD:* FRANK STEPHENS, artisto kaj paroladisto.

*EG: Adr.:* ĉe la Del. *Ejo:* The Gild Hall.

**Arnhem** (Nederlando, Gelderland).

*D:* D<sup>ro</sup> CORNELIS JACOB BAART DE LA FAILLE, gimnazia profesoro, Röellstraat 6.

**Arona** (Italio, Lago Maggiore).

*D:* FRANCO PERUCCHETTI, komercoficisto.

**Aschaffenburg** (Germanio, Bayern).

*D:* CARL PFEIFFER, fervojoficisto, Brentanostrasse 3 II.

*EG: Adr.:* ĉe la Del. *Ejo:* Restoracio Forstgarten, Cornelienstrasse (Mk 8 h.).

**Atemaxac** (Meksikio, Jal.).

*D:* ERNESTO E. GUERRA.

**Atlanta** (Usono, Georgia).

*D:* CECIL STOCKARD, kuracisto, Candler Building.

**Auerbach i. V.** (Germanio, Sachsen).

*D:* HUGO GERISCH, fabrikisto, Kaiserstrasse 60.

*VD:* PAUL NESTLER, profesoro, Kaiserstrasse.

*EG: Adr.:* ĉe la Del. *Ejo:* Bahnhofswirtschaft Ila klaso (V 8 h.).

**Augsburg** (Germanio, Bayern).

*D:* L. K. STRECKFUSS, bankoficisto, Stadtjägerstr. 22.

*VD:* FINO IDA HORNUNG, Masestrasse B 38.

*EG: Adr.:* Esp.-Societo. *Ejo:* Hôtel Eisenhut (M 8 h.).

**Aumale** (Francio, Seine-Inférieure).

*D:* LÉON TRUFFARD, farmaciisto, 14 Rue aux Juifs.

**Austin** (Usono, Minnesota).

*D:* CHARLES H. GIBBONS, asekuristo, 407 Winona Street.

**Autun** (Francio, Saône-et-Loire).

*D:* FRANÇOIS DEJUSSIEU, presisto-libristo, 4 Grand' Rue.

*VD:* BENOIT PIAT, 29 Rue aux Cordiers.

*EG: Adr.:* ĉe la Del. *Ejo:* Hôtel de Ville (Mk 20 h.).

**Avignon** (Francio, Vaucluse).

*D:* FINO MARIE ROUSSET, 6, route de Marseille.

## B

**Bad** (vidu la koncernan urbon: Ekz.: *Bad-Reichenhall* vidu *Reichenhall*).

**Baden** (Svisio, Aargau).

*D:* ALFRED EGG, komercisto, Postfach 17621 aŭ Gartenstrasse 5, Wettingen.

**Bahia Blanca** (Argentino, Buenos Aires).

*D:* LUIS GASTANAGA, oficisto, Calle Terrada 577.

*VD:* VICENTE ORLANDO, oficisto, Calle Santa Fé 77.

*EG:* Centro Esperantista "Nova Sento". *Adr. Ejo:* ĉe la Del. (M 8 h.).

**Balaton** (Usono, Minnesota).

*D:* ALBERT PETERSON, terkulturisto, Route 4, Boxe 68.

**Bamberg** (Germanio, Bayern).

*D:* KARL HILLER, bankoficisto, Hindenburgplatz 8.

*EG: Adr.:* Postschliessfach 4. *Ejo:* Kafejo Schönlein (Ĵ 8 h.).

**Banbury** (Anglio, Oxfordshire).

*D:* SINO MARY C. GILLET, The Elms.

**Banjoewangi** (Java, Besoeki).

*D:* A. KNEGT, oficisto de kafoplantejo, Soc. An. Kali Bendo.

**Barcelona** (Hispanio).

*D:* FRANCISCO GORGUES TORREDEFLOT, studento, 6 Orteu (Cruz Roja).

*D:* FRANCISCO PINOL MAGRANÉ, ornama pentristo, Amalia 16-20 II.

*EG:* "Paco kaj Amo". *Adr. Ejo:* 1 Asturias (ĉiutage 19 h.).

"Fajro". *Adr.:* F. GORGUES TERREDEFLOT, 68 San Gervasio.

*Ejo:* Instituto de Estudios Superiores.

"Barcelona Stelo". *Adr. Ejo:* 88 Marques del Duero (ĉiutage 21 h.).

"Komerca Fako" del Centre Autonomista de Dependents del Comerç. *Adr. Ejo:* 18 Rambla Sta. Mónica (ĉiutage).

"Aŭroro". *Adr. Ejo:* 222 Laforja (L Mk V 20 h.).

"Nova Sento". *Adr. Ejo:* 156 Enna (M Mk Ĵ V 20 h.).

"Libera Stelo". *Adr. Ejo:* 62 Montaña.

"Kulturó kaj Libereco". *Adr. Ejo:* 25 Mercaders (ĉiutage).

**Bardijov** (Ĉeĥoslovakio, Slovenka).

*D:* D<sup>ro</sup> VILMOS AUSTERLITZ, kuracisto.

**Barmen** (oni sin turnu al la Del. de Elberfeld).

- Barraba** (Aŭstralio, New South Wales).  
D: EDGAR A. PRYKE, librotenisto, c/o Barraba Garage, Box 27.
- Barranquitas** (Porto-Riko).  
D: FINO PEPITA ROJAS, instruistino, Apartado 3.
- Barros** (Porto-Riko).  
D: JOSÉ N. BERRIOS, komercisto.
- Barrow in Furness** (oni sin turnu al la Del. de Grange-over-Sands).
- Barry** (Anglio, Wales).  
D: RICHARD THOMAS EVANS, lernejestro, 12 Park Grove.
- Bartfá-Bartfeld** (vidu *Bardijov*).
- Basel** (Svisio).  
D: PAUL A. BURGERMEISTER, kasisto, Kannenfeldstrasse 19.  
EG: *Adr.* Ejo: Hotel du Nord.
- Bassein** (Hindio, Burma).  
D: L. W. CRONKHITE, pastro, Box 10.
- Bath** (Anglio, Somerset).  
D: E.-R. BLACKETT, presejestro, 15 Southgate Street.  
VD: FINO L. C. SILCOX, instruistino, 2 Alpha Villas, Lyncombe Hill.  
EG: *Adr.*: êe la Del.
- Bayonne** (Usono, New Jersey).  
D: FINO JULIA GOLDZIER, redaktorino, 26 East 45th Street.
- Bayreuth** (Germanio, Bayern).  
D: DR<sup>o</sup> ALFRED SEEBERGER, profesoro, Bürgerreuther Strasse 17II.
- Baza** (Hispanio, Granada).  
D: EMILIO CASTELLANO VITA, konfitisto, 5 Alhondiga.
- Beaujeu** (Francio, Rhône).  
D: LÉON MÉRAS, vinberkulturisto, Garennes.
- Bari** (Italio, Bari).  
D: ADAM LACALENDOLA, Via Dante Alighieri 323.
- Batak** (Bulgario, Peŝtersko).  
D: PETR V. TOŠKOV, oficisto.
- Beauvais** (Francio, Oise).  
D: ALBERT GRIVES, prokuratora ĉefoficisto, 8 Rue de Nully d'Hécourt.  
VD: LÉON DEMARCY, direktoro de procesoficejo, 18 Rue Sadi-Carnot.  
EG: *Adr.*: êe la Del.

- Bedlington** (Anglio, Northumberland).  
D: GEORGE HENRY GIBSON, ministro, 10 Fairbairns Yard, Vulcan Place.
- Belgrad** (vidu *Beograd*).
- Bengtstors** (Svedio, Elvsborgs Län).  
D: CARL WINBERG, kasisto.
- Bensen** (vidu *Höflitz*).
- Beograd** (Jugoslavio, Serbio).  
D: DRAGOMIR ANDONVIČ, Universitata profesoro, 23 Brankova.
- Berchtesgaden** (Germanio, Bayern).  
D: ISIDOR FUCHS, presejo-posedanto, Buchdruckerei.
- Berlin** (Germanio, Brandenburg).  
D: A. H. KRETZSCHMANN, komercisto, Marktstrasse 1, Rumelsburg.  
VD: FINO MARTHA RABE, Bandelstrasse 45 III, N. W. 21.  
EG: *Adr.*: L. SCHIFF, Königgrätzer Strasse 61, S. W. 11, Telef. 2453, Lützow. Ejo: Restoracio "Rotes Haus", Nollendorffplatz 3 (la 1 an M monate, 7 h.).  
EO: FR. ELLERSIEK, Verlag und Buchvertrieb, Wissmannstrasse 46, S. 59.
- Berlin-Weissensee** (Germanio, Brandenburg).  
D: WALTHER GIESELER, oficisto, Prenzlauer Promenade 14.
- Bern** (Svisio).  
D: ROBERT BOLLIGER, bankoficisto, Maulbeerstrasse 17 IV.  
VD: RUDOLF FUCHS, oficisto, Nägeligasse 6.  
EG: *Adr.*: êe la Del.  
*Centra Oficejo de UEA*: Museumsstrasse 14 (Telef. 5790).
- Ber-Rechid** (Maroko).  
D: RAOUL GLEYZE, instruisto.
- Besançon** (Francio, Doubs).  
D: RAOUL BRETILLOT, bankoficisto, 70 Grand' Rue.  
VD: FINO LOUISE MATHEY, 8 Square St. Amour.
- Beuthen** (Germanio, Oberschlesien).  
D: KLEMENS WIECZOREK, fervoja oficisto, Virchowstrasse 14.
- Bexleyheath** (Anglio, Kent).  
D: A. V. THOMSON, komizo, 40 Oaklands Road.
- Beziérs** (Francio, Hérault).  
D: FINO JEANNE FLOURENS, 111 Avenue George Clémenceau.
- Bialystok** (Polio).  
D: S. JAKOB ŠAPIRO, komercisto, Lipowa 33.

**Bilbao** (Hispanio, Biscaya).

*D:* VICTOR O. DE ALLENDE, inĝeniero, Deputacion.  
*VD:* JOSE STA MARIA, skribisto, Alameda de Urquijo 27.  
*EG: Adr.:* Libreria Fuentes. *Ejo:* Kafejo Teatro Arriaga (S 9 h.).

**Birmingham** (Anglio, Warwickshire).

*D:* CECIL CHARLES GOLDSMITH, komizo, 92 Douglas Road, Acocks Green.  
*VD:* WILLIAM HENRY GARBUTT, ĵurnalisto, Prince's Chambers, Corporation Street.  
*EG:* Birmingham Esperanto Societo. *Adr.:* ĉe la Del. *Ejo:* Oriental Café, Hill street (Mk 6 h. 1/2).  
 "Bourneville Grupo". *Ejo:* Cadbury Brothers (Mk 5 h. 1/2).  
 "Farm St. Hockley Grupo". *Ejo:* Farm St. Adult School (D).  
 "West Bromwich Grupo". *Ejo:* Y. M. C. A. (L 7 h. 1/2).

**Biskoupyk na Mor. Krumlov** (Ĉeĥoslovakio, Moravio).

*D:* RUDOLF F. HAIN, instruisto.

**Bitterfeld** (Germanio, Prov. Sachsen).

*D:* ALFRED SCHIEBEL, komercisto, Neue Strasse 39.  
*VD:* W. PRZYTYLLA, Kaiserstrasse.  
 "Laborista Grupo". *Adr.:* W. WINDER, Innere Bismarckstrasse. 18. *Ejo:* Restoracio Hohenzollern (Ĵ 7 h. 1/2).

**Bochum** (Germanio, Westfalen).

*D:* ADOLF GROTHE, oficejestro, Canalstrasse 58.  
*VD:* "Progreso". *Adr.:* ĉe la Del. *Ejo:* Restoracio Therman, Brückstrasse 70 (V 8 h.).

**Bodenbach** (Ĉeĥoslovakio, Bohemio).

*D:* KARL GÖLL, fervojisto, Kröglitz 707.  
*VD:* BRUNO SÜNDERMANN, doganisto, Schmelze 203.  
*EG: Adr.:* *Ejo:* Zeughaus.

**Böhmisch-Kamnitz** (Ĉeĥoslovakio, Bohemio).

*D:* ANTON OHME, librotenisto, Augustushöh 83.  
*EG: Adr.:* ĉe la Del. *Ejo:* Hotelo Post (Ĵ).

**Bologna** (Italio, Emilia).

*D:* ACHILLE TELLINI profesoro, Via de Gombruti 7 II.  
*VD:* FILIPPO PALMEGGIANI, advokato, 1 Via Manzoni.  
*EG:* Emilia Esp. Asocio. *Adr.:* ĉe la Videl.

**Bolton** (Anglio, Lancashire).

*D:* JOSEPH MILLER, 31 Mellor Grove, Smithills.  
*VD:* JOHN BIRTWISTLE, fervoja oficisto, 20 Primrose Street.  
*EG: Adr. Ejo:* Corporation Chambers, Corporation Street (Ĵ 7 h. 30).

**Borås** (Svedio, Elfsborgs län).

*D:* J. A. BLOMQUIST, oficisto, Box 38.  
*EG: Adr.:* ĉe la Del. *Ejo:* Kafejo Manhem (Ĵ).

**Bordeaux** (Francio, Gironde).

*D:* CHARLES BRUNET, mekanikisto, 59 Cours Victor Hugo.  
*VD:* PIERRE MARLY, spegulisto, 11 Rue Adrien Baysseance.  
*EG: Adr.:* 12 Rue Saint-Fort. *Ejo:* 13 Rue Boudet, ĉe "Assoc. des Anc. élèves de l'Ecole Supérieure de Commerce et d'industrie" (S 20 h. 1/2).

**Boulogne-sur-mer** (Francio, Pas-de Calais).

*D:* GEORGES BAIRE, inĝeniero, 74 Rue de Pipots.  
*VD:* VICTOR HAIGNÉRE, oficisto, 149 Rue du Moulin-à-Vapeur.  
*EG:* Verda Stelo. *Adr.:* 27 Boulevard Mariette.

**Boulogne-sur-Seine** (Francio, Seine).

*D:* HORACE COTELLE, bankoficisto, 51 Rue de la Mairie.

**Bourg-en-Bresse** (Francio, Ain).

*D:* HENRY HUTTIN, notario, 3 Rue du 4 septembre.  
*VD:* LOUIS POCHON, arkitekturo, 4 Avenue Alsace-Lorraine.

**Bourg-la-Reine** (Francio, Seine).

*D:* PIERRE MUFFANG, ĥemiisto, 14 Avenue Galois.  
*EG: Adr. Ejo:* ĉe la Del. (S 20 h. 1/2).

**Bournemouth** (Anglio, Hampshire).

*D:* JOHN E. ESSELMONT, kuracisto, 84 Southbourne Road.  
*EG: Adr.:* Fino BARRY, 37 Spurgeon Road. *Ejo:* ĉe la Del. (M 4 h. 30).

**Bradford** (Anglio, Yorkshire).

*D:* A. TUKE PRIESTMAN, ŝtatoficisto, 5 Ashburnham Grove.  
*VD:* JOHN T. HOLMES, lankombestro, Roundwood Grange, Baildon.  
*EG: Adr.:* ĉe la VD. *Ejo:* Friends Meeting House, Fountain Street (M 8 h.).

**Bratislava** (Ĉeĥoslovakio, Slovakio).

*D:* DĚO STANISLAV KAMARYT, profesoro, Telocvičná 3.

**Braunschweig** (Germanio).

*D:* Fino KÄTHE JAHNS, Infanteriestrasse 2 III.  
*VD:* ADOLF REINKING, supera distriktojgisto, Löwenwall 11.  
*EG: Adr.:* ĉe la Del. *Ejo:* Gasthaus Felten, Helmstedter Strasse 11 (M 8 h.).

**Bremerhaven** (Germanio, Hannover).

*D:* BERTHOLD TRILLHAASE, sekretario, Am Hafen 67—69.

**Breslau** (Germanio, Schlesien).

*D:* SIGMUND FREUND, komercisto, Antonienstrasse 22/23.

*VD:* ADOLF SELTEN, libristo, Wallstrasse 11.

*EG:* "Grupo". *Adr.:* JULIE WOLFSON, Augustastrasse 35.

*Ejo:* Casino Restaurant, Hummeri 35 (V 8 h.).

"Katolika Grupo Unueco". *Adr.:* M. MIELERT, Werderstrasse. 35. *Ejo:* Vincenzhaus, Seminargasse (L 8 h.).

"Laborista Grupo". *Adr.:* ĉe la Vicdel. *Ejo:* Gewerkschaftshaus, Margarethenstr. 17 (S 8 h.).

"Ligo". *Adr.:* M. MIELERT, Werderstrasse 35. (Kunvenoj laŭbezono).

**Brest** (Francio, Finistère).

*D:* OSCAR GOASGUEN, desegnisto, 14 Place Verdun.

**Brighton** (Anglio, Sussex).

*D:* JAMES GERALD SIMS, hotelisto, Chichester Mansion, 18 Marine Parade.

*EG: Adr.:* S<sup>ro</sup> AD. DORLENCOURT, 14 York Villas. *Ejo:* 51 Old Steyne (M 7 h. 45).

**Bristol** (Anglio, Gloucestershire).

*D:* WILLIAM FRANK WESTMANCOTE, poŝtovicisto, The Chessels, 15, Ashfield Road.

*VD:* HAROLD DARCH, ĥemiisto, The Retreat, Downend.

*EG: Adr.:* ĉe la Del. *Ejo:* The Cavendish Club, High Street (V 7 h. 30).

**Brno** (Ĉeĥoslovakio, Moravio).

*D:* ANTONIN VALOUŠEK, instruisto, Medlanky.

*VD:* VINCENC KROUŽIL, inĝeniero, Průmyslová škola.

*EG:* "Klubo". *Adr.:* S<sup>ro</sup> JAN ŠEMBERA, Francouzka 72.

*Ejo:* Akademická kavárna, Augustýnská ul. (M).

**Bromberg** (Polio, Poznań).

*D:* SAMUEL ŠULC, komercisto, Bahnhofstr. 64.

*VD:* ARTHUR PANKRATZ, stud. fil., Bocianowka 13 r.

*EG: Adr.:* ĉe la Del. *Ejo:* Hotel Lengning, Friedrichstrasse (Ĵ 4 h.).

Katolika grupo „Antaŭen kun kredo". Prez.: Fino BOGUSLAWSKA.

**Brugge** (Belgio, Flandre orientale).

*D:* Fino YVONNE THOORIS, puntmanufakturistino, 4 Rue de l'outre.

*EG: Adr. Ejo:* Hotel du Cornet d'or, 2 Place Simon Stévin. (Ĵ 8 h.).

**Bruges** (vidu *Brugge*).

**Brünn** (vidu *Brno*).

**Brŭix** (Ĉeĥoslovakio, Bohemio).

*D:* V. E. HRÁBAK, mineja oficisto, Schulgasse 9 I.

**Bruxelles** (Belgio, Brabant).

*D:* EDOUARD HAINE, profesoro pri ĥemio, 23 Rue du Marais, Ruysbroeck.

*VD:* MAURICE VAN AELST, instruisto, 107 Rue Emile Féron St. Gilles.

*EG:* Federacio de la Bruselaj grupoj. *Adr. Ejo:* 3 Rue Royale (Institut de bibliographie).

**Budafok** (Hungario, Pest mégye).

*D:* EMERIKO PADOŠ, bankoficisto, Pemintereti körpont, Deak Ferencz utca 1.

**Budapest** (Hungario).

*D:* PAL BALKANYI, oficisto, VI. Hajos utca 15/II.

*VD:* MOR BIHARY, asekura oficisto, VIII. Népszínház utca 27.IV.31.

*EG:* "Budapesta Grupo". *Adr. Ejo:* VI. Eötvös u. 3 I. (L Ĵ 6 h.).

"Hungara Esp. Societo". *Adr. Ejo:* V. vigadó u. 5 I. (V 6 h.).

"Esp. Laborista Societo". *Adr. Ejo:* VIII. bérkocsis u. 1 (D 10 h. mat., M 6 h.).

"Esp. Grupo de filatelistoj". *Adr. Ejo:* vigadó u. 5 I. (V 6 h.).

*EO:* Librejo Kokai Lajos, Karoly utca 1.

**Buenos-Aires** (Argentino).

*D:* PETRO GOMEZ, makleristo, 3924 Calle Cordoba.

*VD:* ANDREAS VILLAFRANCA, arta vitrajisto, 590 Calle Cerrito.

*EG:* „Antaŭen". *Adr. Ejo:* Calle San Martin 2049 Talleres F. C. S. (ĉiutage 8 h.).

**Buer i. W.** (Germanio, Westfalen).

*D:* FRANZ TOWET, minejestro, Egerplatz 5.

**Burgdorf** (Svisio, Bern).

*D:* FRITZ KOCHER, fervoja oficisto, Huniadygasse 8.

**Bury** (Anglio, Lancashire).

*D:* JAMES ALEXANDER ROGERS, notaria komizo, 79 Horne Street.

*EG: Adr.:* Fino LENA BURTON, 14 Hurst Street. *Ejo:* Biblioteko kooperativa, 21 Market Street (Mk 7 h. 45).

**Bydgoszcz** (vidu *Bromberg*).

**Bystrice p. H.** (Ĉeĥoslovakio, Moravio).

*D:* THEODOR ĈEJKA, instruisto.

*VD:* Fino ANTONIE JANALIKOVA, instruistino.

*EG: Adr.:* Klub Esperantistu. *Ejo:* Hotelo Batta (S 8 h.).

**Bytom** (vidu *Beuthen*).

## C

**Cádiz** (Hispanio).

*D:* LUIS FLÓREZ, artileria kapitano, Comandancia de artilleria.

**Calahorra** (Hispanio, Logrono).

*D:* CELESTINO ESCOBÉS, lignaĵisto, 71—75 Calle del Sol.

*VD:* MIGUEL NAVARRO, panisto, 2 Calle de la Estrella.

**Cambridge** (Anglio, Cambridge).

*D:* SINO HENRIETTA BISHOP, instruistino, 5 Alexandra Street.

**Cambron-St. Vincent** (Belgio, Hainaut).

*D:* ALPHONSE GAUDISSERT, poŝtisto, Grand' Place 6.

**Cancon** (Francio, Lot-et-Garonne).

*D:* JEAN RENAUD, entreprenisto de publikaj laboroj.

**Canicatti** (Italio, Girgenti).

*D:* PALERMO CALOGERO, 27, via Vicolo S. Rosalia.

**Cannes** (Francio, Alpes Maritimes).

*D:* CHARLES CRESP, fotografa informisto, 14 Rue des Marchés.

*VD:* PAUL RICHARD, Val Roya, Maison Lanteri Boulevard Deloup.

*EG: Adr.:* MR. CALMAR, 20 Rue des Vallergues. *Ejo:* 20 Rue Borniol (1an Ĵ monate 20 h.).

**Cape Town** (Sud-Afriko).

*D:* GEORGE F. H. CLARK, profesoro, P. O. Box 2, Wynberg.

**Capodistria** (Istrio).

*D:* DEMETRIO COSSARO, profesoro, 459 Via Eugenia.

*VD:* ARMANDO CAMUFFO, instruisto, Villa Carla.

**Carcagente** (Hispanio, Valencia).

*D:* JAIME IRANZO NAVARRO, komercisto, 11 Calle San Antonio.

**Cardiff** (Anglio, Wales).

*D:* DAN THOMAS, apotekisto, 128a Penarth Road.

*VD:* F. S. GAMMON, botisto, 14 Moira Place.

*EG: Adr. Ejo:* 10 Paget Street (L 8 h.).

**Ĉerný Kostelec** (Ĉeĥoslovakio).

*D:* LUDVIK BOHUMIL, faka instruisto, odb. učitel.

**Cette** (Francio, Hérault).

*D:* SRO HENRI GUIBAL, komerca oficisto, Cité Doumet, Maison Meynier.

*VD:* SINO MARTHE JUILLARD, profesoro, 36 Rue Carausane.

**Ĉestoĥovo** (vidu *Czestochowa*).

**Chalons sur Marne** (Francio, Marne).

*D:* LUCIEN BOYER, librotenisto, 1 Rue de la Potellerie.

**Chang Shu** (Ĥinio, Kiangsu).

*D:* ECENO S. CIAN, instruisto, 150 Kungchin Street.

**Charleville** (Francio, Ardennes).

*D:* LÉON HUBERT, eksprofesoro, 32 Rue J.-J. Rousseau.

**Cheb** (vidu *Eger*).

**Cheltenham** (Anglio, Gloucester).

*D:* WALTER G. PHIPPS, kontoristo, Marston, Langdon Road.

*EG: Adr.:* ĉe la Del. *Ejo:* Orme Chambers, North Street (M 7,30 h.).

**Chemnitz** (Germanio, Sachsen).

*D:* DRO fil. FRITZ WICKE, docento, Katzbergstrasse 40.

*VD:* Fino HILDEG. NAGEL, maestr. instruistino, Fürstenstrasse 69I.

*EG: Adr.:* SRO direktoro FEDER, Andréstrasse 41. *Ejo:* Arnolds Theatergarten, Theaterstrasse (M). *Ejo:* I. höhere Volksschule für Knaben, Dresdner Strasse (Ĵ).

"Lehrergruppe". *Adr.:* SRO MELZER, Zöblitzer Strasse 14.

*Ejo:* I. höhere Volksschule für Knaben, Dresdner Strasse (Ĵ).

"Laborista Grupo". *Adr.:* SRO W. PAUST, Brühl 54 III.

*Ejo:* Luderers Bierstube, Gartenstrasse.

**Cheste** (Hispanio, Valencia).

*D:* FRANCISCO MANEZ SANCHEZ, terkulturisto, 2 Calle San Francisco.

*EG:* "Lumradio". *Adr. Ejo:* ĉe la Del., ĉiuvespere.

**Chester** (Anglio, Cheshire).

*D:* JAMES WARBURTON DOBSON, libristo, 27 Brook Street.

*EG: Adr. Ejo:* Falcon Kafejo, Lower Bridge Street (Ĵ 7 h. 30).

**Chicago** (Usono, Illinois).

*D:* DRO B. K. ŠIMONEK, dentisto, 1669 Blue Island Avenue.

*VD:* Fino JULIO MARTICH, 2011 Washburne Avenue.

*EG:* "Gradata Esperantista Societo". *Adr.:* ĉe la Del. *Ejo:* Dvorak Park, 20a kaj S. May Street (la 1an D monate 3 h.).



**Cholet** (Francio, Maine-et-Loire).

*D:* ERNEST BOISSON, kalkulisto, 37 Rue Nationale.

*EG: Adr.:* ĉe la Del. *Ejo:* Ecole des Garçons, rue des Bons Enfants (M 22 h.).

**Chomutov** (vidu *Komotau*).

**Chorley** (Anglio, Lancashire).

*D:* WILLIAM BROWN, kotonfabrikisto, "Mayfield".

*EG: Adr.:* ĉe la Del. *Ejo:* W. E. A. College (vintre: L 7.30 h.).

**Clermont-Ferrand** (Francio, Puy de Dôme).

*D:* ANNET THOMAS, oficisto, chez M. MALLY, aux Ormeaux, Chemin de la Garde-Barrière.

**Colombey-les-Belles** (Francio, Meurthe et Moselle).

*D:* ANDRE GÉRAUD, advokato, 44 Rue Alexandre III.

**Columbus** (Usono, Ohio).

*D:* JAMES G. HAYDEN, kalkulisto, 211 S. Richardson Avenue.

**Compiègne** (Francio, Oise).

*D:* PAUL LÉCURU, oficisto, 15 Rue de Soissons.

**Constantinople** (vidu *Konstantinoplo*).

**Coomassie** (Afriko, Gold Coast).

*D:* GEORGES GUNST, oficisto, Compagnie Française de l'Afrique Occidentale.

**Cordoba** (Hispanio, Cordoba).

*D:* FRANCISCO SERRANO OLMO, komercisto, 40 Gutierrez de los Rios.

*VD:* ROGELIO LUQUE DIAZ, komercisto, 8 Victoriano Rivera.

*EG: Adr.:* ĉe la Del.

**Cortemaggiore** (Italio, Piacenza).

*D:* MODESTO CAROLFI, profesoro.

*EG:* "Bela Espero". *Adr.:* ĉe la Del. *Ejo:* Scuole Elementare.

**Coventry** (Anglio, Warwickshire).

*D:* ARTHUR J. MORGAN, horloĝisto, 26 Clarendon Street.

*VD:* Sino WINIFRED HALSTONE, Tile Hill Lane.

*EG: Adr.:* Coventry Esperanto Club. *Ejo:* „Espero”, 36 Stanway Road (Mk 8 h.).

**Cowdenbeath** (Skotlando, Fife).

*D:* JOHN BOYD PRIMMER, kuracisto, Struan Bank.

*VD:* DAVID YOUNG, lernejestro, Forlford School.

*EG: Adr. Ejo:* Forlford School (Ĵ 7.30 h.).

**Crauglio p. Aiello** (Italio, Venezia-Giulia).

*D:* VIRGILIO FOSCHIAN, lignaĵisto.

**Cremona** (Italio, Cremona).

*D:* Sino ANNETTA SARTORI, instruistino, 6 Via Nuova.

*VD:* Sino ERNESTA GUGLIERI, instruistino, Via Palestro.

*EG: Adr. Ejo:* Societa di Lettura (S 8 h.).

**Croix** (Francio, Nord).

*D:* JULES TOBIE, muzik-profesoro, 45 Rue de la Gare.

**Crowley** (Usono, Louisiana).

*D:* J. G. HAUPT.

**Croydon** (Anglio, Surrey).

*D:* ARTHUR DAVID PECK, inspektoro de publika sano, "Watton", Cotford Road, Thornton Heath.

*EG: Adr.:* S<sup>ro</sup> L. L. S. LOUIS, 1 Courtney Road. *Ejo:* New Ruskin House, 23 Wellesley Road (la 1an M monate 7.30 h.).

**Cuenca** (Hispanio, Cuenca).

*D:* JULIO LARRANAGA-MENDIA, sub-inĝeniero de pontoj kaj vojoj, 8 Mariano Catalino.

**Cuevas de Vera** (Hispanio, Almeria).

*D:* DIEGO AZNAR-CASANOVA, makleristo.

**Culemborg** (Nederlanda, Gelderland).

*D:* P. J. SOETERS, instruisto, Slotstraat 161.

**Czegléd** (Hungario, Pest megye).

*D:* ANTAL FODOR, bankoficisto, Hítelbank.

**Czestochowa** (Polio, Piotckow).

*D:* ABRAHAM KARMIOL, komercisto, Nowy Rynek 5.

## D

**Danzig** (Liberŝtato).

*D:* Sino ANNA TUSCHINSKI, Vorstadtgraben 4/5 I, Eingang Holzgasse.

**Dax** (Francio, Landes).

*D:* FERNAND LAGESTE, 21 Place du Sablar.

**De Jutryp** (Nederlanda, Friesland).

*D:* WIBE P. CNOSSEN, brutbredisto.

**Delitzsch** (Germanio, Pr. Sachsen).

*D:* HANS SCHMIEDEBERG, profesoro, Schloßgasse 25.

*EG: Adr. Ejo:* ĉe la Del. (M 8 h.).

**Delphos** (Usono, Ohio).

*D:* JULIAN E. FAST, librotenisto, West 5th Street.

**Derby** (Anglio, Derby).

*D:* JAMES POTTER, tajloro, 4 The Strand.

**Detroit** (Usono, Michigan).

*D:* D<sup>ro</sup> TOBIAS SIGEL, kuracisto, 607 Breitmeyer Building.

*VD:* GUSTAV MUEHLKE, tajloro, 31 Hilsendegen Block.

*EG:* "Pola Esp. Asocio". *Adr.:* S<sup>ro</sup> B. LENDO, 120—29th Str.

**Deventer** (Nederlando).

*D:* GERARD METZ, Spaarpotstraat 14.

**Dijon** (Francio, Côte-d'Or).

*D:* Sino MARTHE PETIT, 33 Rue Chabot-Charny.

**Diosgyőr-vasgyár** (Hungario, Borsod).

*D:* LAJOS SZABÓ, ferfabrika oficisto, vasgyári disztviselö.

**Doboj** (Jugoslavio, Bosnio).

*D:* GJURO VOJKOVIĆ, apotekisto, Gekarnik.

**Dorpat** (vidu *Tarto*).

**Dresden** (Germanio, Sachsen).

*D:* Sino CAMILLA FÜRTH, Carlowitzstrasse 28.

*VD:* J. E. NICOLAI, bankoficisto, Franklinstrasse 6, A. 24.

*EG:* "UEA". *Adr.:* ĉe la Del.

"Poŝta Esperantista Unuiĝo". *Adr.:* WILLY BOERSCH, Florastrasse 13 II. *Ejo:* Rothe's Bayer. Bierstuben, Altmarkt (M.).

*EO:* Librejo Ader & Borel, Struvestrasse 40.

**Dublin** (Irlando).

*D:* JAMES A. MEAGHER, advokato, 12, Westmoreland St.

**Düsseldorf** (Germanio, Rheinland).

*D:* BERNHARD LUIS, teknikisto, Degerstrasse 43.

*VD:* PETER AMON, frizisto., Mülheimerstrasse 1.

*EG:* *Adr.:* ĉe la Del. *Ejo:* Hotelo Bergischer Hof, Bahnstrasse 10 (M 9 h.).

"Verda Stelo". *Adr.:* S<sup>ro</sup> LUDWIG LÖHL, Yorkstrasse 30.

*Ejo:* "Löwenburg", Brehmplatz 3 (Ĵ 8 h.).

**Dux** (Ĉeĥoslovakio, Bohemio).

*D:* MAX MURATH, profesoro, Gymnasium.

*VD:* JOSEF VESELY, fervojisto, Han bei Dux.

## E

**Eastbourne** (Anglio, Sussex).

*D:* VALENTINE VINCETT SUMFIELD, presisto, Station Street.

*EG:* *Adr.:* ĉe la Del. *Ejo:* Companion Tea Room, 120 Terminus Road 1a kaj 3 L ĉiumonate 4 h. 30).

**Edinburgh** (Skotlando).

*D:* DAVID RITCHIE TULLO, advokato, 34 St. Andrew Square.

*VD:* WILLIAM RAE, kasisto, 2 Walker Street.

*EG:* *Adr.:* W. M. PAGE, 31 Queen Street.

*Ejo:* Room 26, Synod Hall, Castle Terrace (Mk 8 h.).

**Eger** (Ĉeĥoslovakio, Bohemio).

*D:* KARL HELL, fervoja oficisto, Grabenstrasse 33 II.

*VD:* F. SCHUSTER, instruisto, Ringstrasse.

*EG:* *Adr.:* ĉe la Del. *Ejo:* "Ratskeller".

**Eisenach** (Germanio, Thüringen).

*D:* J. ZINGANELL, horloĝisto, Georgenstrasse 6.

**Elberfeld** (Germanio, Rheinland).

*D:* PETER TRARBACH, rektoro, Felsenstrasse 27.

*EG:* "Verda Stelo". *Adr.:* ĉe la Del. *Ejo:* "Vierjahreszeiten am Mäuerchen" (L 8 h.).

**Enköping** (Svedio, Uala).

*D:* AUGUST KRISTIAN ÖRN, asekuristo, 18 Kungsgatan.

*EG:* *Adr.:* ĉe la Del.

**Enschede** (Nederlando, Overijsel).

*D:* G. P. DE BRUIN, administranto, Alléeweg 9.

**Eperjes** (vidu *Prešov*).

**Érkeserü** (Hungario, Bihar megye).

*D:* SÁNDOR MARTON DE ZSARLOYAN, bienhavanto.

**Esbjerg** (Danio, Jütland).

*D:* PEDER SÖRENSEN, cigarfaristo, Nørregade 47.

*EG:* *Adr.:* BORCH, Nørregade 59.

**Escondido** (Usono, California).

*D:* WILLIAM W. CARPENTER, fervoja agento, P. O. Box 82.

*VD:* ELERY J. LOVELESS, fruktokulturisto.

**Eskilstuna** (Svedio, Södermanland).

*D:* ARVID ÅGREN, telefonriparisto, Telegrafstationen.

*VD:* FINO NANNY ASPLUND, instruistino, Västermalm.

*EG:* "La Stelo". *Adr.:* ĉe la Del. *Ejo:* Kafejo Framtiden (la 2<sup>an</sup> D monate, 8 h.).

**Essen** (Germanio, Rheinland).

